


Esperantlingva traduko de la libro:

TOEN NIET, NU NIET, NOOIT

door
Truus Menger



elnederlandigis: Marrie Kardol

dankon al Rob Moerbeek pro korekti la tradukadon

Antaŭparolo	4
1. Krizjaroj	5
2. La 10-an de majo 1940	10
3. Kampadi	12
4. La unua bombardo	13
5. La agado de Koevoet (kufut)	15
6. Februara striko	16
7. La sinkaŝanto	18
8. Konatiĝo kun Frans	20
9. La testo	22
10. Printempo 1942	24
11. Wiesje kaj Frits	26
12. Naziknabinaĉoj	28
13. La mallonga kontraŭleĝa epizodo de Willem	31
14. Pogromo	32
15. Unua de majo festo 1943	34
16. Avinjo	35
17. Infantransporto	38
18. La testo de Hannie	44
19. La provizora malsanulejo	46
20. Hannie	49
21. Hannie kaj Jan	51
22. 'Ĉi tio estas speciala komisio'	54
23. Lastmomente...	56
24. La knabeto Loetje (Lutje)	58
25. La likvido de H.	60
26. La pafo	62
27. La leciono	64
28. Fake Krist	65
29. Perfidulo	68
30. Eksploदाĵo en Haarlemmermeer	72
31. Sensukcesa!	75
32. Malsana	78
33. 'Oni mortpafas homojn tie'	80
34. La virino kun la sledeto	82
35. Tio eksplodu	85

36. La infanoj de Sejs Inkvart	87
37. La aresto de Hannie	89
38. La familio Elsinga	92
39. Klopodo liberigi Hannie	94
40. Vizito al Weteringschans	97
41. Liberiĝo	101
42. Rememoro	104

Antaŭparolo

La gefratinoj Truus kaj Freddie Oversteegen estis ligitaj al rezistgrupo dum la Dua Mondmilito.

Je la komenco de la milito Truus havis dek ses jarojn kaj Freddie nur dek kvar. Ili partoprenis en la sama grupo en kiu ankaŭ Hannie Schaft (la knabino kun la ruĝaj haroj) agis kaj multfoje ili laboris kune.

Ĉi tiu libro pritraktas la vivojn de junaj homoj kiuj batalas por afero kiun ili opinias vivovaloran. Pri sukcesaj agadoj kaj pri malsukcesoj - pri sento de kontenteco aŭ pri maldolĉa seniluziigo poste.

Kiel oni sentiĝas kun biciklo je la mano apud la ŝtuparo atendanta S.S.-oficiron kiun oni devu likvidi?

Aŭ kiam oni ekhavas ordonon gvidi grupon da judaj infanoj al sekureco - kaj la komisiono malsukcesas?

Ĉi tiuj rakontoj estas despli emociaj ĉar ili estas skribitaj tiel modere.

Truus Menger-Oversteegen ne estas skribistino, ŝi mem opinias. Ŝi estas skulptistino, ŝi konstruis la statuon de Hannie Schaft, kiu estis inaŭguriĝita je la 3a de majo 1982 en Harlemo. La statuo simbolas fierecon kaj internan forton.

1. Krizjaroj

1930

La gravaj krizjaroj, la enorma ondo de senlaboreco, la manifestacioj ĝin sekvantaj - ili impresis miajn infanjarojn. Image mi ankoraŭ vidas la longajn vicojn antaŭ la stampejoj (stampejo estis loko kie oni stampis senlaborulajn subvenci-kartojn).

Antaŭ la pordegoj de la grandaj fabrikoj troviĝis jam frumatene centoj da laborserĉantoj por petegi laboron kelktagan. Estis konate ke en tiu tempo kontrolisto de 'Hoogovens' ekzamenas kaj elektas la plej grandajn kaj plej fortajn viregojn kvazaŭ brutaron. Do ĉiu plilarĝigis sin iom por altiri la atenton... ('Hoogovens' = Fandfornegoj).

Estis tempo de manifestacioj kaj protestoj. Mi estis tiam kvinjara.

Iufoje mi ankaŭ kunmarŝis en tia manifestacio. Mi memoras ruĝajn flagojn, tamburojn antaŭe kaj sloganbendojn. Je la mano de mia patro mi klopodis marŝi samrapide kiel la plenkreskuloj. Mi povis vidi nur moviĝantajn krurojn.

Subite basa virvoĉo ekkriis:

“Kiu perdigas nian monon?”

Estas Ruys de Beerenbrouck!!” (Ruys de Beerenbrouck estis la tiama ĉefministro)

Fariĝis parolĥoro. Ĉiuj ĉi koleregaj viroj levis la pugnojn kaj seninterrompe ripetadis la saman devizon. Sonis tondre kaj minace.

Subite ni renkontis kontraŭan manifestacion. Ĝi konsistis el multe pli da homoj ol ni. Mi aŭdis:

“Pendumu, pendumu, ĉiujn socialistojn sur lanternfoston!”

Oni ŝtonĵetis, kriegoj sonis kaj policfajfiloj alarmis. Mi vidis baŭmantajn ĉevalojn kaj subite forta mano prenis min kaj levis min antaŭ policiston sur ĉevalon.

En policejo mi devis atendi. Oni donis al mi teleron da avena kaĉo, sed mi ne kuraĝis manĝi ĝin.

Kiam mia patrino venis por kunpreni min estis vespero. La lanternoj jam lumis. Kaj ree mi aŭdis tiujn voĉojn:

“Pendigu sur lanternfoston!”

“Panjo, kion signifas socialistoj?” mi demandis.

“Tiu estas ni kaj ĉiuj homoj kiuj marŝis kune kun ni,” ŝi diris.

Mi suprenrigardis al la lumantaj lanternoj kaj sentis min tre malĝoja.

1934

“Hodiaŭ vespere ni alportos ilin,” diris la viro en leda palto.

Mia patrino kapjesis kaj mienis serioze. Aŭskultante mi sidis ĉe ili, la manoj sub la mentono. Estis jam malfrue kaj verdire mi devus esti dormanta, sed mi estis iomete febra. Mi scivolis kion aŭ kiun oni alportos.

Mia patrino elakompanis la viron kaj enlitigis min.

Post iom da tempo mi vekigis pro fremdaj voĉoj. Mi aŭdis la patrinon paroli kun du viroj. Evidente ili restis por dormi ĉar ili rulis sin en litkovrilojn senpere sur la planko. Ankaŭ mia patrino enlitiĝis.

Hitler-Germanio havis siajn unuajn pogromojn kaj koncentrejojn. Germanaj judoj, komunistoj kaj socialistoj envenis Nederlandon kontraŭleĝe. Organizoj kiel 'De Rode Hulp' kontrabandis tiujn fuĝantojn trans la limon. Kelktempe ili estis loĝigataj ĉe kontraŭ-faŝismaj familioj. Oni klopodis plusendi ilin al Anglio aŭ Usono. ('De Rode Hulp' = La Ruĝa Helpe)

En tiu tempo de malriĉo la solidareco estis granda. Oni dividis sian magran posedon kun la fuĝantoj. La helpdonantoj iris de pordo al pordo kun tiel nomataj 'subtenlistoj' por kolekti monon.

Ankaŭ ni havis tiajn pensionulojn de tempo al tempo. La registaro malpermesis ĉi tiujn agadojn sen oficiala aprobo kaj kiam la fremdulpolico sciiĝis pri ili, ili estis metitaj trans la limon - kie atendis ilin malliberejo, koncentrejo aŭ io pli malbona.

Mia fratineto kaj mi lernis silenti pri niaj gastoj. Antaŭ ol la nazioj okupis nian landon, ni jam komprenis ke paroli povas esti danĝere. Ni jam sciis kio estas nazioj. Ni jam sciis kion signifas perfido.

1935

Miaj gepatroj eksedziĝis jam antaŭ kelkaj jaroj kaj ni estis tre malriĉaj. Mi povas memori nur ke ni ĉiam vivis subtenate de la sociala helpo. De tempo al tempo venis personoj por inspekti ĉu ni estas sufiĉe malriĉaj. Ili apartenis al ŝtatsubvenciata organizo, kiu nomiĝis 'Maatschappelijk Hulpbetoon'. ('Maatschappelijk Hulpbetoon' = Sociala Helpado) Ili rigardis en ĉiujn ŝrankojn, spionis sub la matracon kaj eĉ estus okulintaj en la fornon se tiu ne estus tro varmega. Ni ricevis tiam pagon de 13,75 guldenoj semajne. Feliĉe la domluo estis nur 3,50 guldenoj sed ni manĝis mallukse. Plurfoje ni transloĝiĝis al pli malmultekosta domo.

Regule oni organizis kunvenojn en nia domo - kontraŭleĝe, ĉar la 'Sociala Helpado' malpermesis al mia patrino gastigi homojn (komprenu bone: virojn).

Iufoje nia pago estis retenita ĉar oni malkovris ke estis okazinta kunveno en nia domo. La indigno estis granda. En la komenco ni ekhavis panon kaj ankaŭ foje supon de najbaroj kaj amikoj, sed poste, havante nenion plu, ni iris kun la patrino al la oficejo de la Sociala Helpado. Ŝi diris ke ŝi venas por preni sian pagon kaj poste, sufiĉe laŭtvoĉe por ke ĉiuj rimarku: "Miaj infanoj malsatas, pro tio ke mi politike ne harmonias kun vi. Mi ne foriros de ĉi tie antaŭ ol mi havos manĝaĵon kaj monon."

Oni vokis policiston kiu ordonis al mia patrino forlasi la oficejon. "Unue nutraĵon!" ŝi ree diris.

Li prenis ŝian brakon kaj tiris forte. Mi eksentis koleregon en mi. Mi vidis ke li dolorigas ŝin, mi eksaltis kaj pugnobatis kaj mordis lin. "Ne tuŝu mian patrinon, kanajlo!" mi kriegis. Mia eta fratino piedbatis liajn tibiojn.

Kiam finfine ni iris hejmen, ni havis kelkajn nutraĵkuponojn; ne monon. Dum ses sinsekvaj semajnoj ni manĝis nur brunajn fazeolojn.

Kiam mi havis dek kvar jorojn mi jam laboris en la mastrumado. Bedaŭrinde mi ne tre taŭgis por tia laboro. Pro malkontento de miaj dungantinoj mi devis ĉiun duan semajnon serĉi alian dungon. Mia laborkompreno estis minimuma, cetere samkiel mia salajro - po tri guldenoj semajne!

Kelkfoje la ordonita laboro transpaŝis miajn limojn, aŭ la dommastro ne povis ne tuŝi min. Infanetoj ofte estis malgrandaj tiranoj, al kiuj oni plej volonte piedbatus la postajon.

Unu el la familioj en kiuj ĉiuj ĉi kvalitoj kolektiĝis, loĝis en belega vilao en Bloemendaal (Blumndal), la bastiono de la plej riĉaj homoj en Nederlando. Mi servis tie tagnokte. Germana servistino diris al mi, kion mi faru. Tiutempe multe da tiaj germanaj knabinoj estis en Nederlando. Käthe (Kejt) estis unu el ili.

Mia ĉambreto, situanta alte en la granda domo, estis malgranda kaj malriĉe meblita. Mi ekhavis pajlan matracon kaj du maldikajn litkovriletojn.

Käthe postvokis min ke ŝi vekos min je la sesa. Ŝia ege aparta prononcado eĥadis longtempe en miaj oreloj.

Jen mi sidis vespere je la oka, unuafoje en mia vivo rolanta plenkreskule. La larmoj pikis malantaŭ miaj okuloj, kiam mi vidis la leterojn de mia fratineteto kaj la desegnon de la frateto supre sur la vestoj en la valizo. Mia patrino estis metinta ruleton da mentpasteloj kaj arakidkukon en la valizon.

La amaj surprizoj helpis min venki mian timon pro la nekonata situacio kaj mian hejmsopiron. Mi enlitiĝis en la humidan liton kaj mi dormegis dolĉe.

Matene sonis granda bronza sonorilo super mia lito kaj brute vekis min. Kolerega mi ligis unu el miaj ŝtrumpoj ĉirkaŭ la frapilon. Poste mi decidis tamen ellitiĝi.

Malsupre mi ricevis de Käthe teleron da akveca avenkaĉo.

“Vi donu tiun al la kato,” mi diris kaj mi metis la teleron sur la plankon. “Ĉu vi volas diri al mi kie mi komencu?” mi demandis.

Indigne Käthe levis mian teleron. “Tiam oni manĝas nichts,” ŝi diris. (‘nichts’=germane: nenion)

Mi komencis malplenstomaka. Senpolvigi, polvosuĉi, viŝpurigi fenestrojn, ordigi litojn. Kiam mi, laca kaj tremanta pro malsato je la interkonsentita tempo povis eksidi, por la kafpaŭzo kaj demetis la ŝuojn pro miaj brulvarmaj piedoj, unu el la malgrandaj kanajletoj metis prempinglon en mian ŝuon.

“Truus, ĉu vi ja purigis la dormĉambbron supre?” demandis la sinjorino iomete nemilde.

“Certe, sinjorino!” mi kriis vigle.

“Tamen vi ne tuŝis la noktovazon, mi observis,” ŝi diris daŭre kun tia acidmiena vizaĝo.

Efektive, troviĝis noktovazo supre en kiun la tuta familio pisis dum la nokto. Ĝi estis plena ĝis la rando kaj mi ne havis la intencon malplenigi ĝin.

“Ho, sed tian laboron mi neniam bezonas fari hejme,” mi diris ruĝkape.

“Vi tamen baldaŭ faru tion,” diris la sinjorino decideme.

Post la kaftrinkado mi trenpaŝis supren. La sinjoro staris supre de la ŝtuparo kaj observis min aprobe.

“Ha, karulino,” li diris, “ĉu jam malkonsento kun la sinjorino?”

Subite li kaptis min, metis unu manon inter miajn krurojn kaj premis krude kaj naŭze sian buŝon sur la mian. Perforte mi liberigis min kaj fuĝis en la dormĉambron. Tie mi uzis la noktovazon kiel armilon. Ridante li retiriĝis. Senhezite mi rulfaligis la plenan noktovazon malsupren. Mi kuris al mia ĉambreto, prenis mian valizon kaj preteriris la konsternitan familion, flankitan de la germana Käthe, al la libero.

“Mi domaĝas pro la mono,” diris la patrino, “sed vi pravas. Tion ankaŭ mi rifuzus.”

1939

Fine de julio 1939. La titoloj en la ĵurnaloj kriegis malbonaŭgurajn prognozojn, oni malkaŝis fotojn kiuj pensigis la homojn. La ĉeĥoj jam konatiĝis kun la bone funkcianta militmaŝino de Hitler. Oni kontraktis paktojn kaj ree malobservis ilin. Hitler kaj Mussolini parolis minacan lingvaĵon. La kinaktualaĵoj montris pretermarŝantajn homamasojn kaj tremado trairis la kinejon kiam sonis kvazaŭ unubuŝege “Heil, heil, heil!” kvazaŭ malbonsigna startpafo al timo, subpremado kaj malhomeco. (‘heil’ = saluton, estu benata [nazia termino]) Nia ĉefministro opiniis ĉiun ĉi paroladon pri militminaco ĉe niaj limoj troigita. La inerta burĝo kredis tion sed eĉ en nia tre dekstra ministraro pligrandiĝis la maltrankvilo. Nepardoneble estis ke ĉi tiu ĉefministro de Geer tutsimple foriris por ferii kaj li eĉ indignis kiam urĝa telefonvoko de la registaro revokis lin. Tio estis aŭgusto 1939.

La 29-an de aŭgusto 1939, - tiun tagon mi fariĝis dekkvinjara, - la militistaro de Hitler invadis Pollandon. La dua mondmilito komenciĝis.

“Knabinoj, aŭskultu. Hodiaŭ vespere vi iru por venigi du gefratetojn kaŝotajn for de la polico.” La patrino parolis pli laŭte ol normale. Mi levis la rigardon mirigite.

“Kial ni?” mi demandis, “tia tasko ja pli taŭgas por vi?”

“Kial vi diras tion tiel malafable. Vi ne scias kion mi volas aldoni,” diris mia patrino.

Mi ŝultrotiris. Ĝuste tiam mi estis leganta tiel agrable! Mi rigardis al mia fratinetto kiu kudris robon. Ŝi ne reagis kaj daŭrigis puŝi la ŝtofون subtra la piedeton de la kudromaŝino. Tiu aparato estis ia gurdo, antikva, iama posedaĵo de nia avino. Kiel ŝi povis manipuli tiun maŝinon estis enigmo por mi.

Freddie kaj mi estis furioze kverelegintaj ĝuste tiun posttagmezon. Mi intencis ne paroli kun ŝi dum kelkaj tagoj. Nun, se ni kune devus ekiri, tio estus neebla.

La patrino rimarkis nian malvolonton. “Kiajn socialemajn infanojn mi havas!” ŝi diris kolerega. “Ĉu vi ja scias kion signifas esti forpelata? Daŭre devige esti loĝigita ĉe aliaj homoj? Sen gepatroj..., ĉe homoj kiuj verdire opinias vian restadon ĝena?”

Ni sentis nin kulpaj, ni sciis ke ŝi pravas. Ŝi rakontis al ni la historion de ĉi tiuj infanoj. Iliaj gepatroj troviĝas ankoraŭ en Germanio. Oni sendis ilin al Nederlando por eskapi el la manoj de la nazioj.

“Pripensu foje kiel vi sentiĝus sen mi kaj sen via frateto,” ŝi diris. “Oni nur povas nomi sin vera kontraŭfaŝisto, se oni forgesas la stultajn kveleretojn, proprajn plezuretojn kaj memkompaton. Se oni vere volas helpi la fuĝantojn.”

“En ordo, panjo,” diris Freddie.

“Komprenite,” mi diris.

La homoj ĉe kiuj mi laboris tiutempe ankaŭ estis elmigrintoj. Germanaj judoj. Afablaj homoj, kiuj posedis meblovendejon. Estis maljuna avino kaj du fratinoj kun siaj edzoj kaj malgranda lerta etulino. Ili postlasis ĉion kiam la pogromoj ondis tra Germanio. La malgranda knabino parolis jide kun sia avino kaj germane kun siaj gepatroj. De mi ŝi tre rapide lernis la nederlandan.

Unu tagon vole nevole mi aŭdis paroladon kun vizitanto alportanta abomenan novaĵon el Germanio.

“Vi devas iri al Usono,” li petegis la familion. “Hitler venos ankaŭ ĉi tien.” Sammomente li ekploris. Nur malofte oni vidis plorantajn virojn, do mi komprenis ke la situacio estas grava.

“Ni ne havas sufiĉe da mono,” diris la pli juna el la fratinoj.

“Ree fuĝi!” kriis la avino, “estas sufiĉe nun. Ni restas ĉi tie! Postulis de mi sufiĉe da peno konstrui ĉi tion...” ŝi fingromontris ĉirkaŭen. “Vi iru do. Mi restos!”

Ŝi ĵetfermis la pordon malantaŭ si.

Konsternite la familio sidis kune. La malgrandan Esthie (Esti) ŝia onklo prenis sur siajn genuojn.

“Ni iros al Usono,” li diris, sed tiam ĉiuj ekkriis senorde. Mi kaŝe foriris.

“Nederlando estas neŭtrala,” mi ankoraŭ aŭdis krei la patrinon de Esthie.

Kiam mi estis survoje hejmen, ekfulmotondris. Mi kuris kiel eble plej rapide. Anhelante mi eniris.

“Panjo,” mi diris, “alvenos milito. Ĉu ni ne povas fuĝi al Usono?” Zorgoplena la patrino rigardis min. “Por tio oni bezonas monon, mia infano, kaj kion ni faru tie? Nu, ne estu tiel melankolia. Prenu la sakon kaj faru la aĉetojn. La pluvo jam ĉesis.”

Ekstere ĉio odoris kiel tero, kiel Patrino Tero.

2. La 10-an de majo 1940

Mirigite kaj samtempe konsternite ni fiksokulis la aerbatalon super nia kvartalo tiun dekan de majo tre frumatene. Ĉiuj najbaroj estis kungrupiĝintaj. Najbarinoj kun frizopaperaĵoj en la haroj, najbaroj en longa kalsono aŭ en piĝamo. Kelkaj estis surmetintaj jaketon super la noktovestoj. Ankoraŭ neniu komprenis kion okazas. Oni ne kredis la gravecon de la situacio, ĝis unu el la grizverdaj aviadiloj kun nigra krucsigno fumante malaperis malantaŭ la horizonton.

Maljuna viro, ankoraŭ ne tre longe loĝanta en la strato, suprenŝovis sian fenestron. Li metis la laŭtparolilon de sia radio sur la fenestrobreton. Laŭte kaj nereale sonis la voĉo de la anoncisto, kiu transdonis fremdajn kodmesaĝojn. Tiam venis deklaro de la registaro: “Nederlando invadita de la germanaj hordoj.”

En la malvarmeto de la frua mateno ni kune, silente, preskaŭ ceremonie, aŭskultis ĉi tiun abomenindan anoncon.

“Jesuo, kien ni iru?” kriis unu el la virinoj.

Plorsingultante ŝi falis en la brakojn de sia edzo.

Subite kaj surprize eksonis la voĉeto de mia frateto, kiu duonkantante vokis: “Al la bulboj!”, la kanteton de Louis Davids (Lui Davic) pri la bulbkampoj, tiutempe konatan de ĉiu en Nederlando. La korpremiteco rompiĝis kaj ĉiu ekridegis.

Ni ĉiuj ree enhejmiĝis. Mi enŝaltis la radioaparaton kaj aŭdis la timigajn informojn: pri trupkoncentriĝoj, pri perditaj pozicioj. La antaŭa trankviliga mesaĝo de la registaro: “Vi povas ekdormi trankvile. Ni gardas,” estis erariga kaj senbaze optimisma. Kelkajn tagojn antaŭe oni transdonis ĉi tiun mesaĝon al la nederlanda popolo. La certigo de la germana ambasadoro, Graf von Zech, ke se Nederlando restos neŭtrala, Germanio ne atakos, aperis esti fia mensogo.

La kvin tagoj de milito estis unu granda teruraĵo. La bombardado de Roterdamo plenis la mondon per abomeno. Estis miloj da mortintoj. Dudek kvin mil homoj fariĝis senhejmaj. Utreĥto estis minacata per sama sorto. Nederlando kapitulacis, la tankoj enruliĝis Nederlandon.

La sekvantan matenon mia patrino kun plororuĝaj okuloj rakontis, ke ŝia amiko, ŝia fianĉo, la milda Dave (Dejf), kune kun siaj filino, bofilo kaj ĉarma buklobebo Bennie (Beni), sinmortigis. La edzino de Dave mortis tri jarojn pli frue. Mi ne povis eligi eĉ unu vorton por konsoli la patrinon. Ŝiaj bluvejnaj manoj kuŝis sur la sino kaj lante la larmoj gutis malsupren.

Mi devis iri al mia laboro. Unue mi iris al la ĵurnaloficejo, kie vicoj da funebraj anoncoj rakontis pri la dramoj kiuj trafis multe da judaj familioj. Mi laboris aŭtomate tiun tagon. La sinjorino ĉe kiu mi tiam servis, estis afabla kaj ankaŭ tre silenta. Ankaŭ inter ŝiaj konatoj falis viktimoj. La filo de ŝia plej intima amikino mortis dum aerbatalo.

Reirante mi pasis Grote Markt (Ĥrote Markt). Ĉi tie regis ekscitita etoso. Ĉiuj staris laŭlonge de la trotuaro. Ĉirkaŭ la monumento de 'Loetje' (Lutje), staris centoj da homoj. ('Loetje' estas Laurens Janszoon Koster, la eltrovinto de la presarto) Subite ekestis agitado en la Grote Houtstraat (Ĥrote Houĥtstrat), la alirvojo al Grote Markt. Vibrosonante kaj knarante la unuaj germanaj tankoj altorniĝis sur Grote Markt. La Harlemano gape rigardis ĉi tiun modernan armilmaterialon. Transe mi aŭdis subite: “Heil, heil!” Grupeto da homoj bonvenigis la Germanojn per etenditaj brakoj. Oni ĵetis florojn al la 'nazioj', kiel oni nomis ilin.

“N.S.B. -kanajlaro,” murmuris voĉo malantaŭ mi. (N.S.B. = Nationaal Socialistische Beweging [Nacia Naciisma Ligo, faŝisma]) Antaŭ ni haltis ruliĝanta monstro. El la kirasturo leviĝis kapo kun timiga kasko. Fikse kaj sen rido la soldato rigardis antaŭen. Sur la flanko de la tanko estis glufiksita sango. Eble la tanko estis veturinta trans katon, sed tiu sango efikis kvazaŭ fajro je la homamaso ĉirkaŭ mi.

Granda virego ekkriegis: “Murdintoj, murdintoj!” Subite multaj partoprenis la kriegadon. La polico ekaperis. Ni ĉiuj disiris.

Deprimite mi alvenis hejmen. “La kanajloj estas ĉi tie kaj mi timas ke ili restos dum jaroj,” mi kriis al mia familio kaj al la judaj gastoj. Mi forte pugnobatis sur la tablon. Silente ni manĝis kune. Mi ekhavis aldonan parteton da viando.

La ĵurnaloj, la radio, la paroladoj..., ĉio kaŭzis ke mi trapasis la tagon silente kaj triste. “Murdintoj, murdintoj!” postsonis en mia kapo kiel tremiga signalvorto.

3. Kampadi

La milito aĝid jam unu monaton kaj la ĉiutaga vivo pluiris, kvankam kun multaj incidentoj kaj malfacilaĵoj. Sed la plaĝo ĉe Noordwijkerhout (Nordvejkraŭt) estis ankoraŭ libera kaj ni kunvenis kun kelkaj junuloj por preparoli niajn feriojn. Ni ŝatis iri al kampulo De Wit, kiu posedas malgrandan kampadejon en la ĉirkaŭaĵo de Noordwijkerhout.

Kun Lou (Lu), Greet, Jan, Bram kaj kelkaj aliaj membroj de la junularmovado TEMPO, pakaĵe ŝarĝitaj ni ekveturis bicikle. Tie, ĉe kampulo De Wit (Vit), ni estis kore bonvenigitaj kaj la rakontoj eliĝis: kiamaniere ĉiu travivis tiujn kvin milittagojn. Sinjorino De Wit rakontis plorante ke juna paro, regulaj vizitantoj kaj kunkampadantoj, pereis dum la Roterdama bombado. Ni ĉiuj kvietiĝis.

Poste dum tiu tago alvenis grupeto da Hagaj kaj Roterdamaj TEMPO-anoj. Ni ĝuis revidi nin kaj ni ŝercis reciproke. Oni ridis elkore. Joop, longkreskulaĉo el Roterdamo kondukis iomete malsame ol kutime. Plejofte li kun sia Roterdama dialekto estis enorma iniciatanto. Li kaj lia fianĉino ĉeestis iomete silentaj.

Poste, kiam ni estis kuŝiĝintaj en granda kavo kaj iomete trankviliĝantaj, Joop subite senpere ekrakontis. Pri sia timo ke la mondo pereos, pri la viktimoj de la bombardado kaj kiel li estis serĉinta sian amikino kaj finfine trovinta ŝin meze de ruboj, disflugintaj splitoj kaj dolorĝemado. Kiel ili mano-en-mane saltis kvazaŭ timigitaj ĉamoj de ruinaĵo al ruinaĵo kaj kiel ili dum la falado de fajfantaj bomboj brakuminte kuŝis en kelo, atendantaj la morton.

Longtempe li silentis kaj ankaŭ ni ne povis eligi unu vorton. Tiam li diris senenergie: “Ni naskos bebon.”

Joop havis dek ok jarojn kaj Elske dek ses. Ni diskutis pri sekseco kaj pri ĝiaj sekvoj, pri timo, pri sinŝirmado. Ĉiuj niaj antaŭaj ideoj forfalas aŭ fariĝis eblaj. Elske aĝis unu monaton pli ol mi.

Kiam post kelkaj tagoj de kampado ni ĉiuj reiris hejmen, ni aparte kore adiaŭis Joop kaj lian infanedzineton. Ni svingsalutis ĝis ili ne plu estis videblaj. Dulpintoj forprenis ilin el nia vido.

Estis nia lasta kampadekskurso. La Langerak-dunojn la Germanoj proklamis malpermesita areo. Oni konstruis tie flughavenon kun kontraŭaviadila artilerio. La familio De Wit transloĝiĝis kontraŭvole al kvartalo en Hago.

Survoje hejmen ni kantis niajn kantojn. Konvinke kaj sindone ni kantis 'De Veensoldaten', 'protestkanton' el unu el la unuaj koncentrejoj en Germanio. ('De Veensoldaten' = la Marĉsoldatoj)

Germana soldato postrigardis nin medite. Poste dum la milito ni neniam plu kuraĝos publike kanti ĉi tiun kanton, sed tiun someron la persekutadoj ankoraŭ ne komenciĝis, la timo, la celkonscia subpremado estis ankoraŭ dormetantaj.

4. La unua bombardo

Mi sentiĝis sola, malsana kaj trista. Tiun tagon mi estis sveninta en la domo de la sinjorino por kiu mi laboris. Ili estis tre bonkoraj por mi kaj mi hontis pro la sangmakuloj en la tapiŝo kaŭzitaj de mia falo. La sinjoro veturigis min hejmen per sia aŭto. Tie kuŝis letereto sur la tablo. La patrino devis iri al grava kunveno. La terpomoj kaj la legomoj troviĝis jam senŝeligitaj kaj purigitaj en la kuirejo.

“Multajn kisojn por vi. Panjo.”

Mi dankis la sinjoron pro la hejmenigo kaj eniris la ĉambron, kie eĉ la horloĝo tiktakis tro laŭte. Mi senvestigis min kaj kuŝiĝis sur mian liton. Larmoj pro memkompato pikis malantaŭ miaj okuloj. Senpere mi svenis! Mi havis ŝvelintan vizaĝon kaj ĉio doloris min kaj nun neniu estis hejme por maltrankviliĝi pri mi aŭ por prizorgi min. Mi endormiĝis maltrankvile. Kiam mi vekigis, mia patrino sidis apud mia lito.

“Kiel vi fartas, Kiki?” ŝi demandis. Kiki estis mia karesnomo.

Mirigite mi memoris ke mi estis sveninta.

“Ho,” mi diris firme, “mi fartas bone! Ne maltrankviliĝu, estas nenio!” Mi ellitiĝis kaj vidis subite ke mia patrino aspektas tiel stranga.

“Ĉu vi vere estis en la kunveno? Panjo, vi ploris,” mi balbutis.

“Jes, karulino. La patrino de Gonnie estas mortanta kaj mi promesis al ŝi ke ŝi povos pasigi siajn lastajn vivtagojn ĉi tie, en nia domo.”

Konsternite mi fiksrigardis ŝin: “Sed mi timas tion, mi volas diri, mi opinias la morton tiel harstariga.”

“Jes,” ŝi diris, “sed neniu povas prizorgi ŝin kiam Siem devas labori la tutan tagon. Mi promesas al vi, ke nenio harstariga okazos ĉi tie. Por iuj homoj la morto estas la fino de doloro, de timo, de senfina sufero. Ni provu helpi ŝin kiel eble plej bone, Truus. Ankaŭ Gonnie venos ĉi tien, ŝi havas nur dek du jarojn. Ĉu vi helpos min teni la etoson por ŝi agrabla kaj senstreĉa ĉi tie?”

“Mi ja helpos vin,” mi respondis kaj demandis min maltrankvile kiamaniere fari tion.

Tiun nokton fajfantaj bomboj nin vekis. Vibrosonante ili trafis, je ne pli ol ducentmetra distanco de ni. Mi saltellitiĝis por veki mian familion, sed anstataŭ helpi ilin mi tuj ree svenis. La timo kiun mia malfeliĉa familio havis por transporti min al sekura loko, estis certe tre granda.

Proksimume dudek kvar mortintoj kaj dekoj da vunditoj estis la trista bilanco kiun oni povis fari post tagoj.

En la bombita strato mi estis loĝinta dum jaroj. Kun gorgo kunpremita mi trairis mian antaŭan kvartalon. Tie estis loĝinta la familio Hartman kaj tie la familio De Wit. Ĉiuj pereis. Vespere ni legis la nomojn en la ĵurnalo. Ĉiu sciis ke germana bombaviadilo faligis sian ŝarĝon sur nian urbon, sed en la ĵurnalo, protektata de la Germanoj, oni skribis ke la amikoj de Nederlando, la 'Tommies' senaverte bombis Harlemon. ('Tommies' = anglaj soldatoj) lu ĵurnalisto skribis indigne ke la aŭtoritatoj eraras, la bomboj estis de germana aviadilo. Estis dekoj da ĉeestantoj. La ĵurnaliston oni arestis.

Iom post iom la homoj konvinkiĝis ke la germana registaro ne faras tro skrupulajn konsiderojn koncerne la veron. Pli malbone, honestajn civitanojn oni arestis. Nederlando lernis paŝon post paŝo, vorton post vorto, kion signifas suferi okupacion.

Nelonge post la bombado Gonnie kaj ŝia patrino ekloĝis ĉe ni. Granda Gon mortis, multe tro juna. Malgranda Gon estis rigardanta per siaj grandaj grizaj okuloj al la kondolencantaj amikoj kaj najbaroj. Ŝi ne ploris sed ŝi aspektis tre pala. Mi provis helpi kiel mi promesis al la patrino kaj mi disdonis kafon, teon kaj bulkojn. Fariĝis preskaŭ komforte, mi opiniis, ĝis mi ree vidis la palan vizaĝeton.

5. La agado de Koevoet (kufut)

Nia disvastigo de la gazeto 'de Vonk' (Fonk), poste ankaŭ 'De Waarheid' (Varhejt), la surgluado de alvokoj al sabotado kaj pli da tiaj laboraĵoj alportis nin al Kees Boekman (Kejs Bukman).

Kees, edziĝinta viro kaj patro de du malgrandaj knaboj, estis gvidanta kontraŭfaŝisto. Kune kun aliaj el la junularmovado li fondis la kontraŭ-nazian junulargazeton Koevoet. ('koevoet' = levilo)

Ni havis komfortajn kaj gajajn kunvenojn en la loĝejo de Kees. Ni povis enlitigi la etulojn kune kun la edzino Bep. Mi ĝuis tie la etoson kaj la belan ĉirkaŭaĵon.

“Knaboj kaj knabinoj,” sciigis Kees iun vesperon, “Morgaŭ vespere ni ĝenos la paroladon de Mussert en De Hout (Haŭt).” ('Hout' = la suda arbaro) Helpe de amika elektristo, Wim prizorgos tenaĵojn, per kiuj ni povos tratondi la mikrofontratojn.

Jam matene ni ekiris por alvoki junulojn de la mezgrada lernejo veni al la manifestacio kie la malgranda Mussert estos alparolonta la popolon. Ni ankoraŭ ne malkaŝis kion ni intencas.

Vespere, antaŭ la komenco, multaj knaboj kaj knabinoj el Harlemono estis svarmantaj tie. La plej multaj venis per biciklo, kiel ni petis. Mirigite la W.A.-anoj kaj adeptoj de la 'nigraĉemizuloj' alrigardis la ĉeeston de tiom da junuloj. ('W.A.' = Weerbaarheids Afdeling: Defendkapabla Taĉmento) Kiam post la unuaj festaj sonoj de la fanfaristaro Mussert iris al la katedro, venis por ni la signo al agado. Ni ordonis la junulojn tintigi la biciklo-tintilojn tuj kiam oni donos la signon por tio.

Subridante la plimulto transprenis nian signalvorton. Jan kaj Bram tratondis la dratojn kaj malaperis. Estis komike, vidi tiun ekscititan 'gvidanteton' kriegi sensone. Ĉiuj ridegis. La tintiloj sonis gaje kaj senĉese.

Tiam intervenis la W.A. Ili terenbatis dekkvarjaran knabon kaj trioje ili piedbatrompis lian biciklon. Iu lerneĵano estis enbatita en malsanulejon. Ni provis protekti kaj forkonduki el la miksbatalo la plej junajn inter ni.

La mitingo ĉesis antaŭtempe. Anton Mussert ne povis plenumi sian venenan paroladon.

“Nu, tiu povas ĉagrenaĉe rampi malantaŭ la postajojn de sia onklino,” kriis alta knaba voĉo.

Mussert estis edziniginta sian onklinon.

6. Februara striko

Rinus Hoebeke (hubeke), la terpomvendisto, granda kaj forta virego, metis keston da terpomoj sur la kuirejstablono.

“Kie estas via patrino?”

Mi ŝultrotiris: “Eble ŝi butikumas, mi pensas,” kaj mi prenis la monujon por pagi al Rinus.

“Ne, estas bone tiel, mi atendas momenton...,” li diris kaj li rulfaris cigaredon. Estis ankoraŭ frue kaj feliĉe mia patrino hejmvonis post nelonge.

“Hej, Rinus,” ŝi diris, vidante lin, “kiel frue vi estas!”

“Truus, jen la pamfletoj, la granda alvoko por striki kontraŭ la nazioj,” li kriis ekscitite. De sube el la kesto kun terpomoj li prenis pakon da papero. La eksteran, malpuran paperon li forĵetis en la brulantan fornon.

La patrino atente legis la stencilaĵon: “Ĉu tio sukcesos, vi pensas?” ŝi demandis maltrankvile al Rinus.

“Knabino, tiuj sanghundoj scios, ke ekzistas NI!”

Energie li estingis la cigaredstumpon.

“Jen, ni planis tiamaniere, se vi okupos vin pri la laborejoj sur la Zijlsingel (Zeijlsingl) kaj la remizo kaj poste la ŝtrumpofabriko de Hin, vi faros bonan laboron. Ni aktivigis ĉie niajn homojn. Speciale en la kajstratoj de Spaarne (Sparne-Kanalo) multa laboro estas farenda por la tiea grupo. Sed se vi kun la knabinoj kaj kelkaj aliaj junuloj zorgos pri tiuj fabriketoj, ni jam ege progresos.”

Li butonumis sian mantelon.

“Bonŝancon kaj... ne lasu vin kapti.”

Li malaperis. Per la lastaj vortoj li aludis la policon, kiu pli kaj pli kunlaboris kun la Germanoj, escepte de la bonuloj.

Kun Jan Heusdens (heŭsd'ns), Wim Groenendaal (grun'ndal) kaj Brammetje van Geens (fan gejns) ni disdonis la pamfletojn “Striku, striku!” La rezulto de nia agado ne estis samampleksa kiel en Amsterdamo, sed la spirito por kontraŭi la naziojn ĉeestis abunde.

La patrino ekiris kun kelkaj virinoj el la Lejdena kvartalo. Ankaŭ la sepjara Robbie kuniris. Ĉe Kerko oni havis grandan rezulton, eĉ la ĉefoj kaj ĉefinoj kuniris eksteren.

La streĉiteco inter la kamaradoj, ĉu ankaŭ Hoogovens kunstrikos, estis granda. Kees de Rover kaj lia edzino Cor biciklis de adreso al adreso.

Posttagmeze mi scivolis kia estas la situacio en Amsterdamo.

Kune kun kelkaj aliaj mi biciklis tien. La striko estis ĝenerala. Ankoraŭ nun mi bone memoras viron, starantan sur kesto, meze de granda amaso da homoj. Kion li precize diris mi ne aŭdis sed eksonadis huraoj.

Ĉie promenis grandaj grupoj da homoj, sur la stratoj kaj la placoj oni vigle diskutis. Amsterdamo strikis. Mi helpis viron ĵeti multajn pamfletojn en la leterkestojn de la domoj kaj disvastigi ilin inter la preterpasantoj.

Frapis min, ke mi preskaŭ ne vidas naziojn. Verdire tiu silento ne plaĉis al mi.

“Atentu, homoj,” mi kriis. Sed pro la mirigitaj kaj iomete mokantaj vizaĝoj mi ja komprenis ke mi ne havas influon ĉi tie. Mi estis tiel juna kaj ankaŭ nur knabino...

Subite alvenis motorcikloj kun kromĉaroj. Ni estis preskaŭ piedpremataj de la kuranta amaso.

Laca pro la biciklado mi venis hejmen vespere. La patrino estis maltrankvila. Kun Freddie kaj Rob ŝi estis disdoninta kaj disvastiginta ĉiujn alvokojn.

Post kelkaj tagoj la striko estis sange rompita. Sekvis centoj da arestadoj. Fiere ni aŭdis radion Oranje kaj poste ankaŭ radion Moskvo menci la februarstrikon.

La ĉiam pli impertinentiĝanta subpremado, la forkondukado kaj humiligado de niaj judaj samlandanoj, tiuj estis la instigaj okazaĵoj al ĉi tiu unika striko en okupita Eŭropo.

Hejme ni bone ordigis ĉion. Ne plu kupro, ne plu radioaparato, ne plu revoluciaj libroj en la domo.

Streĉite ni atendis la kontraŭbaton de la ungego de la nazibesto. Nian domon ĝi ankoraŭ lasis trankvila, sed ĉie sekvis la arestadoj.

Momenton la Nederlandanoj regis en la stratoj de Amsterdamo kaj en la Zaan-regiono kaj Holando apartenis al la Holandanoj.

7. La sinkaŝanto

Estis vendredvespero kaj mia fratino kaj mi ekŝaltis la lumon kaj malestingis la kandelojn por niaj judaj gastoj, kiuj alvenis antaŭ unu semajno. Jerrit estis granda, larĝaŝultra viro kun bela, melankolia vizaĝo. Nigra barbo ŝajnis lin pli aĝa ol li estis. Li portis judan ĉapon kiu similis festĉapon. Mia fratino ekhavis jukridon pro tio. Mi forsendis ŝin kun iu preteksto kaj ŝi foriris ŝultroskue.

La edzino de Jerrit, Hannah, estis malgranda kaj malbela. Plej ofte ŝi portis strangan ĉapelon. Ĉi-foje ŝi estis demetinta ĝin kaj oni povis klare vidi ke ŝi portas perukon. Panjo estis instruinta nin kiel diri 'gut shabbes' kaj estis amuze rimarki ke ili mienas mirigite ĝoje. Mi ricevis pecon da bongustega kuko por dividi inter ni ĉiuj ĉe la kafotrinkado.

Jam dum jaroj ni havis sinkaŝantojn en nia domo. Nun mi devis cedi mian ĉambreton, ĉar ĉiuj tiuj judaj familioj devis esti loĝigitaj. Estis 1941 kaj la geedzoj Jerrit, sinjorino Frank kaj ŝia filo, sinjorino Kaufmann kun ŝiaj du filetoj - ĉiuj tiuj homoj loĝis en nia domo. Panjo, Robbie, Freddie kaj mi dormis nun en unu ĉambro. Estis ja hejmece havi tiom da homoj en la domo. Pro tio ke ili manĝis 'koŝere', la servo kaj la manĝaĵo estis alportataj de kelkaj sinjorinoj de komitato por helpo al fuĝintaj germanaj kaj polaj judoj.

Inter si ĉi tiuj homoj parolis jide. En la junularmovado mi lernis de iu Ivan jidan dolorkanton, kiun mi kun Freddie entuziasme kantis. Ni estis skribintaj la vortojn fonetike kaj ni kantis ĝin fiere. Ĝis ni rimarkis ke la judaj familioj ne povas reteni sian ridegon. Verŝajne nia prononcado tamen ne estis tiel bonega!

Super niaj kapoj ni aŭdis la basan voĉon de Jerrit kaj la malfortan voĉon de lia edzino kantantaj la preĝojn. Ni ĵus ludis domenon. Mia malgranda frateto havis permeson ne enlitiĝi kelktempe por kunludi. La sabato donis ankaŭ al nia familio iom da hejmeca tradicio.

Subite oni sonorigis. Mia patrino rigidiĝis kaj ĉirkaŭrigardis ĉu io malpermesita de la nazioj troviĝas en la ĉambro. Ŝi iris por malfermi la pordon kaj ni postrestis streĉitaj. Subite granda viro staris en la ĉambro. Malantaŭ li staris alia viro, sed ĉi tiu ŝajnis tima kaj apenaŭ salutis.

“Ĉi tie ĉe miaj infanoj vi povas diri ĉion,” diris la patrino, “ili estas miaj kamaradoj kaj ili scias ke paroli povas esti danĝere.”

Netrankvile kaj sinĝene la granda viro restis staranta en la ĉambro kaj ekraportis. La viro malantaŭ li, Arie, estas serĉata kaj mia patrino devas prizorgi sinkaŝ-adreson. Post multe da interparolado oni decidis ke mi konduku lin al domo en la urba centro de Harlemo. La granda viro eksplikis al mi, ke estas tre grave bone atenti, ĉu oni sekvas nin.

Mi vestis min kaj ni ekiris. Nia instrukcio estis, ke ni trairu la urbon brako-en-brake. Timema mi brakplektis al Arie. Ĉe ĉiu paŝo ni kunpuŝiĝis iomete. Per kelkaj interpaŝetoj tio estis korektita. Timida kaj ŝvita pro mizero mi ne ĉirkaŭrigardis. Ĝis mi memoris mian komision. Mi postrigardis trans mian ŝultron kaj terurite vidis viron sekvantan nin je kelkmetra distanco.

“Kuru,” mi kriegis al mia kuniranto. Ni kuris al la stratangulo. Transe de la strato mi vidis trairejon inter domblokoj. Mano-en-mane ni iris tien. Ree mi postrigardis sed mi ne plu vidis la viron. Tamen ni daŭre kuris. En trairejon, el strateto, tra alia vojeto. Mia dorsflanko ekdoloris kaj mi malpli rapidis. Mi ne plu havis spiron por diri al Arie ke mi

devas sidiĝi. La ŝvito ŝutfluis de mi, mia torako ŝajnis krevi kaj mia vizaĝo ardis. Arie fajfante spiris. Subite li prenis mian manon kaj kisis ĝin. Mi retiris la manon tuj, sinĝena kaj timigita. Ĉu li volus...? mi pensis kaj diris: "Nu, ni pluiru."

Atente ni ĉirkaŭrigardis al eventualaj persekutantoj. Finfine ni alvenis sur la adreson kiun ni ekhavis.

Mi sonorigis unufoje longe kaj dufoje mallonge. Feliĉe oni malfermis la pordon.

"Jen estas Arie," mi diris, "la longulo sendis min ĉi tien. Ĉu li povas resti ĉi tie?"

Timplena mi rigardis de la virino al la viro. Ili estis simplaj mezklasuloj. Ili loĝis super sia butiketo, kie radioaparatoj kaj gramofonoj estis riparataj.

"La longulo mem venos por ordigi ĉion," mi diris.

Mi ne kuraĝis rigardi al la mizera Arie, kiu kun la brakoj laŭlonge de la korpo estis aŭdanta niajn intertraktojn.

"Estas bone," diris la viro afable. "Filino de Truus, ĉu ne?"

"Vi ja ne rajtas paroli pri tio," mi reagis mirigite kaj iomete indigne.

"Bone, bone," diris la viro kaj ridante puŝis min al la pordo.

"Saluton, Arie, ĉion plej bonan," mi diris kaj kun la plej ruĝa kapo de la mondo: "Saluton, sinjorino, saluton, sinjoro, kaj... dankon..."

Ekstere mi ree atente ĉirkaŭrigardis. Nenie perfiduloj.

"Ĉu iris bone?" demandis la patrino malferminte la pordon. "Ho jes," mi mensogis, "bonege, kaj la homoj estis tre afablaj."

Post duona jaro ili ĉiuj estis arestitaj kaj neniam revenis. Pri Arie ni sciigis ke li saltis el la trajno sed ne postvivis la falon.

Kiam la mesaĝisto de la longulo rakontis al ni ĉi tion, mi ree sentis la kison pro dankemo de la sinkaŝanto Arie.

8. Konatiĝo kun Frans

Freddie troviĝis en la antaŭa ĉambro kiam oni sonorigis. Mi aŭdis la patrinon iri tra la koridoro al la antaŭpordo. Post momento envenis mia fratino rideksplodanta tra la glitpordoj en la ĉambron. Panjo estis ĉiam parolanta ĉe la pordo.

“Ho, Truus, estas filmstelulo ĉeporde kaj li diras ke li venas por ni. Mi mem aŭdis tion!”

“Ne afektu tiel stulte, knabino,” mi diris indigne, sciante ke mi estas du jarojn pli aĝa ol ŝi, “vi ja ŝajnas dekjara.”

“Pff, sed ne iu okdekjara avino, kiel vi,” ŝi spritrespondis.

La ĉambropordo malfermiĝis kaj ni staris vid-al-vide kun sinjoro vestita en deca griza kostumo. Li demetis sian ĉapelon, donis la manon al ni kaj fikso kulis nin longtempe. Mi sentis kvazaŭ mia ruĝiĝo devenas el mia umbiliko kaj suprenrampas ĝis miaj harradikoj.

Li rakontis ke li nomiĝas Frans, estas sendita de iu konato de ni kaj ke li estas okupanta kunmeti rezistarmeon.

“Nu, bonvolu sidiĝi,” diris Freddie. La patrino ĵetis zorgan rigardon al ni kaj forlasis la ĉambron. Frans prenis malbonŝance nian plej malbonan seĝon, tiun kun nefiksita risorto. Mi volis interveni kaj oferi pli bonan seĝon, sed unu rigardo de Freddie sufiĉis. Li ekvidis kaj verŝajne lia estonta rolo de kontraŭleĝa gvidanto malpermesis al li aperigi la malkomforton.

“Per la partio ni eksciis jam multon pri vi, pro tio ni scias ke vi ne estas tre timemaj,” diris Frans. “Nun mi volas fari seriozan demandon al vi: ĉu vi pretus aliĝi ĉi tiun armeon? Ni organizos ĝin same kiel la Rusaj Partizanoj. Tio signifas ke ni kontraŭbatalos la naziojn per sabotado kaj armiloj. Tio ankaŭ signifas ke mi devas antaŭe demandi, ĉu vi povas kaj volas silenti pri ĉi tio al aliaj, ankaŭ al via patrino.”

Ni kapjesis.

Frans daŭrigis: “Ni devos ŝteli la armilojn de la nazio mem, ni ankaŭ estos devigataj pafi kelkfoje. Ni devos eksplodigi pontojn, fervojliniojn kaj municitrajnojn. Vi devos lerni manipuli pafilon, ĵeti mangrenadojn kaj meti bombon.”

Li silentis kaj rigardis al ni, unu post la alia, ekbruligis cigaredon kaj tiam demandis subite: “Ĉu vi povus mortpafi iun?”

Mi ektimis. Li demandis min kaj mi ne tuj sciis kion respondi. Fariĝi partizano estis ankoraŭ tolereble, sed mortpafi...?

“Mi ankoraŭ neniam faris tion,” diris Freddie sufiĉe superflue, rigardante al siaj manoj.

Singarde mi diris: “Nu, kiam temas pri vera faŝisto, kanajlo kiu arestas kaj mortpafas homojn, nu jes, se vere necesas... Sed ĉu oni ne devas lerni tion? Kaj kiel oni povas scii ke iu estas kanajlo? Ja ne ĉiuj germanaj soldatoj estas nazioj?”

Mi estis leviĝinta, ĉar subite mi memoris la enmigrintojn kaj fuĝintojn.

“Ne,” diris Frans iomete senpacience, “kiam ni decidis mortpafi, koncernas Gestapo-viron aŭ perfidulon. (‘Gestapo’ = sekreta ŝtatpolico) Ĉu vi memoras la mortpafadon de la unua grupo da homoj ribelintaj kontraŭ la nazioj? Nu, ili tamen ne estis sufiĉe singardaj. Ie devis troviĝi perfidulo. Kaj tiajn kanajlojn ni devas mortpafi! La nazioj fariĝos ĉiam pli krudaj. Laŭ sia kutimo ili jam estis tro afablaj por la

Nederlandanoj. Pli kaj pli ili limigos nian liberecon. Ĉiun tagon novaj malpermesoj kaj ordonoj. Ĉiun tagon malpli da manĝaĵoj kaj vestaĵoj. Ni sciigu ilin ke oni ne povas primoki la Holandanojn.”

Ni kapjesis konsente; tio estis lingvaĵo kiun ni legis kaj aŭdis pli ofte.

“Ĉu ni partoprenu, Truus?” demandis Freddie ekscitite. “Hm, Frans, kaj pri tiu mortpafado kaj tiel plu, nu, ni prikonsideros tion. Ĉu ne?” Ŝi demandis, rigardante al mi.

“Jes,” mi diris, “eble ni ne kapablas fari tion.”

“Vi pripensu bone. Post akcepto en la grupon vi ne plu povas retiriĝi, ĉar tio estas tro danĝera,” diris Frans. “En Sovetio knabinoj kaj virinoj batalas kune kontraŭ la hitlerbanditoj. Mi supozas, ke ankaŭ la nederlandaj knabinoj kapablas je tio. Cetere ili ne tiras la atenton, ĉar neniu, ankaŭ ne la nazio, atendas ion tian.”

Ree ni kapjesis.

Kun doloresprima mieno Frans stariĝis kaj provis nerimarkite froti sian postaĵon. Ni elakompanis lin. Li levis la ĉapelon por la patrino.

“Post du tagoj mi revenos por la rezulto,” li flustris kaj ni fermis la pordon malantaŭ li.

“Kion li deziris?” demandis la patrino.

“Ho, li demandis nin fari ion kontraŭ la nazio, kion nur knabinoj povas fari, ne tre danĝere kaj ne okulfrape,” mi diris iomete tro emfaze kaj sufiĉe nevere. Freddie postrigardis Frans.

“Panjo, kia estas via opinio pri li?” ŝi demandis.

La patrino fingre frotis sian nazon, konata gesto kiam ŝi ne estis certa.

“Mi lasas vin liberaj por fari kontraŭ la nazioj, kion vi opinias vere bona. Estu tre singardaj kaj en danĝero neniam forlasu unu la alian. Mi ne povus malhavi vin.” Ŝi ĉirkaŭbrakis nin. “Sed morgaŭ mi demandos la kamaradojn, kiu estas tiu viro kaj ĉu li estas vere fidinda. Mi esperas ke vi neniam faros ion malmoralan aŭ ion kontraŭ via konvinko. Restu ĉiam en ĉiaj cirkonstancoj hominfanoj, knabinoj de mi! Ĉu mi flaras kafon? Truus, mi petas enverŝu.”

Ni eksidis ĉirkaŭ la tablon.

9. La testo

“Hodiaŭvespere vi povas pruvi kiuj vi estas, ĉu vi havas kuraĝon en la korpo, ĉu vi taŭgas por ĉi tiu laboro.”

La vortoj de Frans pendis kiel plumbaj dratoj en mia pensado. “Kio do estas kuraĝo,” mi pensis. “Oni nur faras sian eblon kaj klopodas mem ne perej.” Mi havis la malprecizan senton ne esti certa ĉu nia decido aliĝi al la grupo de Frans estis ĝusta. De Rinus ni sciigis ke la knabo ja estas taŭga kiel gvidanto.

“Mi ne scias precize de kie li estas, sed li estas bona, kredu min,” li estis dirinta.

Kiam Freddie surmetis sian mantelon kaj mi trompkaŝeme deŝiris la varman krusteton el la ĵusbakita pano kaj plenbuŝe murmuris 'ke nun venos la ĉefa afero', mia decido estis sufiĉe certa. Hodiaŭvespere mi montros al la filmstelulo ke mi vere ne estas timema.

“Se ni ne tuj devos pafi,” finis Freddie miajn neelparolitajn pensojn.

“Sed unu afero estas certa,” mi diris laŭte. “Ni neniam perfidos, kaj oni devus esti diable lerta por povi malfermi mian buŝon se mi estos kaptita.”

“Nu, sed, se oni torturus vin, aŭ se oni minacus pafmortigi vian familion, kion vi faros?” kriis Fred.

“Silentu iomete, ĉu vi volas ke la perfiduloj aŭdas vin?” mi diris mallaŭte. Ni silentis, ĝis ni alvenis ĉe la domo kun la blankaj statuoj. Ni devis iri malantaŭ tiun domon. Ĝi estis monumenta konstruaĵo kun blankaj statuoj. La statuoj estis sfinksoj el blanka marmoro. Belega arbaro, privata tereno, ĉirkaŭis la tuton. Tenante la biciklojn mane ni promenis sur flankvojeteto preter la ŝildon: ‘Eniro malpermesita.’

Ju pli ni pluiris des pli silente fariĝis ĉirkaŭ ni.

“Harstarige, ĉu ne, Truus,” flustris Freddie.

“Ie ĉi tie devas esti la lageto,” mi diris mallaŭte.

“Nu, sinjorinoj,” sonis subite la voĉo de Frans.

“Diable, mi ege ektimas,” balbutis Freddie.

“Ĉu vi timas?” demandis Frans. Ni ne juĝis lin respondinda.

“Nu, diru,” mi diris tamen iomete incitite, “kion ni faru?”

“Unue sidiĝu,” ordonis Frans, “tio faciligas la paroladon.”

Ni sidiĝis sur verdkovritan ŝtonan benkon kaj rigardis al la lageto aŭ kio iam estis tio. Nun ĝi estis surkreskiĝita nigra marĉo. De tempo al tempo obtuza kvaksono montris la direkton kie troviĝis rano.

“Nu, tiu eble estas mamnutrita de sia avo,” mi ŝercis, “ĝia voĉeto estas iomete basa.”

Sed la aliaj ne ridis.

Frans rakontis iom pri la rezistgrupo kaj pri la laboro farata en tiu grupo.

“Diru, ĉu vi ne povas doni al mi la adreson de Karel Mok?” demandis Frans subite.

Ni rigidiĝis.

“Kial?” mi demandis malvarmete, ĉar la mencio de adresoj, estis la plej lasta pri kio rezistmovadano aŭ -ino pensus.

Karel estis judo kiu tamen faris iom da laboro por la kontraŭleĝa K.P. , kvankam li ne partoprenis en la ĉiutaga irado de la aferoj. Li konsciis treege ke li kiel judo kaj komunisto riskas duoble.

Freddie kaj mi preteratentis la demandon kaj ni rifuzis mencii la adreson de Karel. Tiu Karel tute ne estis amiko de ni. Verdire mi eĉ malŝatis la viron. Sed adreso kiun oni scias - pri tio oni ne parolas, eĉ ne kun la patrino.

Subite Frans elpoŝigis revolveron. “Donu tiun adreson kaj tuj,” li kruddiris. Senvorte ni alrigardis lin.

“Vi estas ruztrompitaj,” li diris krude, “mi estas de la Gestapo, jen miaj dokumentoj.” Li montris al ni ujon kun diversaj dokumentoj kun grandaj germanaj stampoj kaj svastikoj.

“Kia kanajlo,” mi elfaligis. Iom post iom enpenetris min la abomeninda situacio. Cetere, ankaŭ Freddie ne bezonis dudek vortojn por kompreni nian senesperan kaj timigan situacion en ĉi tiu arbaro. Frans direktis la pistolon al Freddie.

“Montru tiun dokumenton al mi ankoraŭfoje?” mi demandis por ekhavi prokraston.

Aperigante la dokumentojn li ne atentis unu momenton kaj neatendite mi piedbatis lian manradikon. Kiel risorto mia fratino saltis al lia gorĝo.

Ni batalis kiel leoninoj, spiregante, gratante, pugnopuŝante kaj batante.

La revolveron mi piedbatis foren.

“Haltu, haltu, ne faru,” kriis Frans, “estas testo, vere, estas testo!”

Fulmrapide mi levprenis la revolveron kaj metis ĝin sur lian tempion, dum Freddie sidis sur lia korpo kaj prilaboris lin per sia ŝuo.

“Ĝi ne estas ŝargita,” ekkriis Frans. Sango fluis el lia nazo, lia lipo estis ŝirita; la bluan okulon ni rimarkis post du tagoj.

“Kia kanajlo vi estas,” mi kriis denove.

“Jes, pardonu min, mi petas,” li diris timide. “Estis ordono testi vian fidindecon...”

“Nu, ĉu vi estas kontenta?” demandis Freddie akre. Ŝia bluzo estis ŝirita, la ŝurimeno rompita, ŝia genuo sangis kaj ŝia fingro estis kontuzita.

“Kiamaniere mi iam povos kompensi ĝin, amikoj?” elvokis Frans. “Ha, kiel vi aspektas.” Tiam mi sentis ke ĉio doloras min. La revolveron mi metis en mian poŝon. Kolerege mi kraĉis sur la etenditan manon de Frans.

Ne lamante, kvankam vere estis kialo por tio, Freddie kaj mi eliris fiere el la arbaro.

Ni trapasis la ekzamenon tre kontentige!

10. Printempo 1942

Pro tio ke ni ne havis veran stabejon, Frans kunigis nin en Kenau-parko. Tiutempe oni ankoraŭ ne malpermesis kunstari plurope. Malpermeso kolektiĝi estis proklamota poste, en 1943.

Freddie kaj malgranda Jan kvazaŭbatalis iomete. Wim, Frans kaj mi tre serioze preparolis nian armadon. Nia grupo posedis unu revolveron, kiu aspektis kvazaŭ el la epoko kiam la kaninefatoj transiris nian limon (kaninefatoj = praloĝantoj en la Roma Epoko). Tiu objekto estis elfosita en la ĝardeno de bona patrioto, oficiro de la nederlanda armeo. Ni ĉiuj timegis ke la objekto malŝargiĝos kaj ke ni mem ricevos la pecojn sur la kapon.

“Geamikoj,” diris Frans solene, “jes, ankaŭ vi,” al Freddie kaj Jan. “Oni disponigis al ni novan armilmaterialon.”

Ni ne volis tiri la atenton sur nin, tial ni ne kuraĝis huravoki. Ni kapjesis surprizite kaj estis ravitaj. Tiu Frans, ni ĉiuj opiniis, estas tamen bonega komandanto.

“Jes, amikoj,” li daŭrigis, “mi ekhavis de konato bat- kaj pikarmilojn. Eĉ vera malaja ponardo kaj bajoneto estas inter ĝi.”

Ni ĉiuj silentis.

“Ĉu ni devos piki per ĝi...?” demandis Jan. Pro pura nervozo lia Roterdama prononcmankado estis pli bone rekonebla ol normale.

Wim rigardis al Frans. Liaj okuloj estis grandaj kaj mirigitaj.

“Vi estas freneza, Frans!” kriegis Freddie. “Kiel mi faru tion?” Ŝi okulmezuris siajn malgrandajn manojn. Ni ĉiuj rigardis ŝin, starantan tie, kun etenditaj manoj.

“Ege freneze, viro,” diris Wim trankvile, “nenio por nia speco de homoj. Mi opinias pafi jam malagrabla, do tiom pli ĉi tion.”

“Aŭskultu foje,” diris incitite Frans kaj elpinĉis sian cigaredon inter polekso kaj montra fingro.

“Vi povas uzi ĝin kiel minacarmilon kaj tiamaniere forpreni la armilon de nazio. Kaj cetere,” li fingromontris al kapobatilo, “ĉi tiu estas nur por bati iun senkonscia.”

En tiu momento kelkaj homoj proksimiĝis. Momenton ni devis agi malstreĉate. Frans tuj alprenis la rolon de sportgvidanto: “Geknaboj, venu ĉi tien venontan dimanĉon en sportvestaĵo. La kurado iros laŭ la kanaloj kaj la rivero Spaarne. Poste revenu ĉi tien. Mi esploros ĉu ĉiu estas informita.” Kontenta li ĉirkaŭrigardis al nia grupeto.

La preterirantoj eĉ ne vidis nin. Frans prenis du paketojn el la flanksakoj de sia biciklo.

“Jen, unu por Jan, unu por Wim,” li diris. “Vi aliru po du. Freddie iros kun Wim kaj ankaŭ vi iros duope.” Li montris malzorge al Jan kaj mi.

“Ĉe la stacidomo vi atendu oficiron kiu havas ĉi tiun signeton sur sia uniformjako.” Li montris al ni la S.S.-signon.

“Vi sekvos lin ĝis vi alvenos sur silentan lokon. Tiam Jan aŭ Wim piku kaj vi forprenu lian pistolon.”

Daŭris iom da tempo, antaŭ ol unu el ni povis paroli. Freddie estis la unua: “Ĉu vi vidas, li estas freneza,” ŝi diris. Ŝi kapneis komplete. Frans gestis, ke plua diskutado ne eblas.

“Ekiru kaj montru ke oni ne povas fortimigi vin,” li kriis.

“Damne, tiu virego opinias tion nur tre facila,” diris Jan kaj abomene rigardis la malajan ponardon, troviĝantan kiel harstariga vipuro en la papero.

“Li legis tro multe da vakerlibroj,” mi konsentis.

Tamen ni ekiris tiun vesperon. Wim ne povis kuniri. Li devis kolekti monon por la eklezia sekto kies ano li estis. Ni postrigardis lin admire. Wim en deca nigra kostumo. Wim estis sinjoro! Malkomforte pro la bela kostumo Wim foriris.

Freddie esploris la vojon laŭ kiu ni devos iri.

“Antaŭen, Winnetou (Vinetu)!” (‘Winnetou’ = populara heroo el indianlibroj de Karl May) ŝi kriis mokante al malgranda Jan, kiu indigne rediris: “Zorgu nur ke vi ne kurperdu la kruojn de la postaĵo, kiam ni devos agi, katino!” Arogante ŝi foriris tenante la biciklon mane.

Ŝvitante pro mizero ni sekvis la nazian oficiron iom poste. Ni estis tiel proksimaj ke mi flaris lian ŝviton. Aŭ, ĉu estis tiuodoro de Jan aŭ de mi mem?

En unu momento de ‘nun aŭ neniam’, Jan prenis la malajan ponardon el sia jako. Li kaŝiris en la direkton de la oficiro. Mi kunpremis la okulojn. Sed mi sentis ke post momento li ree estis apud mi.

“Mi damne rifuzas eterne. Mi vere ne povas fari tion,” li diris malfeliĉega. Ankaŭ Freddie alvenis samtempe.

“Ne faru ĝin, Jan. Ni ne estas sufiĉe krudaj por ĉi tio,” ŝi diris kaj ŝi tremis videble. Ĝis tiu momento mi estis silenta. La ektimo pri tio kion ni preskaŭ faris, superregis min.

“Se tiu kanajlo estus atakinta nin, ĉio estus diferenca, sed mi vere ne povas fari tion senpere, geknaboj,” mi diris tremetvoĉe.

Neatendite mia fratino ride kriis.

“Nasi goreng, nazi goor kreng,” (‘nasi goreng’ = konata indonezia riz-manĝaĵo - ‘nazi goor kreng’ = nazio malfreŝa kadavro [vortludo]) ŝi kriis inter siaj ridoj. Ankaŭ Jan kaj mi ridis tordiĝe.

Malfrue tiun vesperon ni redonis la malajan ponardon al Frans, kiu saĝe silentis, vidante niajn vizaĝojn.

“Jes,” li diris medite, “ni devos serĉi aliajn manierojn por ekhavi armilojn.”

“Ne tro bagateligu ĝin sekvontfoje, Frans,” mi diris ŝajn-indiferente. “Ĉar vi sciu, ni ja ne estas S.S.-anoj.”

Mi ne atendis lian respondon. Antaŭ ol li povis reagi, mi jam estis ekstere. Poste li rakontis al mi, ke li neniel kredis ke ni plenumos la taskon.

11. Wiesje kaj Frits

“Ĉi tiu knabino havas dek jarojn kaj ŝi nomiĝas verdire Rebecca (Rebeka), sed dum la milito ni nomas ŝin Wiesje (Viŝe). Ĉu ne, Wiesje?” diris afabla virino. Ĉi tiu virino transloĝigis judajn infanojn per sia hejmo al aliaj homoj kiuj prizorgus ilin.

“Do vi kuniros kun mi?” mi demandis ŝin. “Nu, surmetu vian mantelon. Mi metas viajn aĵojn en mian biciklosakon.” Singene Wiesje donis la manon al la virino kiu estis gastiginta ŝin dum unu nokto.

“Dankon,” ŝi flustris.

Timide ŝi donis siajn aĵojn al mi. Mi plenŝtopis ĉion en miajn flanksakojn. Ŝi povis prunti la biciklon de la virino. Mi ja ree ĝin redonos. Falis agrabla printempa pluveto. La strato odoris kaj la printempo ekokupis nin.

“Estas agrable ekstere,” diris mia kunirantino.

Efektive ŝi ekhavis iom da koloro sur la vangoj, aŭ ĉu tiu koloro estiĝis pro ekscitiĝo?

“Wiesje,” mi diris, “ni devas iri por kunpreni alian infanon. Vi povos atendi momenton ekstere...”

Tuj ŝi rigidiĝis. La timo signis ŝian vizaĝon, ŝian teniĝon.

Ho, kial mi diris tion tiel maltakte. Mi neniam lernos, mi pensis indigne. Mi devis postlasi ŝin ĉe laĝeto, kie ŝi povis fiksrigardi la akvon sen kapti la atenton. Mi biciklis kiel eble plej rapide al la adreso de kie mi devos akompani la alian infanon. La situacio tie estis tute malsama. Estis dekkvarjara knabo. Vera adoleskanto kun la samaj problemoj kiel ĉiu adoleskanto en kiu ajn tempo. La homoj vere havis problemojn kun la knabo. Li deziris, sufiĉe kompreneble, ekstereniri, enŝalti la radioaparaton tro laŭte. Se diri koncize, ĉia mizero de kaptita birdo. Li havis ĉarman kapon kun spritaj inteligentaj okuloj. Je la unua rigardo ni ŝatis unu la alian.

“Nu, vi estas tiu sovaĝulo?” mi demandis. Mi grimacis. Li ridetis iomete singene kaj donis al mi fortegan manon.

La homoj, ĉe kiuj li nun estis loĝigita dum monato, estis vere afablaj, sed multe tro maljunaj kaj malmodernaj. Oni povis senti tion vidante la instalaĵon de la domo kaj gustumante la animstaton. Sed li dankis ilin korekte. Survoje li donis al mi iom da mono por aĉeti florbukedon por ili.

“Frits,” mi prezentis nian novan kuniranton al Wiesje.

“Nu, geknaboj, la pluvo finiĝis, nun ni biciklu rapide. Tiam ni alvenos ĝustatempe en Hillegom,” mi kriis bonhumore. Mem mi ŝatis fari biciklovetureton, sed miaj du sinkaŝantoj tamen pene biciklis samrapide kiel mi. Kompreneble senokupeco profunde skuas iun. Pro tio ni satripozis iom da tempo sur seka loko kaj ekparolis. Frits estis bonega parolanto kaj ankaŭ Wiesje devis ridi pro liaj strangaj rakontoj. Post kvaronhoro ni decidis denove ekiri. Ni ĉiuj ĝuis nian bicikladon. Post proksimume kvin kilometroj mi malkovris ke mi forgesis mian teknon kun identigiloj kaj tiel plu sur nia ripozloketo.

La infanoj estis vere tro lacaj por kunbicikli returne. Tion mi ja vidis. Mi konsilis al ili serĉi kaŝiĝejon ie sur la vojrandoj. Mem mi rapidegis esperante trovi mian teknon. Estis tiutempe malmulte da trafiko. Mi pensas ke pro tio mia teko feliĉe ankoraŭ troviĝis sur la sama loko. Spiregante pro la rapida biciklado mi retrovis la infanojn sur loko inter kelkaj arboj.

Ili ne aspektis same ĝojaj kaj senzorgaj kiel antaŭe.

Grupo da Germanoj estis pretermarŝintaj kaj ili estis vidintaj ilin silente kaj timeme. La viro, iranta apud la grupo, sufiĉe atente rigardis ilin. Jes, kion fari? Ne ekzistis ĉi tie multaj flankvojoj. Ĉirkaŭe de ni troviĝis kampoj kovritaj de pajlo. Eble ĉi tie floros iam tulipoj. Ankaŭ kun la biciklo je la mano iri tra la kampoj estus okulfrape. Mi ege meditis. Tamen daŭrigi, mi decidis. La animstato estis for. "Fi-nazioj," mi aŭdis Frits murmuri.

Wiesje estis ree pala kaj timema kiel antaŭe.

Kiam ni lacaj kaj elĉerpitaj alvenis al la nomita adreso, paro da tre afablaj homoj atendis nin. La plej taŭgaj nutrogepatroj por mia sovaĝa kaj vigla sinkaŝanto Frits. Interesite li ĉirkaŭrigardis.

Jes, mi pensis, ĉi tie li sentos sin hejme. La nova domproprietanto de Frits estis ĝardenisto. Li posedis varmdomojn, kampon kaj barakojn. Ĉi tie la knabo povis fari ion. Mi parolis iomete kun la dika, ronda virineto en la kuirejo. Ĉarmaj ĝojokuloj rigardis rekte al mi. Mi rakontis al ŝi pri Frits, pri lia malfacila sinteno ĉe liaj antaŭaj nutrogepatroj.

"Ha, mi scias kia tio estas, mia infano," ŝi diris. "Mi mem havas tian. Ni ja travivos."

Frits postvivis la militon ĉe ĉi tiuj afablaj homoj.

Wiesje venis ĉe homoj sen infanoj. Ili estis tre bonkoraj por ŝi kaj ŝi ege ĝuis sian restadon tie. Vespere ili promenis aŭ biciklis kun ŝi. Kiam post la milito ŝiaj propraj gepatroj ne revenis el la koncentrejo, Wiesje restis ĉe ili.

12. Naziknabinaĉoj

“Mi montros al vi la viregon kiun vi devos kunlogi,” diris Frans tutsimple, kvazaŭ kunlogado de viroj estus ĉiutaga laboro por mia fratino kaj mi.

Indigne ni rigardis al la senemocia kapo de nia komandanto.

“Vi sciu,” diris Freddie, “ke tiuj viroj ne estas frenezaj. Ili ja tuj rimarkos ke ni ne estas veraj naziknabinoj.”

Leviĝinte, ŝi rigardis kolerege al Frans kaj mi, fingromontris sian malgrandan korpon kaj kriegis: “Ĉu vi iam vidis tiel malgrandan naziputiton?” Ni ekridis. Vere, Freddie similis dekdujaran infanon kun siaj harligetoj kaj senkulpa infanvizaĝo. Jes, eĉ ŝia indigno estis infana. Tamen ni devis pravigi ŝin.

Frans faris planon ĉe kiu Freddie devos zorgi ke li, okaze de malfacilaĵoj, estu avertita. Mia tasko estis, ŝminkita kaj tiel plu, kun delogantaj rigardoj, inviti la S.S.-oficiron sur la straton. Se eble, kunirigi lin al 'nia' arbaro ĉe la vojo Wagenweg.

Por ekhavi la ĝustan animstaton, mia fratino kaj mi iris en la kinejon kie dolĉafekta amfilmo estis montrata. Veninte hejmen mi ekzercis la belegajn scenojn kiujn mi vidis en la filmo. Miaj spektantoj plorridegis, sed mi estis kolerega.

“Damne,” mi krudparolis al ili, “ne ridu tiel stulte. Estas grava seriozaĵo. Tiu virego devos kuniri kaj pereii.”

Tio des pli kaŭzis rideksplodon inter la ĉeestantoj.

Post kiam ĉiu finis ridi kaj mi estis transformita en amorvekan hominon de Frans, mi rigardis la rezulton en la spegulo.

Helruĝaj lipoj, brova arko kiu superus eĉ la spanon de la centra stacidomo.

Pudro kamuflis miajn ruĝajn vangojn kaj abomeninda parfumo pligrandigis mian putinecon. Kiel malagrabla mi sentis min. Mi ne povis kompreni la plezuron de ĉi ĉio. Mia fratino opiniis ĝin belega.

“Tiel vi estas bela!” ŝi kveris.

“Ho, knabino, krevu!” mi murmuris kaj rigardis rekte en la vizaĝo de Cor, kiu sinretene ridis. Tiam ankaŭ mi ne plu povis retenigi min. Mi ekridegis kun la kamaradoj.

Ĉar la streco estis rompita, ni povis skizi la planon. La koncerna nazio estis ofte rimarkita kun 'knabinoj', do tio estis bona.

“Kial ĝuste ĉi tiu nazio?” demandis Freddie. Montriĝis ke la viraĉo estis subŝtelinta kodon de kontraŭleĝa sendstacio kaj ke li povas aresti anglajn alvenantojn kiuj estis elirigataj nokte sur la marbordon aŭ sur la regionon Veluwe (Véjluve) per ŝipeto aŭ per paraŝuto.

Freddie kaj mi devis iomete sencele pasumi sur Hout-placo. Nian celon ni antaŭe observis el kafejo ofte vizitata de multaj germanaj militistoj. Frans sciis ke li multfoje vizitas la restoracion “t Heerenheck”. Ni ricevis dek guldenojn por trinki ion.

Post multa pasumado tien kaj reen ni eniris. Li ankoraŭ ne ĉeestis, do mi ekzercis jam kun la ĉeestantaj nazioj. Sen ia sukceso!

Ĉe alia tablo sidis dika nazio kun vere bela knabino. Li trinkis holandan juniperbrandon kaj la 'sinjorino' havis grandegan ŝorbeton. Tre belega! La salivo enfluis niajn buŝojn kaj post pripensado ni decidis ankaŭ mendi tian bongustaĵon. La

kelnero rigardis nin malestime kaj post momento li ĵetmetis la belegajn ŝorbetojn antaŭ nin. Ni frandmanĝis kaj ĉar ni devis atendi treege longtempe 'nian nazion', ni mendis ankoraŭfoje unu.

La ŝminko sur mia vizaĝo ege ĝenis min. Ankaŭ tiu ridinda fiĉapelo ne plaĉis al mi. Miaj ŝuoj premis kaj miaj maleoloj doloris. Neniam mi iris altkalkanume.

Ĉirkaŭ ni silentiĝis. La plejmulto de la vizitantoj estis foririntaj. Ni timetiĝis iomete. Ni estis nun tre okulfrapaj.

“Ni reguligu la konton, Truus,” flustris Freddie.

Fiergeste mi alprenis la monujon el mia saketo.

“Ĉu mi povas pagi, sinjoro?” mi demandis kvazaŭ ĝi estus la plej normala afero de la mondo. La viro trenpaŝe almarŝis.

“Nu, tio estas 13 guldenoj kaj 80 cendoj, sinjorinoj.”

Mi misglutis pro pura ektimo. Post longtempa renversado de sakoj kaj mantelpoŝoj, ni ekhavis 11 guldenojn kaj 85 cendojn.

La dika pudrotavolo ne povis kaŝi mian hontruĝiĝon. Singĝenaj ni pardonpetis.

“Malhonestaj malĉastulinetoj!” li kriis tiel laŭte ke la ankoraŭ ĉeestantaj homoj povis kunĝui pri nia malfiera foriro.

Oni prenis nin je la nukhaŭto kaj metis nin eksteren. Kiel ni hontis kaj malbenis Frans pro lia fiordono. Estis tre bone ke li estis netrovebla tiun vesperon.

Post du tagoj mi tamen sukcesis loge kunirigi la viraĉon. Ni renkontis lin simple sur la strato. Mia timema rideto estis respondata. Mi forpuŝis mian fratineton kaj diris krude ke ŝi ekludu. Multajn vortojn ni neniam bezonis. Freddie komprenis tuj ke ŝi fulmrapide devas ekaverti Frans kaj Cor.

En kafejo la nazio prenis bieron kaj mi ekhavis limonadon.

Mi surhavis ordinaran robeton kaj havis nudajn krurojn. Ne ŝminkon, ne ĉapelon kaj tamen mi kaptis lin! Multan tempon por miri pri tio mi ne havis. La medalojn sur lia brusto mi jam kalkulis kaj la cigaredo estis sufiĉe forta. Ĉu mi sentis naŭzon pro timo aŭ pro la cigaredo mi ne sciis, sed mi sentis min vere malagrabla. De malantaŭ siaj okulvitroj li atente rigardis min. Aprobe liaj rigardoj iris laŭ miaj mamoj. (Neniam mi komprenis la ĝuon de tio. Kiel deksepjara knabino mi malbenis tiujn laŭ mia opinio multe tro grandajn mamojn, sed nun mi estis bona merkatovaro.)

Mi rakontis al li pri privata arbaro de mia onklo. “Nur dek minutojn iri kaj tiel romantika,” mi promesis. Li ekridis, diris germanlingve ke verŝajne mi volos lerni multon kaj ni leviĝis. Li havis pli ol kvindek jarojn kaj mi estis deksepjara. La mastro de la ejo gestis al la nazio, pri kio ĉiuj ekridegis. Mi ruĝiĝis kvazaŭ stulta infano.

Ekstere mi vidis Freddie donante signon. Ŝi havis biciklon kaj ŝi akcelis for.

La nazio komencis kun preparaj palpadoj kaj mi devis lasi lin. Mia ludata amoro embarasiĝis, ĉar miaj sinĝeno kaj timo batalis por la prioritato. Lia buŝo estis kruda kaj liaj manoj same.

Vesperigis jam kaj postulis de mi multe da peno logi la viraĉon al nia arbaro. Ĉiuj arbaretaj en la ĉirkaŭaĵo de Hout estis sufiĉe bonaj por li. Finfine ni atingis la domon kun la statuoj. Tra belaj aleetoj ni iris al la laĝeto. Post harstarige fortika ĉirkaŭbrakumo ekestis subite la voĉo de Frans:

“Kion vi faras ĉi tie kaj kion signifas ĉi tio, Kitty?” li demandis laŭte kaj kolerege. Germanlingve li diris ke ĉi tiu estas privata tereno kaj ke li informos la komandanton, se ni ne tuj foriros. La nazio kalkanumklakis kaj pardonpetis.

Kiam ni reiris Frans trapafis lian kapon. Mi sciis ke ĉi tio okazos, sed ektimo, teruro kaj naŭzo trapikis min. Freddie kaj Cor venis al ni tra la arbustoj. Mi estis vomanta, dum Cor kaj Frans demetis liajn botojn kaj uniformon kaj faris el ili kun la ĉapo ligpakaĵon.

Ankaŭ Freddie estis tremanta sur siaj kruroj. “Observadu, vi!” kriegis Frans kaj la povra Fred devis enrampi sian postenon en tiu ege malluma arbaro por averti okaze de la plej mallaŭta brueto.

En la vojbordero Cor kaj Frans fosis profundan truon. Per folioj kaj ruboj ni kovris la truon kiel eble plej bone. Kie la kadavro estis fortrenita mi forviŝis la spurojn.

Ĝuste kiam ni finis, Freddie venis por diri ke germana veturilo haltis antaŭ la arbaro. Ni fuĝis kunprenante la vestojn kaj la zonrimenon kun la pistolo. Je la fino de la arbaro estis la Lejdena kanalo. Ankaŭ estis alta krado de tenisejo, granda bariero. Tamen ni devis surgrimpi la latison de la krado. Freddie sukcesis plej bone. Cor kaj mi daŭre malsukcesis. Ĝuste decidinte transnaĝi la Lejdenan kanalon, ni aŭdis la bojadon de spurhundoj. Tuj ankaŭ ni estis je la alia flanko de la krado. Ĉi tie estis ree obstaklo, granda kampo kun urtikoj. Ni devis trairi ĝin. Freddie kaj Frans estis prenintaj alian vojon. En mia somerrobo ne estis plezurige trapasi tiun urtikokampon. Miaj kruroj, brakoj, sed ankaŭ mia vizaĝo - mi terenfalas - bruldoloris. Lacega kaj malsana pro doloro mi venis hejmen. Feliĉe Freddie jam estis tie.

Mia patrino kaj Robbie gastloĝiĝis dum kelkaj tagoj en Amsterdamo ĉe nia onklino. Ni opiniis ke ni scias kion fari sen la patrino kelktempe...

Brakuminte nin ni kune ploris. La sukceso de la atenco ne povis kompensi la timon kaj la malagraban sperton en ĉi tiu momento.

Ne senvestiĝinte ni ekdormis.

Frans venis post kelkaj tagoj por fari raportadon.

La agendo de la S.S.-ano enhavis abundon da informoj por la rezisto kaj speciale por la kontaktuloj en Anglio. La Germanoj kiujn Freddie vidis, ne estis enirintaj la arbaron. La hundoj estis de la ĉasgardisto kiu persekutis personojn kiuj provis ŝteli pizojn kaj fazeolojn el la legomĝardeno de la blanka domo.

13. La mallonga kontraŭleĝa epizodo de Willem

Mi konis Willem el la junularmovado. Vera flirtemulo. Ĉiuj knabinoj enamiĝis al li. Ĉiam ja estis malĝojigaj amaferoj pro tiu bela filmsteleca Willem. Post longa hezitado li aliĝis al la rezistmovado.

Mi ekhavis ordonon instrui al li la manipuladon de la karabeno kaj la uzadon de mangrenadoj.

“Jen,” mi diris, “ni nun iros al konstruaĵo en Hout, kie verŝajne la nazioj konservas la administracion de S.D. kaj de sia sekreta servo. (‘S.D.’ = Sicherheits Dienst [germane: Sekureca Servo]) Tie, kiam la granda antaŭpordo foje malfermiĝos, ni enĵetos mangrenadon. Post tio, brulbombeton kaj tiam ni forkuru!”

Ni havis unu tiel nomatan “ovo-mangrenadon”. Eksa KNIL-militisto sciigis nin pere pere, ke li estis enteriginta mangrenadojn kaj kelkajn karabenojn en sian ĝardenon. (‘KNIL’ = Koninklijk Nederlands-Indisch Leger [Reĝa Nederlanda-Indonezia Armeo]) Li ne volis cedi la armilojn al la okupantoj sed li opiniis bonega se ili estos uzataj kontraŭ ili. La elfosado de ĉi tiu malnova materialo jam estis heroaĵo, ĉio tre rustiĝis!

Brulbombeto estis Vim-ujo, plena de eksplodaĵo memfarita de studentoj. (‘Vim’= sapfabrikmarko)

Mi rakontis al Willem, kion oni atendas de li: “Do vi forigu la klikon, sekve nombru: 21, 22, 23 - sed tiam tuj: ĵetu! Alie ĝi eksplodos en via mano kaj tio estas iomete senorda...”

Petolante ni iris al benketo antaŭ la konstruaĵo kaj sidiĝis. Komfortcele mi metis la mangrenadon malantaŭ la benkon.

“Se alvenos nazioj aŭ ordinaraj homoj vi ekamindumu iomete kun mi, Willem,” mi diris. Tio estis volonte akceptita. Li komencis serĉkapti kaj pinĉi ĉie entuziasmege. Verŝajne li pensis: Kiel mi ekhavas tian bonŝancon: aventuron, streĉitecon kaj knabinojn. Postulis de mi multe da peno eskapi el la manoj de Willem kaj rakonti al li ke tio vere ne estas la intenco, kiam mi subite aŭdis laŭtegan sibladon de malantaŭ la benko. Verŝajne mi metis mian 'oveton' tro forte.

“Kuru, Willem, kuru!”

Ni ne plu bezonis kuri. Ni estis levataj per la aerpremo kaj falĵetataj pli fore. Ni ne havis tempon por ĉirkaŭrigardi kaj forkuris.

Mi ne povis kuri samrapide kiel Willem, kiu plenrapide elkuris el la rezistmovado kaj neniam plu montris sin.

14. Pogromo

Jam en 1942 la okupinto ordonis al multaj nederlandaj komunumoj ĉirkaŭbari la kvartalojn kie loĝas judoj per pikildrato. 'Judenviertel' oni skribis sur grandan ŝildon antaŭ la alirvojoj. ('Judenviertel' (germane) = loĝkvartalo de judoj) Kaj ankaŭ: 'Malpermesate por germanaj soldatoj'.

Nederlandanoj faris ŝercojn pri ĝi, vere agacajn, sed tamen: "Ĉi tie estas bona restado, libera de fremdaj makuloj..." "Insulo de libera penso..." "Ĉi tie ne loĝas nazihundoj."

Nu, forgesu tion lastan. La kaŝemaj perfiduloj troviĝis ankaŭ tie. Al plado da lentoj oni ĉiam servas, por uzi biblian metaforon.

En tiu tempo okazis la unuaj pogromoj. Neatendite tia kvartalo estis riglofermita. Domon post domo la Germanoj eniris. La loĝantoj estis pelataj sur la straton forkondukote en ŝarĝvagonoj al la oriento. Estis nur malmultaj homoj kiuj sciis, kio okazas al niaj judaj samlandanoj. Pri tio regis multe da miskompreno kaj naiveco, ankaŭ inter la judoj mem. Kun valizoj kaj dorsosakoj ili foriris... kompletaj familioj. Iuj kunportis muzikilojn aŭ pentrilaron. "Ni devas iri al labortendarejoj," ili diris.

Iun tagon mi sensuspekte eniris la tramon. Post unu haltejo kvar nazioj envenis. Ili estis armitaj per mitralpistoloj kaj postenigis sin ĉe la kvar elirejoj. La kondukiston oni ordonis ne plu halti ĉe la haltejoj kaj daŭrigi la veturadon ĝis iu loko malproksime de tie, kien mi devis iri. Se iu kontraŭstaris, li povis forlasi la tramon nun. Mi restis. En mia dekstra poŝo mia pistolo bruletis en mia varmega mano. Mi sentis ke io grava okazos. Mi estis kiel muŝo ĉe brulanta kandelo. Ni forveturis. Mi ne povis sidi pro streĉiteco kaj ekstaris sur la malantaŭan platformon. La nazio apud mi estis viro de proksimume kvardek kvin jaroj. Li ekbruligis cigaredon, rigardis al mi kaj prezentis unu ankaŭ al mi.

"Ne dankon," mi diris kaj fiksrigardis eksteren. Mi sentis ke mia kapo pli kaj pli ruĝiĝas. Stulte, mi pensis, eble li malfidos min kaj tiam oni devas atendi, kiajn aranĝojn li faros. Reznacie li ŝultrotiris.

Amsterdamo preterpasis al mi. Subite la kondukisto bremsis iomete. Grandaj grupoj da homoj kun pakaĵoj venis el flanka strato.

Ili ne estis plenumintaj la ordonon anonci sin. Nun ili estis antaŭenpelataj per peze armitaj, insultantaj kaj furiozantaj nazioj. De pli malproksime ni aŭdis la knaradon de aŭtomata pistolo. Mi senespere ĉirkaŭrigardis, sed sciis, ke mi ne plu povas forlasi la tramon. La malmultaj homoj en la tramo rigardis konsternite. Virino estis leviĝinta kaj fiksokulis sensprite la grupon da malfeliĉuloj. Larmoj gutis laŭ ŝia vizaĝo. Ŝi ne forviŝis ĝin. Kun la manpugnoj premitaj al sia brusto, ŝi daŭre rigardis senpove.

Subite salvo ree sonis, sed nun pli proksime. El domo virino estis trenegata. Sur sia brako ŝi portis bebon, per sia mano ŝi tenis knabeton de proksimume du jaroj. La infanoj kriegis laŭte. Nazio puŝis ŝin en la dorsflankon per la kolbo de sia fusilo. La virino kriegis: "Lasu min do! Lasu min do!" Ŝi ne iris sufiĉe rapide laŭ la opinio de la 'Grüne'. Per la fusilkolbo li batis en ŝiajn poplitajn kavojn. Ŝi ĵetiĝis antaŭen. La kapeto de la bebo batiĝis sur la trotuarrandon. Frakasita... morta!

Ĉiuj en la tramo kriegis.

"Mein Gott," flustris la Germano apud mi, "so etwas ist doch kein Krieg führen." (germane: Mia Dio, io tia ja ne estas militi)

Mi rigardis al li. Sub la malamata kasko rigardis homaj okuloj al mi. "Schrecklich," li diris. (germane: abomenende) Mi devis sidiĝi. Kiam la tramo finfine haltis, ni elvagoniĝis kaj ĉiu iris sian propran vojon.

Kolerega mi pensis pri mia pistolo. Kiel volonte mi estus pafinta tra la kapo de tiu 'Grüne'! Mi sentis min pli senpova ol la virino en la tramo.

15. Unua de majo festo 1943

Tiun matenon regis ia sinteno 'Ni ekfaros ion pri tio. Ni celebros nian feston de unua-de-majo sub la okuloj de la nazioj.'

De la partio ni jam ekhavis grandan ruĝan flagon kun flava signo de martelo kaj serpo. Kiam ĝi kuŝis malfaldita ĉi tie sur la planko, mi opiniis ĝin tre granda.

Ni pridiskutis, kiu loko estos la plej okulfrapa por la flago. Cor pensis pri la Granda Preĝejo en Harlema sed Jan estis sciigita de konatoj ke tie troviĝas observadposteno de la nazioj. Cetere, nia komandanto ne volis provoki la preĝejan estraron. Ĉiuj altaj konstruaĵoj preterpasis niajn pensojn. Ĉiuj havis aliajn sugestojn.

Annie, la edzino de Cor, enverŝis surogatan kafon por ni. La etoso estis treege hejmeca. Cor rakontis la plej novajn ŝercojn, trafajn ŝercojn de la konstrufako kaj ridegis mem tre laŭte pri ĝi. Ankaŭ la hitlerŝercoj aperis kaj tiun momenton ĉiu forgesis ke ni ĉeestas en kunveno dum la okupado. Frans tamen bone regis la aferon. Ni decidis peti la virinojn el la najbaraĵo meti ruĝajn florojn malantaŭ la fenestrojn, vesti siajn infanojn per io ruĝa kaj pendigi ruĝajn kutenegojn kaj litkovrilojn eksteren.

Matene je la kvina nia flago estos flirtanta sur la flagstango de la Naci-Socialista-stabejo...

Alvoko de la kontraŭleĝa Komunista Partio festi la unuan de majo estis entuziasme disvastigata de nia tuta grupo. Al junaj infanoj en la najbaraĵo ni ordonos bone atenti kaj averti nin se nazioj alvenos. La laboreto estis rapide farita. Proksimume je la naŭa vespere ni preparolis ĉion kun la knabetoj. Ni dankis ilin kaj sendis ilin hejmen. Post morgaŭ ni ne povos montri nin en ĉi tiu kvartalo dum kelkaj semajnoj.

Matene je la sepa ni prenis la biciklojn kaj veturis laŭ Hout-placo por fierkore vidi nian flirtantan flagon, tie kie kutime pendis la malamata triangulo de la Naci-Socialista Ligo. Ni observis la homojn, kiuj survoje al sia laboro preterpasis la ĝoje flirtantan flagon. Ĝi pendis tiel bele kaj la N.S.L.-anoj ankoraŭ ne estis alvenintaj. Nerimarkate ni atentis ĉion. De la alia flanko alvenis Cor kaj Jan, ankaŭ gajmienaj. Homoj promenantaj preter la N.S.L.-konstruaĵon retenis siajn paŝojn por subridante rigardi al ĉi tiu nenormale kolora flago. Biciklantoj deiris de siaj bicikloj. Ili restis stari, ĝis subite aŭto kun nigraĉemizuloj alvenis. Ĉiuj iris fulmrapide survoje al fabriko aŭ oficejo. Ni vidis ankoraŭ kiel koleregaj N.S.L.-anoj deŝiris la flagon kaj piedbatis ĝin per siaj nigraj botoj. Ĉie en la urbo oni parolis pri nia bravuraĵo.

16. Avinjo

La vibrosonaj motoroj de la transflugantaj anglaj bombaviadiloj malebligis min ekdormi tiun nokton.

Mi estis pensinta pri milito: la timo, ankaŭ de la germanaj patrinoj, la ruinaĵoj kaj la plenplenaj malsanulejoj.

Mi kaptis min kulpa pri kompatemo, sed tiam mi memoris ĉiujn urbojn sur kiujn germanaj bomboj falis sen pardono. Unu aferon mi ja komprenis: ambaŭflanke milionoj da homoj suferis pro nehoma milito kaŭzita de la nazioj. La aviadiloj jam revenis, mi komprenis, ĉar la kontraŭ-aviadila artilerio ekŝpruciĝis fajron knarante kaj bojante.

Serĉlumoj trakrucis la ĉielon. Kun timo mi vidis ke en unu el la intersekcaj punktoj oni kaptis 'Tommy'. Plonĝu! mi pensis. La aviadilo jam brulis, sed forprenis sin el la lumoj de la 'Flack'. ('Flack' = germana kontraŭ-aviadila artilerio) Nur esperi oni povis ke la viroj en tiu malgranda brulanta ejo eskapos la morton.

Tiun matenon mi ne povis pensi pri agrablaj aferoj. Ĝemante mi purigis la dentojn per surogata dentopasto: pulvoro kiu gustumis iomete kiel mento. Elkraĉi la substancon estis ĝojo!

La pluvo ventopuŝe batis kontraŭ la tegmentfenestron.

Proksimume je la sesa en la mateno mi devis esti ĉe interkonsentita adreso, ĉi-foje mi devis trapasi la ĝardenon de civitano favora al ni.

Ni estis ricevintaj kelkajn avertojn, ke nia renkontiĝloko estas tro okulfrapa pro la multfojaj vizitoj de la diversaj rezistgrupoj. Oni jam serĉis anstataŭan lokon.

Mi ekhavis sakon kun armilpartoj, kelkaj pistoloj kaj du mangrenadoj. Unu mangrenadon mi enpoŝigis. Freddie kaj mi estis farintaj profundegajn poŝojn en niaj manteloj.

Ĝi ja kaŭzis strangan ŝvelaĵon. Mi esperis nur ke neniu rimarkos tion kaj certe ne la 'malĝustuloj'. Se mi estos arestita, mi devos agi tuj, do tiam tiu mistereco ne plu necesos. Oni kutimiĝas al ĉio, mi pensis.

Ankaŭ ĉe la aliaj la animstato ne estis tre bona. Armiltransporto estis haltigita kaj oni pafis. Eble falis viktimoj ambaŭflanke. Neniu sciis la veron, sed la etoso estis streĉita.

Kiel kutime la tiam deksesjara Freddie aspektis ne pli aĝa ol dekdujara pro siaj harligetoj kaj sia mallonga jupo. Tre erarige dum kontrolado survoje. Ĉiu en la grupo tamen sciis ke ŝi kuraĝas ĉion. Ŝi povis bone manipuli sian F.N.-pistolon. Diversaj nazioj ne plu povis rerakonti tion...

Jan metis ŝian biciklon eksteren, li estis gluinta ĝian pneŭon. Cor kaj ŝi mem portis la flanksakojn kun armilaro. Ili penegadis por ŝarĝi la biciklon tiamaniere ke ĝi ne ŝanceliĝos. Freddie malaperis.

Ni postrigardis ŝin. Ŝi aspektis tiel juna, sed ni povis trankvile lasi ŝin iri. Ŝi ĉiam reagis sagace kaj rapidresponde.

Ankaŭ mi surseliĝis. Jan, Frans kaj Cor postrestis. Kees biciklis vojparte kun mi. Li ekhavis la nedankindan taskon gvatsekvi perfidulon. Kun amika ŝultrofrapo ni disiris. Mi svingiĝis sur mia biciklo. Tiuj armiloj estis vere pezaj kaj oni facile malbalanciĝis. Sur la Amsterdama stratvojo ne estis kontrolo feliĉe. Tamen mi alvenis iom malfrue ĉe la domo de Annie kaj Bob. La malorda kanalstrateto ĉe kiu ili loĝis, estis vera kvartalaĉo

kaj malriĉulecan odoron oni renkontis sur la ŝtuparo. Ili estis tre malriĉaj, ĉi tiuj rezistkamaradoj kun sia malgranda kvarjara knabo kaj 'avinjo', la juda sinkaŝantino.

Ĉi tiu avino devenis el Flandrujo. Ŝi estis havinta profesorecon en unu el la belgaj universitatoj. Iom de tiu amikeca, verva prononcmankado ankoraŭ estis aŭdebla en ŝia voĉo. Ofte ni kune ridis pri ĝi. Ŝi estis tute izolita de la ekstera mondo; miaj mallongaj vizitoj trarompis iomete ŝian izolecon.

Neniam mi povis konfidi miajn sensaciajn rakontojn al aliaj pro sekurecaj motivoj. Al ĉi tiu malgranda inteligenta virino mi ja povis rakonti pri miaj timo kaj necerteco. Unuafoje mi trafis iun, kiu estis zorgema pri mia psiko, pri la konsekvencoj de multjaraj agoj streĉe faritaj kiuj fakte ne harmoniis kun mia karaktero.

Ŝi demandis min pri la tempo antaŭ mia agado en la rezisto, pri mia eduko, pri mia familio, k.t.p. Dum horoj ni babilis. Mi tre ŝatis tion. Tre timeme mi konfesis al ŝi ke mi vizitis nur la elementan lernejon, ke mia fratino kaj mi opinias malfacila, kiam oni faras diskuton superantan nian komprenon. Tiam ni sentas nin lasitaj ekster la afero, ĉar ni ne komprenas la malfacilajn vortojn.

Ŝi demandis min, ĉu mi ŝatos lerni la germanan kaj anglan lingvojn de ŝi. “Nu,” mi diris, “al mi la germana ŝajnas malagraba lingvo! Eble mi povas lerni la anglan.” Ŝi ekridis kaj diris ke mi lernu ĝuste la germanan tre bone, ĉar mi povos uzi ĝin iam.

Kaj tiamaniere miaj lecionoj komenciĝis. 'Avinjo' diktis kaj intertempe senŝeligis la terpomojn - se ŝi havis tiujn - kaj tranĉis la ruĝan aŭ blankan brasikon. Miaj progresoj kaj la sento tamen ne esti tiel stulta, kaŭzis ke mi ĉiam tre volonte iris al ŝi. Kiel kompenco mi kunprenis por ŝi multe da legaĵoj. Bob kaj Annie ne posedis librojn.

Malsekega kaj malvarma ĝis la ostoj mi frapis la konatan signon. Kiam finfine la pordo malfermiĝis, mi vidis plorantan Annie, tute konsternita. Ŝi plorsingultis kaj ne povis eligi unu vorton.

Intertempe mi staris tie kun mia peza, renversiĝanta biciklo. “Unue helpu min, anstataŭ ploradi,” mi kriis, “mi damne ne povas resti staranta ĉi tie. Kaj mi estas malsekega!”

Subite mi ektimis pro ŝia rigardo.

“Jesuo,” mi siblis, “ĉu estas nazioj supre?”

“Ne, ne,” ŝi plorsingultis. Mi puŝis la aĵojn en ŝiajn manojn kaj apogis la biciklon al la ŝtupara balustrado. Spiregante ni brumoviĝis supren kun la pezaj sakoj.

“Nu, An, trankviliĝu, mi petas!” Mi puŝis ŝin konsole al mi.

“Nu, rakontu al mi...,” mi diris kiel eble plej trankvile. Tamen mi estis tremanta sur miaj piedoj. Pro la ĉielo, kio okazis, trairis mian kapon.

Subite ŝi eligis: “Avinjo mortis.”

Malfermbuŝe mi rigardis al la konfuzita Annie. Dum minutoj mi ne povis eligi unu vorton. La malvarmon, la malsekegajn vestojn, nenion mi sentis. Ĉiuj vizitoj al ĉi tiu domo fulme pasis mian memoron.

Neniam plu ridi pro ŝia flandra prononcmankado, neniam plu: “Bone, knabino, vi ja lernos ĝin”, neniam plu: “Kiam la milito estos finita, mi volos konatiĝi kun via patrino.”

Raŭke mi demandis, kie troviĝas Bob kaj la malgranda knabo.

“Ili iris al konato de ni en la nordo,” Annie plorsingultis. Ŝi estis tute sola. Annie kondukis min al avinjo. La zorgema kapeto estis falinta flanken kaj la grizaj haroj

ĉirkaŭis ĝin senorde. Dum mi ordigis ĝin iomete, mi pensis ke ŝi similas la mortan birdeton kiun mi kiel morttimema infano tenis en la manoj. Mi nur staris tie kun kunpremita gorĝo. Mi adiaŭis karan, kompreneman, saĝan virinon.

“Kiam ŝi estos entombigita?” mi demandis senpripense.

“Tio ja ne eblas, knabino,” ploris Annie. “La S.D. tuj arestus min.”

Konsternite mi alrigardis ŝin.

“Ho, dio, ni ne povas entombigi ŝin,” mi balbutis. “Kion ni faru?”

“Ho, Truus, mi tre ĝojas ke vi nun estas ĉi tie. Vi ĉiam scias solvon,” diris Annie.

Mi tordiĝis. Solvo, jes, tiu devus veni. Ho, mi deziris forfuĝi de ĉi tiuj aferoj, ne pensi, ne preni decidojn, resti en la varma lito kaj dormi, dormi...

Plori kiel Annie kun iu apud mi kiu karesus miajn harojn...

Mi stariĝis kaj iris en la kuirejon. Mi lavis mian vizaĝon sub la krano. Mi kombis miajn harojn; mi sciis ke harkombado kelkfoje povas helpi, kiam oni sentas sin necerta...

Mi kombis kaj kombis kaj subite vidis mian propran vizaĝon en la spegulo. Tiel stranga, tiel diferenca. Konsternita mi vidis ke estas maljuna vizaĝo.

Ni senvestigis la avinon. Per mola sapo ni povis forigi ŝian ringon. Mi decidis tiel por ne postlasi rekonon por la germana polico. Volvita en hundkovrilo ni portis ŝin malsupren. La griza kapeto moviĝis je ĉiu ŝtupo. En la infanveturilo mi portis ŝin eksteren. Annie fermis la pordon malantaŭ mi. Sola mi devis plenumi ĉi tiun abomenindan komision. Ĉar ŝi ne povis esti entombigita, la kanalo estis la nura ebleco. La malhelo ne estis kompleta, la luno brilis tra la nubŝiraĵojn kaj faris ĉion ekstre timtremiga.

Mi ne kuraĝis uzi la kanalon antaŭ la pordo. Multe tro danĝere kaj tro emocie ankaŭ por miaj rezistamikoj. Do mi devis iri plue kaj plue. De tempo al tempo mi rigardis la avineton, tiun bonegan amikinon.

Subite mi faris tion kio estis farenda. Mi renversis la veturilon kaj mian 'ŝarĝon' faligis en la kanalon. La lumo fariĝis tiel hela ke ŝajnis dumtage. La cirklo en la akvo fariĝis pli kaj pli granda. Mi ne foriris, sed restis fiksrigardanta la centron de la cirklo. Kaj tiam aperis kiel ventumilo unue ŝiaj grizaj haroj.

Ŝia kapo suprenvenis trifoje...

La grandega streĉiteco, la tuto de tiuj retenitaj larmoj eksplodis en senprecedencan teruran ploradon. Duonvomante mi foriris de la kanalo kaj plorskuiĝante mi malplenigis mian stomakon ĉe arbo.

Reveninte ĉe Annie mi firmigis la veturileton sube al la balustrado. Mi sentis min kvazaŭ mi mortigis iun.

En tiu sendorme pasigita nokto, dum kiu mi ne povis varmiĝi, mi ripetfoje vidis ĉiam pligrandiĝantan cirklon ĉirkaŭ malgranda griza kapeto. Kaj dum senfine multaj longaj noktoj mi daŭre estis vidonta ĉi tiun bildon.

17. Infantransporto

Ĉu perfido, stulto aŭ nescio: neniuj sciis la detalojn pri la afero, sed en iu adreso en la poldero ĉiuj sinkaŝantoj devis foriri senprokraste. Per amika policisto la rezistmovado ekhavis la averton ke oni estas faronta invadon en la domon de 'onklo Han'. Tie troviĝis multaj sinkaŝantaj judaj infanoj. Ankaŭ de multaj aliaj adresoj la sinkaŝantoj devis foriri; la nazioj faris ĝisfundan serĉadon.

Ĉiu estis kunlaborigata. Ĉiu devis serĉi adresojn por loĝigi la homojn kiel eble plej rapide. Mia tasko estis akompani infanojn al Dordreĥto kvazaŭ germana Ruĝa-kruc-flegistino.

La trajnoj funkciis ankoraŭ tiutempe, sed estis ofte surpafataj de el la aero. La infanoj - dek du en la aĝoj de tri ĝis dek kvar jaroj - devis iri en transporto, t.s. kun steloj, nomkarto k.t.p. Mi ekhavis oficialan dokumenton kun la destino: hejmo kie la infanoj estos ekzamenataj.

Medicina deklaro estis aldonita. Por esti honesta, tiuj paperaĵoj ne multe interesis min. Mi nur konfidis ke la tuto de tiuj germanaj stampoj kaj oficialaj paperaĵoj min protektos dum eventuala kontrolo. Pli harstariga mi opiniis la fenestroŝildon 'Nur für Wehrmachtsanlage' (germane: nur por militistaro) kaj sub tio: 'Krankentransport' (germane: transportado de malsanuloj) aŭ io tia.

La infanoj estis transportitaj per ambulanco al la Centra Stacidomo, kie mi estis atendanta. Apud mi staris nekonata 'germana oficiro' (granda, maldika, serioza viro de la Amsterdama rezistado). Rigide li militiste salutis kelkajn preterpasantajn naziojn. Mi tiam kunklakigis miajn multe tro malgrandajn ŝuojn.

Ne unu minuton mi rajtis forgesi mian sintenon kiel naziino. La plej ĝena mi opiniis ke la uniformo kiun mi surhavas ne estas lavita aŭ vaporpurigita kaj ke ĝi tenas ankoraŭ la odoron de la antaŭa proprulino. De tempo al tempo 'la oficiro' turniĝis al mi kaj diris ion bagatelan por klare montri al la ĉirkaŭaĵo ke ĉi ĉio estas tre militiste-afereca.

Kiam la grupo da infanoj alvenis, mi ektimis pro mia fortega kaj subita emocio. Brue mi purigis la nazon, saltis en la teniĝon kun 'Heil Hitler' kaj transprenis la dokumentojn kaj la infanojn de la blankvestita flegisto kaj la akompananta germana soldato. Ĝentilriverence la soldato donis al mi sian manon kaj nia kurta 'Heil Hitler' estis tre konvinka.

Kiam mi iris kun la infanoj al la kupeo mi malafable faris la geston de 'foriru' al proksimiĝantaj germanaj soldatoj, kiuj kvazaŭ serpentmordite tuj granddistance ĉirkaŭiris nin. Estis tia malmoderna vagono. Alta enirejo, pordoj je du flankoj, du longaj sidbenkoj ambaŭflanke. Per rimeno oni povis mallevi la fenestron.

Mi ankoraŭ ne kuraĝis paroli kun la infanoj. Mi ekstaris kaj flankenrigardis tra la fenestro. Kiel timemaj birdetoj la infanoj sidis rigide unu apud la alia. Mi devis daŭrigi mian germanan aspekton ankoraŭ kelktempe kaj rigardis akre al la preterpasantaj vojaĝantoj.

Subite mi ekskuiĝis. Grupo da viroj kun ĉapeloj trabatis al si vojon al la trajno. La S.D., mi sciis, la homĉasantoj de la nazioj. Mi malfermis iomete mian pluvmantelon, por ke la germanaj dekoracioj estu klare videblaj kaj rigardis fanatike aliaflanken. Ili preterpasis kaj post unu momento ili revenis kun viro inter si. La viro portis nigre striitan kostumon kaj grizan ĉapelon. Unu momenton mi forgesis tiun stultan uniformon kaj mian sintenon kiel naziino. 'Unu el ni' iris tie preskaŭ certe survoje al morto...

Mia akompananta oficiro kaj la soldato flustris ion reciproke kaj foriris subite. Mi tremis pro timo. Estis la intenco ke la soldato kunirus kiel gardisto. Duobla elreviĝo, ĉar la virino kiu kune kun mi forportus la infanojn, ankaŭ vestita en germana flegistinuniformo, forestis lastmomente.

Ĉi tio devos sukcesi, mi pensis, sed mi malbenis miajn kamaradojn, kiuj forlasis min ĝuste nun.

Poste mi komprenis ke ili ne forfuĝis sed volis sendanĝerigi la aliajn kunlaborantojn.

Tuj mi ree malkonsterniĝis, batfermis la fenestron kaj eksidis apude. Finfine ni ekveturis.

Fulgonuboj preteriris la fenestron. La lokomotivo ekmoviĝis. Kun knarado kaj pepado la trajno glitis laŭ la kajo.

Ĉiu streĉiteco, timo kaj nenatura kuraĝo defalis min. Miaj genuoj tremis kaj la ŝvito ŝprucgutis de mia vizaĝo. Mia korpo fariĝis malsekega kaj ege ekstremitis. La tutan tempon mi kunpremis la okulojn. Mi ne permesis al mi plori. Flustrado de la infanoj rekonsciigis min. Du fratetoj estis ekscitite parolantaj duonvoĉe unu apud la alia. Ĉiuj aliaj infanoj alrigardis interesite. Per pura germana naztuko (ĉio sur mi estis germana, ĝis miaj subvestoj) mi sekigis iomete mian vizaĝon. Nur tiam mi sentis la streĉitecon de la infanoj. Mi ekrakontis kiu mi estas, kial mi portas ĉi tiun fikostumon kaj kial mi tenas ilin je maldanĝera distanco de ĉiu. Laŭpretende ili estas malsanaj kaj eble tre infektaj kaj nun mi esperas, ke ĉiuj nazioj kredos tion.

"Vi devas kunludi iomete," mi diris.

Dek du paroj da malhelaj, grizaj kaj bluaj okuloj rigardis serioze al mi. Mi konsciis jam en tiu momento ke estas la okuloj de plenkreskuloj. Mi rakontis pri nia laboro, daŭre rakontis, sed mi ne vidis kredon en iliaj okuloj. Eble nur ĉe la plej malgrandaj el ili. Knabino de dek jaroj fabrikis por Roos, la plej juna de tri jaroj, el naztuko ian pupeton. La etulino karespremis ĝin kaj metis la dikfingron en sian buŝon. Reveme ŝi rigardis la preterflugantajn fostojn, arbojn kaj nubojn. Ŝi estis tro malgranda por vidi ĉion kio preteriris la fenestron. Mi pensis: ĉu mi prenu ŝin sur la genuojn? Sed kiam mi tuŝis ŝin, ŝi ekhavis tiel grandegan timreagon ke mi mem implikiĝis en panikon. Malespere mi rigardis al la infanoj ĉirkaŭ mi.

"Vi do ja kredas min? Mi vere devas agi kvazaŭ mi estus naziino, ĉu vi kredas tion?" Mi preskaŭ kriegis pro mia nepovo. Dio, kia fiolo, mi pensis.

En Roterdamo ni devis trajnŝanĝi. En la trajno al Dordreĥto (mi kunprenis la ŝildon 'Krankentransport') mi ree kondukis kiel vera naziino kaj ĉaspelis la infanojn: "Schnell! schnell!" (germane: rapide, rapide), ĉio en mallongaj frazoj. Fanatike kaj nazie, kiel decis. Stumblante kaj dormebrie la malgranda Roos provis marŝi samrapide kiel la grupo. Liesje, la knabino kiu faris la naztukupeton, revenis kaj prenis ŝian manon. Mi reagis pretende kolerege per gesto: "Kio okazas nun?" Mi sentis la rigardojn de malamo en mia dorso.

Maljuna virino provis proksimiĝi. "For, for," mi kriis kaj eniris la trajnon. La ŝildon mi metis en la pinĉilon kaj mi insiste rekomendis al la infanoj esti tre silentaj.

La malplej juna knabo, eble dekkvarjara, observis min per riproĉaj okuloj. Mi fariĝis vere nerva pro tio kaj tia mi ĝuste ne devus esti. Mi devus esti flegma kaj senemocia. Nenia sentimentaleco, alie mi ne sukcesus.

Mia koro preskaŭ trabatis la gorĝon kaj mi provis kontraŭi la tremadon de miaj manoj. Kial oni ne akompanigis al mi tiun ŝajnigitan germanan soldaton? Tiam almenaŭ

mi estus trovinta subtenon en niaj komunaj timo kaj kuraĝo, devigantaj ludi la rolon de nazioj.

Mi ne estis atentinta sufiĉe bone. Subite la pordo malfermiĝis abrupte kaj nazio, armita per aŭtomata pistolo, eniris. Mi saltleviĝis, bojis "Heil Hitler" kaj rigidiĝis en la teniĝo.

Malantaŭ la soldato oficiro engrimpis la kupeon. Mi komprenis ke oni deziras pli multe de mi.

"Aufsteh'n. (germane: leviĝu) Heil Hitler, heil Hitler," mi kriegis al la infanoj. Konsternite ili etendis la brakojn antaŭen kaj imitis min. Escepte de la malplej juna knabo. Vaksalvizaĝe li restis sidanta. Liaj lipoj kunpremitaj. Liaj okuloj nigraj pro retenita malamo. En reflekso mi donis al li fortan baton en la vizaĝon, dum mi daŭre bojis: "Heil Hitler, heil Hitler!" La larmoj aperis en liaj okuloj. Li levis sian brakon kaj kriis: "Heil Hitler!"

La oficiro grimacis aprobe. Mi transdonis al li la akompanadokumentojn. Li redonis ilin kun korekta riverenco kaj rapide foriris prezentinte al mi cigaredon.

Mi restis sur mia loko kvazaŭ frostiĝinta, ankaŭ kiam ili estis jam longtempe foririntaj. Kiam la brulanta cigaredstumpo bruligetis mian ungon mi konsciiĝis. Mi ree konsciis pri la infanoj kiuj brumoviĝante sidiĝis kaj nur en tiu momento mi vidis la ruĝan vangon sur la palega vizaĝo de la plej aĝa knabo. Mi fiksokulis ĝin, konsternite ke mi faris tion. Li alrigardis min malestimplena. Plorante mi provis ekspliki al li, kial mi devis fari tion sed li ne kredis min. Li ne diris unu vorton, sed liaj okuloj parolis des pli klare.

Mi ree sidiĝis sur mian lokon ĉe la fenestro. Grava kapdoloro ekis kaj mi faris mian eblon sidi tre trankvile kaj ne alrigardi la infanojn. La fratoj ree ekflustris. Mi ne volis provi aŭdi ion de tio.

Roos estis ekdormiĝinta. Tra miaj okulharoj mi observis miajn malgrandajn pasaĝerojn. Fimondo, fivivo, finazioj, mi pensis. La vango de la knabo fariĝis pli malhela. Mi sentis min krima kaj mizera.

En parko apud la stacidomo mi postlasis la infanojn, ĉar mi devis iri al najbara fotobutiko kie mi ricevos la planon de la plua transportado.

Ĉe la vendotablo oni transdonis al mi la vojplanon, sur kiu estis indikitaj la minbaritaj terenoj kaj la loko kie troviĝas platpramo. Tre precize oni skizis kiamaniere ni povos trairi inter la minoj.

Laŭ la plano de la rezistmovado la pikildrato de la interdiga herbejo estos jam tratondita de la tieaj kunlaborantoj.

Kiam mi kun miaj infanoj alvenis, montriĝis ke la trairejo ankoraŭ ne estas liberigita. Ni estis tre okulfrapaj pro tiel granda grupo, tial mi kaŝis kelkajn en la arbustaĵon kaj lasis la aliajn sencele promeni unu kun la alia.

Intertempe fariĝis preskaŭ mallume. Daŭris tre longe antaŭ ol mi trovis la truon en la pikildrato. Ili faris ĝin vere tre malbone, tiel ke mi devis fari multe da laboro antaŭ ol ĉiuj infanoj povis trairi.

Mi kolektis ilin ĉirkaŭ min kaj rakontis ke ni devos rampi tra tre danĝera teritorio. Mi iros antaŭe kaj la plej aĝa knabo je la fino. Ni devos rampi unu tuj post la alia, tiel ke ni restos en unu linio. Mi insiste rekomendis al ili fari precize kion mi diris, ĉar se ni volas sendanĝere alveni transe, ni devas tre precize fari kion la dokumentoj mencias.

Malgraŭ la malbonŝanco ke la amikoj ne estis farintaj precize kion ni interkonsentis, mi tamen ekhavis pli kaj pli da konfido pri la bona rezulto. Per poŝlanterno mi ree bone rigardis la mapon kaj gravuris ĉiujn lokojn kun minoj profunde en mian memoron.

Unu malgranda eraro kaj ni ĵetiĝos en la aeron. Mi provis ne pensi pri ĉiuj harstarigaj konsekvencoj kaj ekiris. Mi vundis min iomete per elstaraĵoj de la pikildrato kaj retenis ĉiujn blasfemojn kiujn mi volis diri laŭte. La infanoj kondutis bonege. Ankoraŭ neniu el ni estis manĝinta. La knaboj povis pisi ie aŭ tie, la knabinoj estis urinintaj malantaŭ la arbustaĵoj. Mi mem preskaŭ krevis, sed mi ne kuraĝis forlasi la infanojn.

Kiam neatendite ie serĉlumo traserĉis la ĉirkaŭaĵon, mi sentis miajn kruojn spontane varmetiĝi. Estis granda senpezigo.

Ankoraŭ ĉiam ĉio iris bone. La infanoj estis promesintaj al mi ne flustri aŭ tusi kaj ili kondutis tiel, bonege!

Mi sentis la varman maneton de la plej juna fidplene en mia mano. De tempo al tempo ni devis halti momenton. Estis sufiĉe dolorige tiamaniere rampi sur la genuoj. Kelkfoje ŝtonoj aŭ pikiloj de iu malmola planto aŭ bulo troviĝis sur la tero. Speco de vesperoso kuŝis sur la herbejo. Nenature, kvazaŭ tra tulkurteno, ni vidis la serĉlumojn ŝvebantaj super la ĉirkaŭaĵo. Kiam la lumoj venis en nia direkto ni ekkuŝis plate sur la tero en longa linio. Miaj oreloj zumis. Ĉe ĉiu metro antaŭen mi atendis la teruran eksplodbruon. Minoj antaŭ, malantaŭ kaj flanke de ni.

Finfine ni alvenis sur la parton de la herbejo pri kiu la dokumentoj indikis ke ĝi estas senmina. Nur kiam ĉiuj estis alvenintaj sur tiun lokon, la grandega streĉiteco defalis de mi. Mi faligis min antaŭen kaj ploris per kriantaj plorsingultoj. Ke la infanoj aŭdas tion, ne ĝenis min tiun momenton. Ĉio doloris min. Kiam mi iomete trankviliĝis, mi konsciis ke mi forlasis la infanojn dum mallonga tempo.

Mi kolektis ĉiujn infanojn ĉirkaŭ min. Ĉiuj treege malsatis. La sola maniero por forgesigi al ili la malsaton, estis rakonti ion streĉan. Rakonti mi ja povis. En estintaj tempoj, kiam mi gastloĝis ĉe parencoj, la kuzoj kaj kuzinoj opiniis miajn tremigajn kaj fantomajn rakontojn tre interesaj. Mi devis teni la intereson de mia aŭskultantaro ĝis la momento kiam ni povos eniri la boaton por transveturi. Tiu momento dependis de tajdo kaj fluo. Mi estis ricevinta lumantan brakhorloĝon. La horoj malrapide pasis, la tempo ne progresis. Mi rakontis kaj rakontis, ĝis mi fariĝis raŭka.

De tempo al tempo iu devis pisi aŭ feki. En la ekkrepusko tio estis ja ebla, sed la serĉlumoj estis direktataj ĉiam pli ofte al la bordoj kaj multfoje ni kuŝis kun niaj vizaĝoj premitaj en la malseka malvarma herbo.

Ni ne plu povis sidi rekte kaj kuŝante mi rakontis kiel malbonkondata mi estis en la lernejo kaj kiajn ludetojn ni faris. Rakontetojn mi ne plu faris, mi nur plenbabilis la tempon.

Mi diris ke ni pisu aŭ feku en la kalsonoj; ni ne plu rajtas forlasi niajn lokojn.

La malgrandaj ekploris. Ili estis malvarmaj kaj volis manĝi.

Ankaŭ ĉe la pli grandaj infanoj mi ne plu havis aŭtoritaton. Ili fariĝis malfacilaj, ekturnentis unu la alian, kiel: "Ha, kiel vi odoraĉas, malpura fiodorulo."

En tiu ĉiam pli prema horo sen povo plu regi la aferon, horo de ĝismorta laceco kaj de nepriskribebla timo, mi decidis eniri la boaton pli frue ol ni planis. Se ili fariĝus ĉiam pli bruaj ni estus baldaŭ malkovritaj de la nazioj. Mi prenu la riskon nun, mi pensis.

Post mia: "Geknaboj, nun serioze dum unu momento, ni eniros la boaton," ili refariĝis iomete manipuleblaj.

Unu post la alia ni eniris la platpramon. Estis, feliĉe, kvar remiloj. Mi metis ilin kiel eble plej senbrue en la forketojn. Ĝis mia talio en la malvarma akvo mi puŝis la platpramon for de la bordo. Estis sufiĉe malfacila laboro ĉar ĝi estis preskaŭ ne antaŭenmovebla. La grandaj geknaboj remis kiel frenezuloj kaj mi daŭre puŝis. Fine ni alvenis en pli profundan akvon. Mi levis min per multe da peno en la boaton.

La remiloj terure bruegis. Mi prenis la poŝtukpupeton de Roosje kaj mian propran germanan poŝtukon kaj metis ilin inter la forketojn kaj remilojn. Tio ne utilis multe. Subite ĉie eklumis serĉlumoj kaj tuj ni estis kaptitaj en la lumon.

La knabo, la plej aĝa, kiun mi estis frapinta, maltenis la remilojn, leviĝis kaj kriegis: "Pafu do, damnaj finazioj!"

Hajlo da kugloj traboris lian gracilan korpon. Pro tio ke li falis eksterŝipen, la pezo en la boato fariĝis malegala. Ni ĉiuj kriegis.

"Ekkuŝu!" mi kriegis, sed la boato renversiĝis. La forta fluo disdrivigis nin.

Mi provis ankoraŭ kapti knabinon, mi sentis ŝian kruron laŭ mia korpo.

Ĉio okazis tre rapide kaj la bruo de la mitraloj estis fortega. Mi ne plu scias, kiamaniere mi alvenis sur la bordon. Kriegante pro mizero mi ree eniris la akvon. Ĉie mi aŭdis la kriegantajn infanojn. Ankaŭ la nazioj kriis super la akvo.

Ĉiufoje mi ree alvenis sur la bordon kaj ĉiufoje mi eniris la akvon malgraŭ la neeblo savi iun infanon.

Subite mi kaptis ŝin, mi tenis ŝin, provis teni la kapeton super la akvo. Estis Roosje kaj ŝi vivis ankoraŭ!

Mi pumpis per ŝiaj brakoj, puŝis sur ŝia stomako. Nur kiam ŝi ekploris, mi sciis ke ŝi estas en ordo.

Ni rampis returne. Intertempe motorboatoj venis sur la riveron kaj iliaj lumigiloj preskaŭ tuŝe pasis super la akvo.

Mi trenis la dolorĝemantan Roosje malantaŭ mi. Mi ne povis pensi pri minoj aŭ pri iu alia danĝero.

Kiam mi travenis la aperturon en la pikildrato sur la vojon, mi enstumblis la unuan domon kun Roosje en miaj brakoj.

Se ili estus germanemaj homoj, batus nia lasta horo. Sed mi ne plu povis pensi. Senĉese mi aŭdis la kriegon kaj kriadon de la infanoj. "Helpu, panjo!"

postsonis en miaj oreloj. Mi kredas ke mi ankaŭ diris tion, kiam la pordo malfermiĝis kaj mi svenis.

Kiel ĉio pasis tiun nokton, mi ne plu scias. Mi nur scias ke kiam, rekonsciiĝinte, mi ne vidis Roosje, oni ne povis trankviligi min, ĝis ŝi sendanĝera rampis apud min. Pro tio ke ni ambaŭ estis malsaniĝintaj, ni restis kelkajn tagojn tie. Per la virino mi sciigis ke ŝia edzo ree alimetis niajn postsignojn en la direkto de la herbejo kaj ke li disĵetis pipron por erarigi la spurhundojn.

Ili promesis al mi serĉi bonan kaj afablan adreson por Roosje. Post diversaj tagoj mi reiris. La gastiganto prizorgis ke mi povu kunveturi malantaŭe sur kamiono al Diemen.

Mi sentis min ne malvarma aŭ varma kaj mi manĝis aŭtomate de la sekalpano kiun la virino donis al mi por kunporti.

Dum ĉiuj sekvantaj noktoj mi havis terurajn inkubsonĝojn kaj kriegante mi vekis min.

Vespere mi timis enlitigi. Mi ne plu povis plori, nur en la dormo mi ploris. Sed ĉiam estis la okuloj kaj la ruĝa vango de la malgranda, kuraĝa juda knabo, kiu ne volis diri: "Heil Hitler."

18. La testo de Hannie

Hannie Schaft diversokaze alvenis en la armitan rezistgrupon de la Harlema R.V.V. (Raad van Verzet = Konsilantaro de Rezisto) Ŝi rakontis al mi poste kiamaniere tio okazis.

Henk, la fortika kaj trankvila interligulo de la konsilantaro transportis ŝin de Amsterdamo al Harlema. Ŝi estis sciiginta al amika Amsterdama rezistulo ke helpi la sinkaŝantojn nur per mono kaj kuponoj ne estas sufiĉe por ŝi. Ŝi volis rezisti pli aktive. 'Se necese, per armiloj,' ŝi estis dirinta fiere. Nu hodiaŭ ŝi do devos fari fajroprovon por pruvi ke ŝi estas vere kapabla. Henk ankoraŭ donis trankvile kaj amike kelkajn sugestojn kaj bonan konsilon al ŝi. Per sia basa voĉo li provis trankviligi ŝin. Pro sperto li sciis ke ĉi tiu novulino estos en malfacila situacio, sed ke ŝi ne estos 'forkuranto'. Li postrigardis ŝin dum momento. La ondiĝantaj malhelruĝaj haroj dancis laŭritme de ŝiaj paŝoj supren kaj malsupren. Iom ŝultrolevante ŝi paŝis al Cor, kiu jam atendis.

"Tiu viro tie, antaŭ la cigarbutiko, estas via celo," Henk estis dirinta. "Vi diru: "Ho, kiel mallume estis tie," nu, tio estas la signalvorto kaj tiam vi ja vidos."

La klakado de la kalkanumoj de Hannie sonis laŭte kontraŭ la altaj muroj de la konstruaĵoj ambaŭflanke de la strato. Cor rigardis kvazaŭ kvalitkontrolisto la 'materialon' kiun oni lin ĵus altrudis. Laŭ sia diro li pli volonte laboras kun pli fortikaj, pli plenkreskaj homoj. "Ŝi estas tiel gracila sinjorineto, ankaŭ tiel digna," li asertis al ni poste.

Kiam Cor prezentis sin kaj transdonis la pistolon al Hannie, li demandis ĉu ŝi bone komprenis ĉion.

"Ĉu Henk instruis vin kiamaniere manipuli ĉi tiun objekton?" li demandis. Intertempe li observis ŝin atente kaj serioze.

"Ho, jes," diris Hannie, "kaj mi ankaŭ scias kiel mi ŝargu ĝin."

"Bone," diris Cor, "ni esperu ke tiu S.D.-ano iros laŭ ĉi tiu vojo. Ni kune biciklos malantaŭ li. Vi unue pafu, kaj trafe, komprenite?" Hannie kunpremis siajn lipojn kaj kapjesis. Silente ili kune atendis la viregon, kiu devos esti pafmortigita.

Subite la momento ekestis. Cor ĉirkaŭbrakis Hannie kaj premis ŝin al si. Ŝi krietis mallaŭte, sed Cor diris ke tiamaniere ili havas la plej bonan kamuflon. Kiam la virego estis preterpasinta, Cor kriis: "Nun!"

Hannie direktis la pistolon al la Germano kaj pafis. Anstataŭ pafo sonis klako. Ŝi ree provis kaj ree.

"Bonege," ŝi aŭdis Cor diri, "vi eltenis bone. Formetu tiun objekton nun."

La S.D.-ano kriis al Cor: "Ĉu sukcesis?"

Tiam li proksimiĝis al ili. Rigida pro timo Hannie estis travivinta ĉion.

"Saluton," diris la S.D.-ano. "Ĉi tio estis testo de kapableco kaj fidindeco. Mi estas Frans, via komandanto."

Hannie estis furioza. Ŝi ne volis doni la manon al Frans. Larmoj pro indigno fontis en ŝiaj okuloj. La du viroj eksplikis al ŝi, kial ili unue faras tian teston kaj nur poste donas la verajn ordonojn.

Tion ŝi ja komprenis, sed kiam ŝi rakontis tion al mi, ŝi diris ke ŝi estis same kolerega kiel Freddie kaj mi post nia testo.

19. La provizora malsanulejo

Panjo devas transloĝiĝi, foriri de la homoj ĉe kiuj ŝi kaj Robbie kaŝloĝas," Freddie venis rakonti al mi. "Ŝi reagis al anonco en Dieren. Eble tio sukcesos."

Rakontante Freddie desegnis cirklojn kaj liniojn sur la paperfolio antaŭ si. Ni malhavis la familiovivon.

Post pluraj tagoj panjo ricevis la leteron, ke ŝi povos veni kun siaj infanoj. Ĉi tiun fojon ŝi ne volis foriri sen Freddie kaj vole nevole ili triope iris al Dieren. Ili havis agrablan periodon tie kaj post kelkaj semajnoj ili aspektis jam multe pli bone.

La tempo iris rapide en la militjaroj. Jam post kelkaj monatoj mia patrino transloĝiĝis al Enshedeo. Ankaŭ mi postvojaĝis ŝin. La tero en Harlemono fariĝis iomete tro varmega sub niaj piedoj. Frans disigis mian grupon. Ni interkonsentis ke post kelkaj semajnoj li ricevos komunikon de ni sur interkonsentita loko.

Ĝuste en tiu periodo Enshedeo estis multfoje trafita de intensaj bombadoj. Alveninte mi vidis ke la strato en kiu mia patrino havas ĉambron estas grave difektita. Trans ruinaĵon kaj polvon, laŭ bombkrateroj, mi fine venis al la loko kie mi devos trovi mian familion. Ne estis antaŭpordo kaj inter la nepriskribebla ĥaoso mi preskaŭ ne rekonis la aĵojn de mia patrino.

Feliĉe mi malkovris ŝin. Ŝi estis parolanta kun iu. Ĝojege ni ĉirkaŭbrakis nin. Ni ankoraŭ estis kompletaj. Ne viktimoj en la familio. Ankaŭ nia onklino Griet (Ĥrit), fratino de mia patrino kaj onklo Lo, ilia filo Andries kaj lia edzino ankoraŭ vivis. Estis multe da mortintoj kaj vunditoj.

Post duonsemajno de ordigado kaj najlofermado de ĉio kio malhavis vitron aŭ pordon, Freddie kaj mi trovis laboron en la provizora malsanulejo Twente en Veenstrato. Farinte kelktempe mastruman laboron ni estis akceptitaj en la 'blanka-muŝoron', por eduko kiel flegistinoj. Flegistino Kriege, malgranda decidema virino, estis la direktorino de ĉi tiu evakuado-malsanulejo.

Kronikaj malsanuloj el Zelando kaj aliaj regionoj kiuj estis deklaritaj militistaj terenoj de la nazioj, estis akceptitaj en ĉi tiu malsanulejo. Spite la manko de validaj dokumentoj, identigiloj, kuponaroj k.t.p. ni povis resti. Flegistino Kriege komprenis ankaŭ sen ekspliko ke ni estas 'bonaj'.

Ŝi rigardis al ni per siaj humorplenaj sagacaj okuletoj kaj prenis nin sen komento je la kubutoj. "Konsentite, konsentite, mi prezentos vin al la kuiristo."

Kelkajn feliĉajn monatojn ni laboris en ĉi tiu malsanulejo. Protektataj de flegistino Kriege, ekstre dorlotataj de la kuiristo kaj en la oficejo Hooyberg kaj van der Horst fermetis la okulojn koncerne la kuponarojn.

Sed ni ne nur flegis kompreneble.

Per onklino Griet, ankaŭ rezistlaborantino, ni ricevis ordonon de Frans formi sabotadgrupon. Kun la hejtisto de la malsanulejo ni faris brulbombetojn en VIM-ujoj. Kaj batarmilojn el plumbaj tuboj. Li konis pli da fidindaj homoj en Enshedeo kaj kune ni faris multajn sabotagojn.

Iun tagon la direktorino anoncis al mi dum mia posttagmeza servo ke du virinoj alvenis por mi. Mi rigidiĝis sed demandis kiel eble plej normale ĉu mi do povas foriri unu momenton. "Iru do," diris la direktorino kun senemocia vizaĝo. "Kaj he..., se vi havos seriozan diskuton, vi povos uzi mian ĉambron." Mi alrigardis ŝin momenton. Ŝi ririgardis serioze.

"Dankon," mi diris kaj kun bateganta koro mi eniris la kuirejon, kie staris miaj vizitantoj. Onklino Griet, gaja kaj naiva. Apud ŝi gracila knabino, malkvieta kun altentiritaj ŝultroj, belegaj ruĝaj ondantaj haroj kaj akraj okuloj. Ĉeestis ankaŭ Freddie. Ŝi demande alrigardis min.

"Nu," ekkriis onklino Griet entuziasme, "jen via plej bona amikino!"

Por savi la situacion mi plej kore manpremis la etenditan manon de la supozita amikino.

"Kiel vi fartas? Kiel vi fartas?" mi plezurkriis kun mistoniĝanta voĉo.

La ruĝulino sorĉis ridon sur sian vizaĝon.

"Bonege," ŝi diris.

Ni silentis kaj staris unu ĉe la alia, rigide kaj ĝisatendante. Surprizite onklino Griet rigardis de unu al la alia.

"Nu," ŝi diris tiam, "mi ekiras. Ĝis revido." Kaj ŝi malaperis rapide.

"Iru kun ni," mi diris abrupte.

La ruĝulino sekvis. Freddie saltete postvenis. Ŝi ne povis marŝi samrapide kiel mi.

En la komforta direktorejo ni eksidis, unu kontraŭe de la alia. Freddie eksidis apud min. Sub mia antaŭtuko mi havis malgrandan pistoleton en la poŝo de mia uniformrobo. Mi demetis la klikon.

"Kiu kaj kio vi estas, kion vi volas?" mi diris.

Mi estis treege streĉita. Fronte al mi sidis knabino, subite ne plu timega aŭ malkomfortsenta.

Ŝi rigardis min malvarme. Unu mano troviĝis en ŝia poŝo kaj la alia kuŝis sur la genuo kun pugnigita mano. Ankaŭ Freddie sidis streĉite. Neniu el ni moviĝis.

Se ŝi estas de la S.D. mi devas pafi nun, mi pensis.

"Mi estas sendita de Frans," ŝi diris subite.

"Kiu estas li?" mi demandis kvazaŭ mirigite. "Jes, vidu, sinjorino hm...?"

"De Wit," diris la ruĝulino tuj.

"Nu, sinjorino de Wit, ĉiu povas eniri ĉi tien kun ĉiaj pretekstoj. Ĉu vi povas esprimi vin iomete pli klare?"

Profunda silento ree falis inter nin. Momenton mi vidis en la okuloj de la kontraŭflanka knabino ion kiel: 'kio nun?' La silento fariĝis neeltenebla.

Neatendite mi ekridis nekvietigeble. Senŝarĝigite ambaŭ aliaj partoprenis. La ruĝulino ridegis. Estis tia liberigo, tiu ĝislarma ridado, ke la mirigita direktorino ekrigardis en sian ĉambron.

"En ordo, en ordo," mi svingsalutis al ŝi.

Ni forviŝis la larmojn.

Montriĝis ke ankaŭ Hannie (tiel ŝi nomiĝis) havas sian pistolon pafpreta.

Frans estis dirinta al ŝi ke ni ne timas uzi nian armilon ĉe danĝero. Hannie konfesis al ni ke ŝi timis la konfrontadon, ankaŭ pro nia reputacio kaj niaj tujaj decidoj. Ni estis senŝarĝigitaj ke ŝi montriĝas esti vere ĉe la bona flanko. Jam kelktempe ŝi laboris kun Jan Bonekamp kaj Witte Ko (blanka Jakobo) de la Zaan-regiona grupo, viroj kies

rezistagojn ni konis. Ni sciiĝis ke ŝi ĉeestis malsukcesintan armiltransdonon, dum kiu Wim Groenendaal (Vim Ĥrunendal), iu el nia grupo, per kuglo estis vundita en la dorso. Ni forgesis la tempon kaj daŭrigis la paroladon.

Hannie sciis jam multon pri ni. Evidente Frans estis informinta ŝin. Kvankam ĝenis iomete ke Frans senĝene kontraktis alian en nia loko kaj ke ni ne plu estas la nuraj knabinoj kiuj faras ĉi tiun laboron, ni adiaŭis kiel amikinoj.

Kiam unu semajnon poste ni reeniris la stabejon kiel kutime, la knaboj estis kiel fratoj por ni. La aventuroj estis interŝanĝataj reciproke kaj regis ĝoja kaj ekscitita etoso. Ni sciiĝis ke Wim bone resaniĝis. La kuglo estis forigita kaj li estis prizorgata bone. Frans kore bonvenigis nin nome de la knaboj kaj li rakontis ke Hannie laboras en la Zaan-regiono kun Jan Bonekamp. Ni estis ree 'hejme' kaj eklaboris po du kiel kutime.

Tiun tagon Freddie kaj Cor, malgranda Jan kaj mi bruligis Wehrmacht-garaĝon. Nia sukceso vigligis la tutan grupon.

20. Hannie

Mi estis farinta kelkajn 'laboretojn' ĉe kiuj pluraj homoj vidis min kaj nun mi devis kaŝi min kelktempe. Mi ne montris min sur la strato kaj mi ne povis iri hejmen. Oni jam trovis alian adreson por mi.

La edzo de la familio ĉe kiu mi loĝis, laboris en fabriko de la Wehrmacht. Li havis 'Ausweis' (germane: paskarto) por promeni ekstere je malkonvena horo. Ni kopiigis lian Ausweis por uzi ĝin dum niaj agadoj. Li estis tre tima viro kaj lia edzino estis se eble ankoraŭ pli tima. Tamen mi sentis min sekura tie dum tiuj kelkaj tagoj. Mi provis agi kiel eble plej diskrete. Sed mi ne sukcesis agi laŭ la plaĉo de la virino.

Tiun matenon jam je la sepa Hannie staris antaŭ la pordo. Piedfingre mi malsupreniris la ŝtuparon kaj malfermis la pordon. Mi tenis la fingron sur miaj lipoj kaj gestis al ŝi eniri. Mi estis ĝojega ke mia izoleco estas trarompita. Tiun tagon mi denove estis laboranta kun la grupo. Mi estis ricevinta alian identigilon.

Hannie transdonis al mi novan F.N.-pistolon. Mi ruĝiĝis kaj rigardis ŝin.

"Ĉu ankaŭ vi havas tian?" mi demandis.

"Jes," ŝi diris serioze kaj ŝi ridetis pro la indigna trajto sur mia vizaĝo. Kiel oni pensas ke tia digna knabino kondutos se ŝi estos en granda embaraso? mi pensis.

"Mi jam havis mian fajrobapton," diris Hannie dum ŝi rekte rigardis al mia vizaĝo. "Kune kun Jan. Ni ne sukcesis tiel kiel Jan imagis, sed la perfidulo neniam plu parolos."

Mirigite mi rigardis ŝiajn malgrandajn manojn, ŝian decideman mentonon, ŝiajn okulojn. Ŝi diris la veron, mi sciis kaj mi konsciis ke je la unua renkontiĝo en la provizora malsanulejo en Enshêdeo ni sciis nenion pri ŝi. Ankaŭ hodiaŭ, ĉi tiun streĉan matenon de rekomenco, kiam mi revidus la knabojn, ree senti min utila, ankaŭ nun mi daŭre ne scias kiu Hannie vere estas. Ŝi ankaŭ observis min. En ŝiaj okuloj mi povis legi ke ŝi komprenas mian indignan necerton, mian antipation pri denova incito en nia grupo.

Mi igis ŝin atendi en la koridoro kaj kolektis miajn malmultajn aĵojn. Mian ĉambreton mi jam antaŭe ordigis. Hieraŭ vesperon Frans mem venis por prepari min ke iu venos por akompani min, sed mi ne havis eblon atentigi la homojn de ĉi tiu adreso ke mi foriros por ĉiam. Mi frapetis sur la dormĉambropordo kaj malfermis ĝin mallaŭte. La virino restis dormanta. Mi staris senmove kaj fiksrigardis ŝian kapon. Senhara kapo. Ŝia peruko troviĝis sur la noktoŝranketo.

Senbrue mi fermis la pordon. Subite mi komprenis ŝiajn amarajn rimarkojn pri mia sana koloro, pri mia dika hararo. Tiu virino certe estis grave malsana.

Mi skribis ĝentilan adiaŭletereton kun la mesaĝo ke mi ne kuraĝis veki ŝin. Mi dankis ŝin kaj petis transdoni miajn salutojn al sia edzo.

Mi ne estis parolema tiun matenon, Hannie jes, neatendite. Ŝi rakontis pri siaj amikinoj, pri siaj studentjaroj, sia studado, sia loĝejo.

En nia grupo ni jam ekhavis alian novulon, Henk, junan studenton. Ankaŭ li parolis iomete afekteme. Ili parolis de el tute alia mondo, ni opiniis. Estis ja strange, ke per tio la tre bruta lingvaĵo de la aliaj estis iomete moderigata. Ni reciproke adaptiĝis.

Nu, mi pensis, kia estos la renkonto kun Cor, nia konstruisto kiu ĉiam malkaŝe diras kion li pensas. Je mia miro tio okazis tute alie. Cor kaj Hannie jam konis unu la alian kaj interrilatis tre amike.

Ni estis alvenintaj en 'stabejon' kaj ĉio estis iomete nekutima. Ni ĝojis revidi nin. La ŝercaĵoj flugis tien kaj reen. Bonanime ĉiu estis primokata. Unuj provis esti ankoraŭ pli spritrespondaj ol la aliaj. Hannie ridis pri niaj ŝercoj.

Kune kun Freddie kaj mi ŝi ekiris. Ŝi akceptis afable kaj sen venĝemo ke Frans donis la gvidadon al mi. Ŝi estis proksimume tri jarojn pli aĝa ol mi kaj loĝis jam kelkajn jarojn en luita ĉambro en Amsterdamo, mi sciiĝis de ŝi.

Freddie kaj mi, devigate iri de adreso al adreso, treege deziris ree loĝi en la familia rondo. Hannie kontraŭe ne volis pensi pri tio. "Fu," ŝi diris, "tiu ĉikanetado."

"Ĉu vi do ne amas viajn gepatrojn?" demandis Freddie, preskaŭ severe.

"Jes, stultulino, nur alimaniere ol vi. Vi adoras vian patrinon, sed tio estas malproksime de mi," ŝi diris ridante.

Ni ambaŭ silentis. Momenton Freddie kaj mi erarkredis nin hejme. Flankenrigardante mi vidis palan Freddie, kiu rigardis tiel konfuzite ke Hannie metis sian manon sur ŝian ŝultron.

"Venu, knabinoj, ni ekiru," mi decidis, "kaj he..., kion signifas adori precize, Han?" Tiam estis la vico al Hannie esti mirigita. Jes, ni lernis multon unu de la alia tiutempe. Iom post iom sincera amikeco kreskis inter nia triopo.

21. Hannie kaj Jan

Hannie ree kunlaboris kun Jan Bonekamp. Ili forestis, nun jam kelktempe. Ni sciis ke ili faras 'taskon', sed kion precize neniu sciis. Kaŭzis ja indignon, ke unu el ni povas labori sen Frans.

Per Katja, nia kurierino, kiu ĉiam ĝoja kaj gajhumora biciklis de adreso al adreso sur sia peze ŝarĝita biciklo, ni sciigis ke ili ankoraŭ ĉiam bivakas en la Zaan-regiono. Katja ekhavis teleron da akveca supo kaj Cor donis al ŝi pecon da pano. Ŝi restis ĉiam afabla, malgraŭ sia malsato kaj laceco.

Ni, Freddie kaj mi, parolis kun Cor pri Hannie. Speciale ŝia studenteco kaj ŝia karaktero estis temoj de nia parolado. Komence ni ĉiuj estis iomete kritikaj pro ŝia digna prononcado, ŝia silenta ĉeesto, ŝiaj tamen iomete akraj paroleksplodoj se io ne estis kiel ŝi deziris.

"Sed laŭ mia opinio ŝi estas tre afabla kaj kara!" diris Freddie.

"Ŝi estas bonega knabino kaj rapidresponda," opiniis Cor, "sed tamen ŝi estas de alia speco, mi diru, same kiel Henk."

Maĉinte ion li sputis ĝin trafkapable en la karbuĵon. "Jen," li diris, "mi volas diri, se tia knabino estos kaptita, kio do postrestos de tiu 'partizaneco'?"

"Pri tio vi scias nenion, frato," mi enmiksiĝis sufiĉe akre. "Vi atentu foje ŝiajn okulojn, tiuj estas okuloj de unu el ni!" Kaj mi prenis la cigaredan tabakon kaj rulfaris cigaredon. Tiu stulta ruĝiĝado ĉiam, mi pensis, estas ja strange diri ion tian kaj mi klinis la kapon.

Dum la mallonga tempo kiam Hannie estis ĉe ni antaŭ ol fari propran laboron kun Jan laŭ ordono de distrikto Zaan-regiono, ni ĉiuj ege ekŝatis ŝin. Evidentiĝis ke ŝi, same kiel Henk, tamen harmonias en nia skipo. Pli evidente, la diskutadoj fariĝis pli solidaj, pli interesaj. Ilia kontribuo al la reciproka interrilato estis vere pozitiva.

La trafaj rimarkoj de Henk kaj la sekvantaj diskutadoj konsciigis nin pri niaj vidpunktoj.

La plejmulto el ni ne konis Jan Bonekamp. La fojojn kiam mi renkontis lin oni povis nombri per la fingroj de unu mano. (nederlanda esprimo pri 'malofteco') Malgranda, fortika laboristo kun agrabla, iomete impertinenta mieno. Brunaj bukloharoj, spitema mentono kaj paro da malmolaj manegoj. Mi tre bone memoris lian sufiĉe fortikan manpremon. Dum du tagoj mi ne povis ludi gitaron... Por ĉiuj komandantoj en la Zaan-regiono kaj Kennemerlando li estis malfacila knabo. Tre opinitrudema, sed ankaŭ tre kuraĝa.

Ja bona virego por kune ekvojiri, mi pensis. Tamen mi opiniis la kombinon de Hannie kaj Jan ne ideala. Tiu silenta Hannie kaj tiu trokuraĝa, decidema Jan. Sed certe ili agos energie.

Mi iris 'hejmen': Wagen-vojo 24, la loĝejo de Nettie kaj Mari Andriessen.

Tiun vesperon Nettie frapetis sur mia ĉambropordo.

"Truus, alvenis knabino por vi."

Mi estis dormetinta kaj ekstaris dormebrie en la pordaperturo.

"Ha, Han," mi kriis entuziasme, "vi ĉi tie, kiel bonege!"

Mi tiris ŝin en mian ĉambron.

Sed Hannie ekploregis.

"Mi ne agis bone, Jan estas kaptita," ŝi plorsingultis.

"Silentu do," mi kriis timigite. Mi prenis glason da akvo por ŝi. Ŝi klopodis trinki, sed la tuta akvo fluis sur la vestojn pro ŝia skuado.

"Ĉu Jan vere estas kaptita?" mi tiam demandis.

"Mi biciklis for kaj Jan estas paftrafita," mi aŭdis ŝin rakonti intermite.

"Ho ne...!" Plue mi restis senvorta.

Iom post iom Hannie sin reregis iomete. Mi karesis ŝiajn harojn kaj esperis ke ŝi denove regos sin.

"Vi helpas min, ĉu ne?" ŝi kriis subite, "vi prenos lin el la manoj de la nazioj, ĉu, Truus?"

Mi kapjesis iomete stulte. "Jes, sed kiamaniere?"

Hannie rakontis ĉion. Pri la S.D.-ano Ragout (Ragu) biciklanta en Zandamo. Unue ŝi pafis kaj poste Jan.

"Ni estis interkonsentintaj ke post la pafado mi tuj biciklos for kaj tion mi ja faris," ŝi diris malsonore, ankoraŭ postsingultante.

"Ho, Truus, oni terenpafis Jan kaj mi ne reiris por savi lin."

"Vi ja ne povis scii ke li estas vundita? Morgaŭ ni vidu kion ni povos fari," mi decidis.

Per la rezistgrupo de Zaan, kiu havis propran bonegan informservon, ni sciiĝis ke Jan, grave vundita, estas operaciota en Wilhelmina Hospitalo. Ankaŭ la Zaan-regiona grupo konsideris liberigi Jan.

Tiun koncernan tagon ni gardestaris kiel eble plej neatentate en la najbareco de la hospitalo. Je ĉiu okazaĵo, je ĉiu nova ambulanca transporto ni rapidis por ne maltrafi ion de lia alveno. Post longtempe ambulanco haltis. Du forte armitaj S.S.-anoj eliris kaj du flegistoj enportis brankardon. Ni vidis la malhelan buklohararon de Jan super la litkovriloj. En tiu terura momento mi komprenis ke ni povas fari nenion, absolute nenion. Kien ni devus iri kun tiu grave vundita viro, ankaŭ se ni pafmortigus la du S.S.-anojn kaj devigus la flegistojn veturigi la ambulanon en la direkto de Harlemo?

"Ho, Jan, Jan," mi aŭdis Hannie flustranta.

Kiam la pordoj sin fermis mi kunprenis Hannie per delikata puŝo al niaj bicikloj. Kaŝe mi ĉirkaŭrigardis. La eblo ke S.D. enfaligis nin en kaptilon vere ne estis tre imaga. Hannie lasis liberan kuron al siaj larmoj.

Pli rapide, pli rapide, mi pensis. Mi pedalis mian veturilon en la direkto de Harlemo. Survoje sur la Amsterdama stratvojo ni estis kontrolitaj. Hannie surhavis kaptukon, ĉar ŝiaj okulfrapaj ruĝaj haroj devis resti kaŝitaj. Oni neniam povis antaŭscii. Ni povis pluri, ĉar ni havas nenion, ili opiniis. La F.N.-pistoło troviĝis simple en nia poŝo...

Kune ni iris al Frans kaj tiu portis la tute konfuzitan kaj malsanan Hannie al Lien kaj Harm Elsinga. Post kelkaj tagoj mi sciiĝis ke ŝi ekhavis parotiton. Ŝi estis vere morte malsana kaj restis daŭre en sia ĉambreto, sola kun sia malĝojo.

Poste, longtempe poste, ni sciiĝis kiamaniere finiĝis la vivo de Jan Bonekamp.

Kiam post la atenco li, kun ventropafo, tamen provis fuĝi, li frapetis sur la pordo de kelkaj maljunaj virinoj. Ĉi tiuj informis la policon!! Kompreneble tiu alvenis tuj. La tiama

polico estis plej ofte 'malĝusta'. La terenpafita Ragout estis policoĉefo kiun la rezistado atencis jam multfoje. Li estis fifama ne nur en la Zaan-regiono.

La malĝusta polico tuj informis la S.D. Tiu provis esplordemandi Jan. Pro tio ke li silentis oni venigis ĉe li dum la sekvinta nokto pretenditan rezistflegistinon, kiu flustris al li ke se li volos averti iun aŭ ion, ŝi povos fari tion. Ankaŭ la vertebraro de Jan estis trafita, li jam estis blinda kaj mortanta.

Li menciis la nomon de Hannie, supozante ke li parolas kun fidinda persono.

Li mortis sub neelteneblaj doloroj.

Tiun saman matenon la S.D. invadis la loĝejon de la familio Schaft. Per granda skipo ili traserĉis la domon. Jam longtempe Hannie ne plu loĝis hejme kaj la sinkaŝantino Filine estis reirinta al Amsterdamo. La gepatroj de Hannie estis arestitaj kaj kiel garantiuloj transportitaj al Vuĥto, kie ili restis malliberaj dum naŭ monatoj.

La haroj de Hannie estis tinkturitaj por preventi rekonadon.

Kiam ŝi ree prezentiĝis ĉe la skipo, ŝi estis tute alia Han ol antaŭe. Maldika, kun malbelaj, malbrile nigraj haroj kaj pala vizaĝo. Neniu tuŝis la temon Jan.

Kiam ni, fremde kaj senkonsile pri nia sinteno, faris la laborpreparolon kun Frans, Hannie petis la plej neblan taskon. La plej danĝeran laboron oni devis rezervi por ŝi. Ni ĉiuj silentis por ne plimalfaciligi ĉion por ŝi.

Ekstere sur la strato, survoje al unu el tiuj abomenindaj 'taskoj', kiuj bedaŭrinde devis esti farataj, mi flankenrigardis al Hannie. Mi vidis la obstinan vizaĝon de nekonata Hannie.

"Haltu," mi ordonis subite. "Jen, jen mia pafilo! Finu do ĉion nun, damne!"

Mi kriis senpere meze sur la strato.

"Partizanoj ne estas sinmortigantoj, ili almenaŭ pensas pri siaj kamaradoj sen endanĝerigi ilin je tia senseca maniero."

Sensaĝe ŝi staris sur la strato kun mia pistolo en la mano.

"Aĥ, sufokiĝu," ŝi ekkriis, ĵetegis la pistolon sur la straton kaj biciklis for.

Plorsingultante mi postbiciklis ŝin kaj ni repaciĝis en la jam senfoliiĝanta Haarlemmerhout.

Longtempe ni sidis sur benko apud la ŝildo: 'Malpermesata por judoj'.

22. 'Ĉi tio estas speciala komisio'

La 5-a de septembro 1944 eniris la historion kiel 'Dolle Dinsdag' ('Dolle Dinsdag' = furioza mardo). Tiun tagon multaj Nederlandanoj travivis momentan senton de liberiĝo.

La antaŭenmarŝantaj aliancarmeoj haltis apud la grandaj riveroj. La famo pri tio tamen disvastiĝis kaj kuris antaŭ la armeoj. Multaj homoj kun ruĝ-blank-blauaj flagetoj kaj oranĝkoloraj ornamaĵoj vane atendis la Anglojn kaj Kanadanojn ĉe la alirvojoj de la grandaj urboj. N.S.B.-anoj kaj germanemaj Nederlandanoj rapide fuĝis en paniko. Ekscitita kaj gajega etoso markis ĉi tiun furiozan mardon. Dum unu momento la homoj forgesis la singardon en rilato al la perfiduloj.

El Londono venis, ankaŭ la 5-an de septembro, la dekreto ke princo Bernard fariĝis ĉefo de B.S. ('B.S.' = Binnenlandse Strijdkrachten: enlanda militistaro). La kontraŭleĝaj grupoj devas unuiĝi kaj estontece oni devos labori sub komandanto enoficigita de la ekzila registaro. Ne ĉiuj enoficigitaj estroj estis veraj rezistantoj aŭ honestaj Nederlandanoj. Lando kiel la nia havas larĝan gamon da religiaj kaj politikaj konvinkoj, ankaŭ en tiuj jaroj. Kelkaj personoj, kiuj pro siaj gvidfunkcioj en entreprenoj aŭ publikaj servoj estis invitetaj fariĝi komandanto, estis kelkokaze malkuraĝaj, ja ankaŭ eĉ naziemaj homoj, kiuj povis senmakuligi sian pasintecon aŭ kaŝkomercadon per nuna aniĝo al B.S.

En ĉi tiu ĥaosa situacio ekestis milhoma armeo, urĝrapide kunmetita. 'Septembro-muŝoj' la veraj rezisthomoj nomis ilin, kaj inter la pli idealisme agorditaj rezistantoj de la unua horo regis amaro.

Ankaŭ nia rezistgrupo devis aliĝi. Pro tio ni ekhavis ankaŭ aliajn kontaktojn kaj estis ofte 'pruntedonitaj' dum armilfaligoj kaj armiltransportoj fare de grupoj ekster la nia. Tiamaniere ni konatiĝis kun grupo da detektivoj de la trajnesplorservo, rekte rangigita sub S.D. Ni estis kunlaborontaj kun ili dum la lasta militvintro kaj -printempo, ĉar ili volis nun oferi siajn servojn al B.S.

Ni estis rekte sub la kontrolo de la regiona komandanto, magistro Sikkel. Ni ja miris ke subite tiel multe da magistroj kaj universitataj diplomitoj troviĝas inter ni, sed nu, granda armeo ne atentis tian flankaferon, ni pensis. Krom la fakto ke en nia grupo regis dividita opinio pri la subite tro malkaŝa manipulado de adresoj kaj multe tro malzorga kontrolado de la antecedentoj de la novuloj, ni ankaŭ sentis nin nesekure. En tiu animstato de ni tiuj detektivoj venis ĝustatempe. Ni volis labori, batali kontraŭ la maljusteco, kontraŭ la senkompata teroro de la nazioj. Kaj ni ekhavis komisionojn, sed ni daŭre kontrolis kaj prikonsideris tiujn komisionojn. Precipe Freddie, Jan, Cor kaj mi iomete malfidis la novajn komandantojn.

Do regule ni biciklis en ĉia vetero de Harlemo al Hago por forporti paketojn. Oni insiste instrukciis nin protekti ĉi tiujn paketojn per nia vivo. "Tio estas speciala komisio," oni certigis al ni. Kiam mi unufoje, malsekega pro la pluvo, malvarma kaj malsata, portis leteron al magistro Engels, mi rajtis stari momenton sur la mato en la vestiblo.

"Atendu momenton, knabino," li diris kaj revenis kun kvaronguldeno(!) kaj kvar cigaredoj...

Plorante pro la insulto ne esti prijuĝata kiel vera rezistkamarado mi ĵetegis liajn donacojn antaŭ liajn piedojn kaj ĵetfermis la pordon malantaŭ mi. Li ja estis aliĝinta al la rezistado kun tute aliaj motivoj ol mi.

Dum unu el tiuj severaj vojaĝoj Freddie diris subite: "Knabinoj, mi estas lacega. Ni haltu ĉi tie!"

Ni eksidis sur ŝtonan mureton, malsekaj pro la neĝblovadoj.

"Kial ni foje ne malfermu tian paketon?" demandis Freddie. Medite Hannie rigardis al ŝi.

"Jes, kial ne?" ŝi diris.

Kun multe da pacienco mi pene malligis la ŝnuretojn.

Senparole ni rigardis belegajn juvelojn kaj du paketojn da cigareda tabako...

"Damne, ho damne!" mi kriegis kolerege.

Mi volis ĵeti la tutan aĉaĵaron en fosaĵon, tiel mi indignis. Hannie ploris pro kolerego kaj kriis: "Estas ĉi tio, kion ni devis protekti per nia vivo?"

La sinjoroj interŝanĝis cigaredojn, juvelojn kaj aliajn aĵojn kun siaj hagaj vasaloj, per nia devokonscienco, nia idealismo, nia sindediĉo kiel rezistbatalantoj.

Kiam mi petis klarigon, oni rakontis al ni ke oni uzas la aĵojn por subaĉeti S.D.-anojn kaj tiamaniere liberigi niajn homojn...

"Jes, jes," mi diris. Estis la lasta paketo kun sia 'por-la-batalo-tiel-grava' enhavo kiun ni estis forportintaj.

"Ruzuloj ili estas, tiuj belaj knaboj kun la kravatoj," diris Cor.

"Atentu, knabinoj, estas la devizo de Cornelios. En tempo kiel ĉi tiu, ratoj profitas la okazon." (nederlanda esprimo: ratoj estas ruzegaj homoj)

23. Lastmomente...

Tiun tagon ni estus donontaj krudan baton al S.D.

Dense kunigataj ni ĉeestis en la malgranda domo en H. Rozen-aleo. Frans dividis la taskojn, denove kontrolis la pistolojn kaj priparolis kun ni la fuĝvojon. Hannie ekiros kun Cor, Freddie kun Frans kaj mi kun malgranda Jan.

Frans maltrankviliĝis iomete. Ni ekiris antaŭ kontortempo.

Ni iris en la direkto de la rivero Spaarne. Ni havis la komision doni la perfidulan meritaĵon al la nederlanda S.D.-ano Smit.

Por ne kapti la atenton ni ludis la konatan rolon de enamiĝinta pareto.

Jan estis multe malpli granda ol mi kaj nia amindumado pasis iomete penige.

Nervoze subridante mi rigardis de tempo al tempo al la antaŭpordo tra kiu Smit estis eksterironta.

Subite tio okazis.

Li surhavis flavgrizan pluvpalton kaj diris ion al sia edzino. Ni rekomencis nian intiman ĉirkaŭbrakadon, kiel eble plej konvinke. Mi sentis ŝpruceton da ŝvito juki laŭ mia dorso.

Smit ĉirkaŭrigardis spionante kaj suriĝis sian biciklon. Mallonge ni atendis kaj tiam, man-en-mane ni postbiciklis lin je sufiĉe da distanco.

"Nun," diris Jan kaj ni pedalis pli rapide. Kiam ni estis proksime de li ni ambaŭ prenis niajn pistolojn. Mi pafis kaj la pafo de Jan eksonis samtempe. La S.D.-ano falis, sed li ankoraŭ ne estis morta. Ni preterpasis lin. Jan turnis sin fulmrapide kaj pafis denove. La virego returnpafis kaj trafis la kruron de Jan. Lame li venis al mi.

Mi levprenis lian biciklon.

"Ĉu vi povas bicikli, Jan?" mi demandis time.

"Jes, jes, foriru!" li kriis.

"Sed li vivas ankoraŭ..!"

Li ne rajtis paroli. Ni denove reiris kaj de sufiĉa distanco Jan celis al lia kapo. Estis trafe. Fulmrapide ni estis ĉe lia korpo, malplenigis liajn poŝojn kaj Jan prenis la pistolon.

De ĉiuj flankoj alvenis homoj.

"For," diris Jan kaj pafis en la aeron. Ni biciklis kiel eble plej rapide, sed fariĝis por Jan ĉiam pli malfacile turni la pedalojn. Mi puŝis lin kaj daŭre postrigardis ĉu oni ne sekvas nin. Feliĉe tio ne okazis.

Mi kondukis Jan al bonaj amikoj, kiuj konsultis amikan kuraciston.

Poste ankaŭ Hannie montriĝis vundita. Mi trafis ŝin ĉe Annie sur la divano, kun neĝblanka vizaĝo. Ni kunportis ŝin sur la biciklo al nia propra kuracisto, mi timis ke ŝi mortos pro sangelfluo kaj forgesis mian kutiman singardon.

"Kie estas la kuracisto?" mi parolis krude al mirigita virino staranta en la koridoro. Ŝi rigardis timigite la pistolon de Hannie kiu elŝvelis el la mantelpoŝo kaj fingromontris supren. Spiregante mi suprenportis Hannie.

Ne estis tre grave, ni alvenis ĝustatempe ĉe la kuracisto.

Post kelkaj semajnoj da ripozo ĉe la afabla familio Ter Horst, Hannie ree estis la sama.

Ankaŭ Jan baldaŭ rebonfartis.

24. La knabeto Loetje (Lutje)

La tristan historion de malgranda juda knabo mi sciigis unuafoje de la Zaan-regiona kurierino Rietje (ritje). La knabeto estis sinkaŝanta jam dum proksimume ok monatoj en kelo, tute sola. Kiam mi aŭdis ĉi tion mi pensis: En kelo? Ion tian do oni ne faras... Tian knabon oni ja venigu supren? La homoj kiuj loĝigis ĉi tiun sinkaŝanton estis honestaj burĝoj. Verŝajne devokonsciaj civitanoj kiuj pro kredo aŭ konvinko estis komplezaj sinkaŝigi rifuĝinton. Ho, mi ja scias, estas danĝere. Oni ne nur devis atenti pri la nazio, sed ankaŭ pri la personoj kiuj avidas sensacion, kalumniantoj, perfiduloj. Sed infano en kelo..? Mi koleregiĝis pli kaj pli, dum Rietje detale parolis pri ĉi tiu malamiko de la nazioj.

En kunsocio de mia komandanto mi trovis alian adreson por li en Bentveld ĉe riĉaj, ĉarmaj homoj kiuj posedis alte ĉirkaŭmuritan ĝardenon kaj ne havis najbarojn. Kun varma kaj agrabla sento mi ekiris por rakonti tion al mia komandanto. Li estis sciiginta al la virino ke la knabeto gastloĝos sur alia adreso, pretende pro sekurecmotivoj. Bedaŭrinde la gepatroj de la knabo ekhavis sugeston pri la subita translokado de sia infano, per kio mia plano fariĝis nefirma. Ili deziris havi sian filon kun si. La seniluziigo ĉe la Bentveldanoj, kiuj jam sentis sin kiel nutrogepatroj, estis granda. Konfuzite mi faris mian rakonton. Malĝoje ni adiaŭis kvankam ni vere komprenis ke tiuj nekonataj judaj gepatroj sentas timon kaj indignon same kiel ni.

La sekvantan tagon mi estis kondukanta la knabeton al liaj gepatroj kiuj kaŝloĝis en Hago.

Bone, homoj estas malfortaj kaj kelkfoje fortaj. Malforta mi estis, kiam en la frua mateno mi vidis la knabeton staranta sur la granda malplena placo. Multe tro granda vaska ĉapo kaj tre malgranda valizeto estis ĉio okulfrapa pri li. Mi estis tro emociita por tuj iri al li. Damne, tie do staris malamiko de Hitler! Ho, mi devis batali kontraŭ miaj larmoj, mia kolerego kaj mia nepovo.

Tie li staris, tiel sola kaj konfuzita. Kiel plenkreskulo ĉi tiu kvinjara knabeto devis pretigi ĉi tion. Li diris al mi la sigalvorton kaj per sufokita voĉo mi diris la mian. Ĉu mi iam forgesos tiujn okulojn? Okuloj de maljuna saĝa viro en infanvizaĝo. Neniam mi malamis la naziecon tiel intense kiel en tiu momento. Li diris al mi ke li nomiĝas Wimpie De Wit. Mi sentis mian sangon elflui el mia kapo. Oni ja ne povas montri sian emocion al tia infano? Oni ja male devas kaŝi tiun tre bone - ĉu ne?

"Ha, vi, kompreneble vi nomiĝas Bennie aŭ Sammie," mi diris kun stranga mieno. Kun iomete oblikva rideto li diris al mi ke li nomiĝas Loetje (Lutje).

"Venu, Loe," mi diris, "ni foriru de ĉi tie. Oni neniam povas antaŭscii pri tiuj fi-nazioj." Ni promenis en la direkto de Hout.

Tie estis cervoparko, sed jam antaŭ longe tiuj bestoj malaperis en la kaserolon.

Kiam mi flankrigardis al Loetje, ĉio fariĝis tro emocia por mi. Mi terenĵetis mian biciklon kaj surgenuiĝis ĉe li. Li ĉirkaŭbrakis mian nukon kaj kune ni ploregis.

Sed ni ne povis daŭre ploraĉi tiel. Mi ankaŭ opiniis ke mi traktu lin alimaniere, ne tro ameme, ĉar kiel oni vidas, ni ambaŭ rompiĝis pro tiu.

"Venu, Loe, ni ekiru," mi diris.

Ni purigis iom nian vizaĝon kaj li surgrimpis la biciklon malantaŭ mi. Mi rakontis al li pri nia rezistgrupo, streĉajn kaj ŝercajn aferojn. Estis ja tre malfacile trovi la ĝustan parolmanieron por rakonti ion al kvinjara infano kiu rigardas kiel plenkreskulo.

Mi babiletis nur iomete, daŭre penante trovi iom de mia bravuro, de mia mio. Mi sentis min treege mizere post tiu eksplodo. De tempo al tempo ni deiris kaj sidiĝis sur la vojborderon. Mi rakontis ke mi kondukas lin al liaj gepatroj. Nu, pro tio li tute vigliĝis. Li ruĝiĝis. Li eĉ ekrakontis propravole:

"Vi sciu, mi havis amiketon, tie ĉe sinjorino K."

Mi rigardis vere senparole pro miro.

"Jes," li ridis, "tie estis museto kaj ĝi venis ĉiun tagon kaj eksidis sur mian manon. Vere!" Li suprenrigardis ĝoje al mi, tre fiere. Tiel li estis vere malgranda knabeto.

Iun momenton kelkaj kamionoj kun Germanoj preterpasis. Unu el la Germanoj ĵetis panpecon al ni, kvazaŭ ni estas bestoj. La knabeto mansvingis returne... Ni manĝis de la pano laŭvice. Kiam ĝi estis formanĝita, mi ekkantis kantetojn. Mi mem havis malgrandan frateton kaj pro tio mi sciis multajn infankantojn.

"Diru," mi demandis al li, "ĉu vi ne scias iun kanton? Nu, kunkantu kun mi." Ni biciklis plue survoje al Hago. Li havis altan ĉarman voĉeton. Laŭtvoĉe ni kantis: "Polly, ons gaan perl toe," sudafrikan kanteton. Nun, post multaj jaroj, mi ne povas kanti ĝin sen aŭdi lian altsonan voĉeton kaj senti liajn manetojn en miaj flankoj, ĉar li sidis tiel plenfide malantaŭ mi. Tiamaniere ni proksimiĝis al la fabrikoj de Sikkens.

Neatendite furioza fajro tondris ĉirkaŭ ni. Grandaj truoj ekiĝis en la pavimon kaj la homoj kiuj estis biciklantaj antaŭ ni, kuŝis laŭ kaj sur la vojo kiel difektitaj pupoj. Brakoj, kruoj, sango, polvo, jes multe da polvo kaj bruoj. Ni ne estis rimarkintaj ke kolono da germanaj kamionoj pasis tra sub la viadukton. Ni ne estis aŭdintaj la proksimiĝantajn anglajn bombaviadilojn. La 'tri fratinoj', kiel tiuj anglaj ĉasantoj popole estis nomataj, malfunkciigis la motorojn alte en la aero kaj plonĝe entreprenis la atakon.

Tro malfrue por serĉi ŝirmon! Tro malfrue ankaŭ por mia eta amiko. Grenado estis trafinta lin. Li falis de mia biciklo. Ankoraŭ ĉiam miaj manoj estis fiksitaj al la stirilo. Mi kriegis kaj kriegis. Kiel frenezulo mi biciklis for, hurlanta kiel vundita besto mi pedalis, for de tiu loko. Mi nur haltis kiam iu ĵetis sian biciklon antaŭ min. Li frapis en mian vizaĝon. Ĉie estis sango kaj polvo. Oni kunportis min al domo en la ĉirkaŭaĵo. Oni lavis kaj trinkigis min. Tute sensenta mi kuŝis tie.

Poste mi biciklis returne al Harlemo. Kiam mia kontaktulo aŭdis mian koncizan rakonton, li suspiris: "Jes, knabino, kaj tamen tiuj homoj tie en Hago devos scii kio okazis."

Post du tagoj mi iris la saman vojon. Duonvomante mi preterpasis la fabrikojn de Sikkens. Malsana pro mizero mi prezentis min ĉe la gepatroj de Loetje. Tre mallaŭte kaj plorante mi rakontis al ili la dramon.

La viro perdis sian sinregadon. Kriegante li batis min ĝis lia edzino kaj kelkaj aliaj homoj fortiris lin de mi. Senkontraŭstare mi lasis lin. Mi sentis min tiel kulpa. Poste, kiam li plorsingultis kun la kapo sur la tablo kaj lia kompatinda edzino devis rekonsciigi lin per akvo, mi forŝteliris tre kviete el la domo.

Post kelka tempo V-2 raketo falis sur tiun Hagan kvartalon. Ankaŭ la gepatroj de Loetje estis inter la viktimoj.

25. La likvido de H.

Silento ekestis en la grupo post tondra parolado de Frans. La perfidulo de multaj Harlemaj rezistanoj eskapis nin.

"Stultaĵo!" kriegis Frans. "Senokupe vi pasigis la tempon ĉi tie anstataŭ atenti! Mi damne ne povas foresti dum kvin tagoj sen ke ĉi tie regas agrabla pasiva etoso!"

Estis vere. Regis granda senkuraĝeco en la grupo la lastan tempon. Multaj laboretoj kiujn ni entreprenis, estis malsukcesintaj aŭ malsukcesontaj. Aŭ ni ne havis la ĝustajn informojn aŭ la gvatsekvado misiris. Ni havis tre malbonan semajnon post ni.

La milito daŭris tiel longe. Henk estis enamiĝinta kaj spiritforesta. Freddie estis ridema kaj kolerigis nin ĉiujn per sia ĝene ĝusta analizo de nia malsukceso.

Hannie estis medite rigardanta al Freddie. Cor esprimis tute novan blasfemon kaj rulfaris cigaredon. Li cirkuligis tabaksakon kaj cigaredpaperon. Malafable Frans malakceptis lian tabakon.

"Nu, geknaboj, kion ni faru?" demandis Ksander, "daŭre tede ripetadi ĉi tie estas senutile." Li palpebrumis al mi. Sed la malbonhumora etoso ne volis foriri.

Cor rakontis troigitan rakonton pri rezistgrupo en Kromenio. La temo estis, ke en iu urbdomo en la Zaan-regiono oni rulvolvis la malfidindan urbestrion en lian propran tapiŝon, buŝoŝtopis lin kaj foriris kun ĉiuj stampiloj, kuponaroj, identigaj paperoj, k.t.p.

Grandega bravuraĵo! Ĝi donis al ni vigliĝon!

"Jen, homoj, ni devas kunordigi multe pli bone," diris Frans. "Freddie devos paroli kun Annie por sciigi kie troviĝas la fripono. Annie havas kontaktojn en la tuta Nederlando, ŝi povas ekhavi la informojn." Frans diris tion kun tiom da konvinko ke ni ree ekhavis esperon kapti ĉi tiun murdiston.

Ni devis atendi ankoraŭ longtempe. Semajnoj forpasis. Intertempe la nazioj pliseverigis siajn aranĝojn. La fervojstrikto de la 17a de septembro estis la okazaĵo instiga al tio. Nederlando devis esti punata pro tiu amasa rezistado. Oni ekmalgrandigis la nutraĵporciojn. Burĝoj estis forprenitaj de siaj loĝejoj kaj devis gardi ĉe pontoj, konstruaĵoj kaj stacidomoj. Ili devis fosi truojn laŭ vojoj kaj fervojlinioj, tiel nomataj 'logs'. Estis tre malfacile manumi la fosilon kun maldika, malsata korpo. Tiujn, kiuj rifuzis, oni transportis al Germanio.

Nia popolo estis turmentata kaj malestimata kaj nun ankaŭ la malsato kiel nevidebla fantomo krom la timo kaj necerteco eksuferigis la homojn. Kaj ekzistis la perfido.

Perfido pro mono, pro rivaleco, pro malgrandanima kalumnio. La S.D. havis ĉie siajn kunlaborantojn.

La fantomo de la timo estis ĉie. La kontraŭleĝa gazetaro provis kuraĝigi. Kurierinoj portis la gazetojn al malproksimaj distriktoj, en ĉia vetero, laŭ la kontrolejoj de la nazioj, tra paflinioj kaj bombadoj.

Ĝuste en tiu tempo de mizero kaj manko la fortika amikeco de nia grupo estis des pli firma kaj des pli batalpreta.

Finfine Freddie alportis la sciigon ke oni rimarkis kvaron da S.D.-viroj en la ĉirkaŭaĵo de Driehuis. Unu el ili havigis al si amatinon en Sud-Harlemo. Freddie ekinformiĝis. Ŝi malkovris ke la fripono koncernas iamaniere la proviantadon. "Ni donu al li kuketon de propra pasto, la fripono," ŝi diris.

La listo de viktimoj estis fariĝinta pli granda kaj ni ĉiuj hontis iom ke ni lasis okazi tion. Li devis malaperi. Per Kees, polica esplorservisto, ni sciigis proksimume kiu hore la fripono estas hejme. Freddie estis aranĝinta la tuton. Ĉiun agadon kaj ĉiun adreson kiun la perfidulo vizitis, ŝi notis ĉiuhore, tiel ke Hannie kaj mi sciis precize la horon por viziti lin.

"Ĉu li havas infanojn?" mi demandis al Freddie.

"Kompreneble ne, tiu fripono ne havas tempon por io tia," ŝi diris malestime.

En nia ĉambreto ĉe familio Elsinga Hannie beligis sin. Amare mi rigardis al ŝia brozado kaj pudrado de la vizaĝo. Neniam okazo agrable eliri, neniam okazo danci, neniam ŝanco esti ĉirkaŭbrakita de knabo. Ĉio ŝajnis tiel senutila, la ŝminkado, la beligado. Por la morto, mi pensis. Post nelonge povus veni la fino.

Malafable mi donis la signon por foriri. "Ni alvenos tro malfrue por tiu fripono, se vi daŭrigas tiamaniere."

Sed oni ne povis kolerigi ŝin.

"Truus, mi mortos pura kaj bela, mia kara," ŝi diris dramece. Ŝi prenis sian pistolon kiun mi jam estis kontrolinta por ŝi. "Preta!" ŝi diris, "ek al nia S.D.-amiko, ni sentigos lin kion signifas esti perfidulo, homĉasanto."

Decideme ŝi prenis sian tekono kaj ni iris malsupren. La familio Elsinga sidis ĉirkaŭ la lernejtasko de la filo Ruud.

"Saluton, ĝis baldaŭ!" diris Hannie. Mallerte mi svingsalutis en la direkto de la familio. Mi ne estis en la animstato por esti afabla.

Ni biciklis al la loĝejo de H. Freddie estis sur sia posteno. Ĉiam oni povis esti certa pri tio. Se Freddie dirus: "Mi estos tie je la kvina," ŝi estus tie.

Kun pala vizaĝo pro la streĉiteco ŝi atendis nin. Ni ŝajnis kvazaŭ ni ne vidus ŝin kaj iris rekte al numero dek kvar. Hannie sonorigis. Antaŭe ni estis ripetintaj kion ni diros. Kiam virino malfermis la pordon, Hannie demandis pri H.

"Rilate al nutraĵtransportado el Frislando," ŝi postkriis la virinon, kiu jam trenmarŝis internen. Ni aŭdis H.-on grumblanta ke oni ne ekĝenu lin ekster labortempo, post kio li envenis la koridoron kun mieno de mishumora infano.

Samtempe ni ambaŭ pafis. "Murdinto!" mi kriegis al li. Ni prenis niajn biciklojn kaj forrajdegis kiel frenezuloj.

"For! For!" mi kriegis al Freddie, kiu havis la taskon protekti nin kontraŭ eventualaj persekutantoj. Sensitive ni alvenis sur la fiksitajn lokojn ĉe Spaarne.

La vespero estis silenta kaj la arboj laŭ Spaarne staris kiel delikataj akvafortoj konturitaj en la akvo.

"Ni sukcesis, infanoj," flustris Hannie. "Estas denove unu kanajlo malpli."

26. La pafo

Vintro estis komenciĝinta. Krom manko je nutraĵo estis ankaŭ manko je hejtaĵo. La malvarmo estis la finofara bato por multaj homoj. Ĝuste en tiu tempo la gvidantaro de la rezistado volis intensigi la agadojn. La nazioj malplenigis Nord- kaj Sudholandon kaj malsategigis iom post iom la okcidenton, kvazaŭ puno por la fervojstrikio.

Frans alvokis nin al kunveno en unu el tiuj malvarmaj decembrotagoj. Nia grupo estis ankoraŭ kompleta: Hannie, Henk, Freddie, Ksander, Frans, Cor kaj Jan. En digna kuracistĉambro nin bonvenigis Frans.

"Kiel vi ekhavis ĉi tiun ejon?" demandis Jan, nia Roterdamano. "Ĉu vi eble murdis tiun pufulon?" Per sia kapo li montris al la portreto de tre dika persono. "Nu jes, ni estas almenaŭ trankvilaj ĉi tie," li finis.

Ni ĉiuj ridetis kaj eksidis ĉirkaŭ la tablon.

"Jen, homoj," ekparolis Frans, "ni devos doni respondon al ĉiuj murdoj kaj arestoj fare de la nazioj." Parolante li tre ĝene fingroklakis. Mi fariĝis iomete ŝvita pro tio. Brr, tiu ostoknarado. Sen pripensi mi metis trankviligante sed decideme la manon sur tiujn klakantajn fingrojn. Ege mirigite Frans rigardis per siaj iom malvarmetaj okuloj al mi.

"Ho, nu jes, tio estas tiel harstariga bruoj," mi diris, profunde ruĝiĝante, ĉar ĝi verdire similis delikatan geston. Feliĉe neniu reagis kaj Frans finis sian paroladon per: "Kaj jen estas 'Braŭn', ni ĝuste ricevis unu tian."

Li montris pistolon kun ligna tenilo.

"Rigardu, oni ŝargu ĝin tiamaniere." Li ludis iomete kun la kartoĉingo kaj tiam kun surdiga eksplodbruo malŝargiĝis pafo. En la fajrolinio sidis neverŝajne pala Jan. Sur lia frunto troviĝis sangoŝpruceto. Kun tremantaj genuoj mi iris al Jan kaj tuŝis lin. Li spiregis profunde kaj diris per maldensa voĉo: "Stultulo!"

"Jan, Dio, Jan, vi vivas!" kriegis Freddie.

"Jes, kion do vi pensis?" li diris simple. Ni ĉiuj kuraĝis respiri.

"Kia mallertulo mi estas!" diris Frans kaj batis diversfoje sur sian frunton. Tiam subite ni ĉiuj estis kovritaj de sango. Montriĝis ke li estis pafinta tra sia propra montrofingro kaj per sia fortega gesto baptis nin pli malpli.

Ni eksplodis en liberigan ridon. Mi ŝiris mian puran poŝtukon en striojn kaj bandaĝis Frans kiel eble plej bone. La vera planado ne plu sukcesis. Frans planis iri al nia kontraŭleĝa kuracisto. Jan aspektis ankoraŭ tre pala, sed tamen li povis kunridi kun ni. Precipe Hannie ne povis trankviliĝi, tiel ŝi ridis.

Subite mi aŭdis la bruon de funkcia motoro el la strato antaŭe.

"Foriĝu!" mi diris laŭte.

"Mi konas la vojon malantaŭe el la ĝardeno," Freddie kriis. Kiel ĉiam ŝi estis pensinta pri eblaj fuĝvojoj kaj antaŭ la komenciĝo de la kunveno ŝi jam esplorigardis la ĉirkaŭaĵon.

"Bonege," diris Jan al ŝi. Ni foriris kiel eble plej rapide. Frans kaj Hannie ankoraŭ kontrolis ĉion. Cindrujoj malplenaj, sidejoj sur siaj lokoj. La aliaj sekvis Freddie. Mi estis jam malsupre, kiam Hannie glitis de la ŝtuparo. Ŝi falis kaj etendis siajn piedojn antaŭen. Kiam ŝi alvenis malsupren, dolore sur sian postajon, ŝiaj altaj kalkanumoj estis tute for. Ŝi provis tre rapide sekvi Freddie, sed ŝi forŝanceliĝis sur siaj senkalkanumaj

ŝuoj tiel ridinde, ke mi, malgraŭ la serioza situacio, ekridis. Mi levprenis ŝiajn kalkanumojn kaj postkuris ŝin. Freddie kaj Jan gvidis nin tra ĉiaj trairejoj kaj stratetoj.

Poste ni disiĝis kiel eble plej rapide.

La S.D. venis tro malfrue ĉi-foje.

27. La leciono

"A glass of water," Hannie igis Freddie kaj min laŭte kaj klare postdiri kaj ripeti la anglajn frazojn. Ĉiujn liberajn horojn kaj ĉiujn eblojn ni uzis por ekscipovi la anglan lingvon.

"Vere, vi estas sufiĉe inteligentaj por lerni," asertis Hannie.

De la kaŝadresa patro de Hannie ni ekhavis paperon kaj krajonojn. Li mem estis instruisto kaj li plezuris ke ni spitas la malvarmon en la mansardo de Hannie por povi lerni kun eble plej koncentrita atento. Post kelkaj monatoj ni jam povis kune kun nia severa instruistino tralegi la anglan libreton 'Ten days that shook the world' (= dek tagoj skuintaj la mondon.) Kelkfoje Freddie kaj mi devis kaŝe ridegi. Kiam ni vere ne komprenis ion pro la tro politika lingvaĵo, kiu certe en ĉiu lingvo kelkfoje estas tre malklara, ni ricevis malmildan riproĉon: "Ne tiel infanece! Vi ridu poste, nun ni studas," estis la komentario de Hannie.

Tamen ni malkovris ke lerni estas agrable kaj dum unu el tiuj malfacile trastudeblaj lecionoj, Freddie donis senpere spontane al nia instruistino membakitan buterpanon, kiun ŝi estis konservinta ŝpareme.

"Jen, pro ĉiuj viaj penadoj pri ni," ŝi diris kaj metis la buterpanon ĉe Hannie.

"Ha, freneza Freddie, tio ja ne necesas," diris surprizita Hannie, "sed kiel ĉarme vi agas."

Triope ni formanĝis la buterpanon; Hannie ĉiam dividis ĉion. La buterpano estis bongusta ĉe la surogata teo kiun sinjorino E. estis suprenportinta al ni sur pleto.

"Kial vi volas instrui al ni ankaŭ la germanan?" demandis Freddie.

"Nu, vi do bezonas tion," respondis Hannie. "Cetere," ŝi daŭrigis, "estas ankaŭ la lingvo de Heine."

Kaj vidante niajn demandajn vizaĝojn: "Kaj de Karl Liebknecht, Rosa Luksemburg, Telemann, kaj tiel plu, kaj tiel plu. Vi ne pensu tiel nigre-blanke. Pro tio la mondo difektiĝos."

La sekvantan tagon ni komencis la unuajn germanajn lecionojn...

28. Fake Krist

En venta oktobrotago Freddie kaj mi staris en la ĝardeno de la loĝejo de Mari Andriessen, nia stabejo. Du nigraj korvoj gaje grakis inter si, kvazaŭ ne ekzistus milito.

"Al kio vi rigardas?" demandis Jan, alvenante kun Hannie. "Aviadiloj?"

"Nigraj korvoj," respondis Freddie.

Melankolie mi rigardis la maljunajn arbojn kies senfoliĝantaj branĉoj siluetiĝis kiel grandaj senesperaj manoj en la aero. La milito ĉiam ne finiĝis. La tagoj daŭris longe kaj mia deprimado fariĝis pli intensa. Hieraŭ vespere ni aŭdis la konsternan sciigon: Henk mortis.

Henk de Ronde havis dek naŭ jarojn. Li estis filo de markapitano, studento kaj intensa kontraŭfaŝisto. Knabo, kiu iam konfesis al mi ke lia patro estos fiera pro tio ke nun ankaŭ lia filo defendas la landon kontraŭ la nazihordoj.

"Ĉiam mi havis kveleron kun mia maljuna sinjoro," li rakontis, "sed tamen ni ŝatis unu la alian ('maljuna sinjoro' = patro). Mi dezirus foje paroli kun li nun, vi sciu. Mi pensas ke nun li ja komprenos min."

"Jes, aŭ vi komprenos lin," mi replikis. Li ridis iom amare. Lia nostalgio estis vera, mi vidis.

"Ĉiuokaze mi opinias ke nun ni troviĝas je la sama ondolongo," li diris. Dolorige liaj vortoj trairis min en ĉi tiu momento.

Henk, enfalinta en kaptilon. Ni sciigis per 'ĝustaj' policanoj kiamaniere tio okazis. Hieraŭ vespere 'granda Pier' eksplikis ĉion.

Henk estis pasiginta iom da tempo ĉe la loĝejo de Fake Krist, fifama S.D.-ano. Fifama li estis pro siaj senkompataj esplordemandadoj akompanataj de kruelaj turmentadoj kaj ĉantaĝo. Kiam, ekzemple, dum esplordemandado de rezistviro, ĉi tiu ne volis diri kie troviĝas lia frato, oni iris por preni lian malgrandan filon kaj turmentis la infanon antaŭ la okuloj de la patro. Henk tre volonte deziris elimini ĉi tiun torturanton. Evidente lia atenco ne estis sufiĉe bona kaj Krist mem arestis lin en la strateto apud sia loĝejo. Henk ne havis eblon preni sian pistolon; la ruza policano estis tro rapida.

En la Euterpe-strato, kie S.D. havis sian stabejon, Henk liberigis sin perforte kaj fuĝis. Hajlo da kugloj finis lian vivon.

Ni ĉiuj estis konsternitaj pro tio. Ni, la knabinoj, ne hontis pro niaj larmoj. Ni estis preskaŭ nekonsoleblaj. Cor, nia bona Cor, prenis nin ĉe la ŝultroj kaj ĉirkaŭbrakis nin kiel patro.

"Ni donu lecionon al tiuj faŝisthundoj. Ĉu ne, knabinoj?"

Li eligis kelkajn laŭtajn blasfemojn kaj strange, tio nin senpezigis. Mi mem konjektis ke ĉe la konstrulaboro lia lingvuzo certe estis ankoraŭ pli spicita.

Kaj nun ni staris en la ĝardeno, atendantaj Frans, kiu ekhavas telefonmesaĝon kiam Krist devos esti likvidita. Freddie estis kolektonta tiutage la donitaĵojn pri tempo, ebla gardo kaj vojplano, io por kio ŝi havis specialan talenton. Ŝi vere ne pretervidis iun ajn detalon. Vespere jam ŝi perfekte elpensis ĉion.

Hannie kaj mi ekiris frue la sekvantan matenon. Cor antaŭe ekstre kontrolis niajn pistolojn. Jan estis desegninta la fuĝvojon por ni.

"Nenio plu povos malsukcesi," mi decidis optimisme. Ni ekiris, memfidaj kaj sufiĉe trankvilaj. Sur la ponto apud Wester-kanalo ni haltis. Ni babilis iomete kaj intertempe rigardis kiaj statas la aferoj. Ĉi-foje ne rajtos malsukcesi. Ni ambaŭ pensis pri Henk.

Aktorado tamen ne estis la ŝatokupo de Hannie.

"Vi ekridu de tempo al tempo," mi korektis ŝin.

"Mi ne kapablas nun!" ŝi paroleksplodis sufiĉe akre.

Momenton ni rigardis unu la alian kaj ni ambaŭ sciis ke estas pro Henk ke la tiel nomata senafekteco forestas ĝuste hodiaŭ. Subite la okuloj de Hannie mallarĝiĝis. Mi metis mian manon sur ŝian stirilon.

"Diru nenion, ili estas tie," mi diris kaj tiam: "Nu, ĉu vi biciklos iomete kun mi?"

Mi diris tion laŭte, sed tamen ne tro laŭte. Ĉio devis ŝajni normala. Hannie aspektis preskaŭ vere duba ĉu ŝi faros tion kaj kapjesis tiam abrupte: jes.

Ni biciklis renkonte al Krist kaj lia gardanto Knor - tiun nomon elpensis Freddie. Tondrante sonis pafo kaj ankoraŭ unu. Mirigite ni fiksrigardis falantan Krist. Lia gardanto estis forbiciklinta kaj faligis sin de sia biciklo. Li malriglis tuj sian pafilon. Spionante li ĉirkaŭrigardis. Ni estis tre proksimaj kaj povis senpere pafmortigi lin. La devizo tamen estis: 'Nur Krist', do ni devis toleri ke Knor kun ĉirkaŭirantaj movoj iris al sia mastro kaj akre ordonis al ni averti kuraciston.

Senmove ni estis starintaj tie.

"Jes sinjoro," mi kriegis. "Mi tuj iros."

Mi biciklis kun Hannie tuj malantaŭ mi al krieganta virino, kiu montriĝis esti la amatino de Krist.

"Eniru tuj!" mi kriis. "Oni pafas! Ni avertos kuraciston kaj la policon."

Furioze kaj konsternite pro tiu neatendita turniĝo en la scenaro ni biciklis preter Krist kiu kuŝis parte sur la trotuaro, parte sur la trotuarrando.

"Kanajlo. Malpura kanajlo," mi balbutis.

Aliaj rezistgrupoj estis transprenintaj nian laboron, ni komprenis. Henk estis venĝita de aliaj. Kunordigi estis ĉiam malfacile en la kunigo de la rezistgrupoj. Rezistgrupo en Haarlemmermeer estis ordoninta al Zwarte Kees (Nigra Kees), eksperto per la karabeno, likvidi Krist. De fenestreto de la katolika knabolernejo ĉe la angulo de Wester-kanalo kaj Lejdena kanalo, Kees mortpafis la S.D.-ekzekutiston per du celtrafaj pafoj. Sian karabenon li kaŝis en la pianon kiu staris en la gimnastikejo.

Tra la tuta homsvarmado kaj homamasigo kaŭzita de la morto de Krist, la gimnastikinstruisto penefaris al si vojon al la lernejo. La knaboj estis bruaj kaj kriemaj post ĉio kion ankaŭ ili vidis. Kiam la instruisto ektuŝis la unuajn klavojn por montri la ritmon de iu ekzerco, eksonis stranga, malbrila sono el la instrumento. La instruisto levis la kovrilon, rigardis kaj tuj mallevis ĝin ree.

"Knaboj, vi povas iri hejmen. Mi sciigos al viaj gepatroj kiam vi ree devos veni en la lernejon."

Laŭta hurao sekvis. Brumoviĝante kaj petolante la knaboj foriris, ĝojaj pro ĉi tiu bonŝanco. Ankaŭ la instruisto foriris rapidege. Li sin kaŝis tuj.

La sekvantan tagon estis multa moviĝado ĉe Wester-kanalo. En la lernejo oni jam trovis la pafilon. Kvar domoj apud la lernejo estis bruligitaj. La loĝantoj rajtis kunpreni nur kelkajn vestojn. Oni faris flamantajn torĉojn el la kvar domoj. Burĝoj, preterirantaj la

katastrofan lokon, estis devigataj alrigardi kiel la detruo estas farata, sed la nazio opiniis ĉi tion ankoraŭ ne sufiĉa.

Posttagmeze Freddie, Hannie kaj mi ekhavis la ordonon iri al la ĉirkaŭaĵo de Wester-kanalo. Hannie kunportis malnovmodan fotilon. Pene ni estis akirintaj filmrulaĵon.

Freddie estis ekhavinta lokon malantaŭ la fenestro en iu domo. La fenestro estis transe de Lejdena kanalo. Mia komisio estis desegni kelkajn portretojn de la komandantaj oficiroj. En mia libertempo mi estis iomete lerta per la desegnokrajono kaj mia komandanto pensis ke mi povas fari tion simple.

La rezistmovado atendis pli da reprezalioj en la formo de pafmortigado de malliberuloj. Kune kun multaj aliaj rezistuloj ni devis noti la matrikulojn de la militistaj kamionoj alvenontaj al Wester-kanalo.

"Poste," diris la komandantoj, "poste ni responsigos tiujn oficirojn." Koscience ni faris la laboron kiel eble plej bone. Oni malpermesis al ni porti armilojn en tiu momento. Estis feliĉe, ĉar ĉe alveno Freddie kaj mi estis severe kontrolataj de la ĉeestantaj nazioj. Hannie antaŭvidis tion kaj eskapis la kontroladon per elekto de alia vojo. Ŝi havis la fotilon!

Malgraŭ nia atenteco ni tamen ne estis rimarkintaj ke veturiloj kun malliberuloj alvenis. Konsternite ni vidis ke homoj katenitaj unu al la alia estis kiel spektaklo montrataj al la kunpelitaj preterirantoj.

Ni ne povis moviĝi. Ni ankaŭ ne plu konsciis ke ni devos desegni kaj fotografi. Mi tremis sur miaj piedoj kaj pripensis ke ni estas nearmitaj. Infanoj estis malafable riproĉataj kaj malaperis kurante. Timigite ni premis nin unu al la alia. Ondo da profunda emocio ekkaptis nin vidantajn la virojn. Nerazitaj kaj maldikaj ili estis. Mizere vestitaj. Multaj el ili duonfalis kiam ili estis kondukataj al la strio da herbo.

Ni komprenis ke baldaŭ, post la pafado, por ili neniam plu venos 'poste'. Ili ne plu vidos la sunon, ili ne plu sentos la venton. Manpremo de la apuda kamarado ne estos sufiĉa por forpreni la morttimon.

Komando sonis kaj profunda silento kaptis nin. Niaj gorĝoj estis kunpremitaj kaj tra nebuleto da larmoj mi vidis ilin, niajn knabojn. Dio, kiel teruraj, tombaj minutoj estis.

En ĉi tiu harstariga silento kiu estis interrompita de plorsingulto, ekkantis maljuna, rompita virvoĉo la Wilhelmus (nederlanda nacia himno). Lia kuraĝa omaĝo al la ligitaj viroj estis superbruita de la salvo de la pafiloj. Tiu milobla eĥo kontraŭ la muroj de la Bavo-katedralo superŝutis nin kiel fatala fulmotondro.

29. Perfidulo

En IJmuiden (Ejmeŭjdn) kaj Velseno-norda Ko Langedijk (Langedeijk) estis konata porsinjora frizisto. Li havis prosperantan butikon kaj lia stil- kaj frizmetodo estis la plej nova. Kio ekokupas tian viron, oni demandas sin, cedi tiel bonan vendejon por posteno ĉe la (malĝusta) polico!

Aŭskultante la rakontojn kaj kaŝajn kontraŭ-germanajn diraĵojn de siaj klientoj li jam baldaŭ kontraŭ-decidis doni informojn al la germana polico interŝanĝe por mono. Pro tio li ne malprofitis. Jam post nelonge li vestis sin per la malamata uniformo kaj havis ankaŭ konkubinon (Willy van der Meyde). Li forlasis la komercadon kaj lia senkompata labormetodo havigis al li baldaŭ malamatan kaj timatan nomon.

Diversfoje jam la rezistmovado, i.a. Jan Bonekamp, faris atencojn al li. Bedaŭrinde sen multe da rezulto. Ankaŭ ni, Hannie, Freddie kaj mi havis lin sur la kandidatlisto por likvido.

Freddie, el nia trio ĉiam unue rekonante situaciojn kaj personojn, alvenis tute senspire por anonci al ni ke ŝi vidis 'Ko kaj lian amatinon', promenantaj en Grote Houtstrato en Harlemono. Evidente ili estis iomete senokupe promenantaj, ĉar ili kunhavis siajn biciklojn.

Ni iris kun Freddie, kiu gvidis nin tra la tuta urba centro kaj finfine, jes, jen estis la fripono! Freddie donis nerimarkite signon al ni kaj restis mem en la proksimo por interveni se necese. Domaĝe ke ŝi havis nur 6.35 pistoleton tiun momenton. Oni ne povas fari multon per tiu. Bedaŭrinde ni havis kronikan mankon je bonaj F.N.-oj (9 mm pistoloj), kiuj estis pli trafikapablaj sed ankaŭ multe pli grandaj kaj pli malfacile kaŝeblaj. Estis ja malagrabla por Freddie, ĉar kvankam ŝi estis malaltkreska, ŝi malcedis pri sia laboro. Sed nun ŝi ne povis kuniri.

"Ne, do, tio vere ne eblas, estas tro okulfrapa tia procesio," mi diris. Hannie jam senpacienca: "Venu do, alie li estos denove for." (Tio okazis al ni jam dufoje.)

Ni ĉiuj estis tre nervozaj. Ĉi tio ne plu rajtis malsukcesi!

Freddie forveturis por inspekti ĉu ne estas danĝero, ne nazioj aŭ polico en la ĉirkaŭaĵo kaj ni persekutis Langedijk. Hannie sidis malantaŭ mi sur la biciklo, ĉar ŝia biciklo havis truitan pneŭon. Tio okazis multfoje, ĝi konsistis el pli da kaŭĉuktranĉoj ol pneŭo.

Apud la viadukto ni vidis la paron.

Ni devis proksimiĝi al ili ĝis du aŭ tri metroj por esti trafikapablaj kaj ni devis atendi, ĉar lernejinferoj estis promenantaj tie kaj se tia kanajlo pafus returne, ili povus esti trafataj.

Sur la ponto, ĝuste pasinte la konstruaĵon de la Labora Konsilantaro, mi donis la ordonon: "Pafu." Tion oni imagu tiamaniere: oni sidas kune sur biciklo, pro kio oni ĉiam iomete ŝanceliĝas, mi devis stiri per unu mano, per la alia pafi. Mia brako sufiĉe alten por ke Hannie povu pafi trasub ĝin. Facile diri ĉion, sed malfacile fari!

Hannie unue pafis, sed ĉe la dua pafo ŝia pistolo rifuzis.

"Damne," ŝi blasfemis tutkore - kaj verdire ŝi neniam blasfemas. Senpere ŝi volis forĵeti sian pistolon.

"Ne faru!" mi kriis, "provu ankoraŭfoje!" Mi mem ankaŭ pafis. Hannie pafis denove kaj la kanajlo kuŝis sur la trotuaro. Lia konkubino kriegis seninterrompe. Per unu movo

mi turnis la biciklon. Hannie ree saltis malantaŭ min. Kiam ni forveturis, amasiĝis la homoj. Ĉie oni pendis el la fenestroj kaj fulmrigarde mi vidis oficejan personaron elvenanta el la konstruaĵo de la Labora Konsilantaro.

Intertempe la Germana Verda Polico estis informita, kaj per la pafoj kaj ĉar ili havas konstruaĵon ĉe Kenau-parko, tuj malantaŭ Bolwerk, kie nia operaco okazis ('Bolwerk' = antikva remparo).

Ĉio iris tiel rapide ke ni ne havis tempon por ordigi la aferojn, t.e.: serĉi bonan fuĝvojon, reiri por vidi ĉu ni faris bone aŭ ĉu ni devus pafi finfaran baton kaj forsendi la publikon por malebligi eventualajn reprezaliojn. La nazioj nome amuziĝis ĉe tia okazaĵo devigi la homojn rigardi kiel ili terenpafas senkulpan personon el la publiko kiel fortimigan ekzemplon.

Mi ne rimarkis ke virino, staranta antaŭ la pordo de sia loĝejo, rigardis rekte en mian vizaĝon. Poste ŝi donis al la (malĝusta) polico mian kompletan personpriskribon.

Feliĉe mi ankaŭ ne vidis ke mia avino ĉeestis ĉi tiun atencon. Abomeninda sperto por ŝi, malgraŭ ke ŝi fieris pro ni en sia koro. Ŝi mem havis sinkaŝantojn en sia loĝejo kaj el sia domo la kontraŭleĝa Waarheid estis disvastigata por la sekcio Santporto.

Hannie rimarkis ke la 'Grünen' alvenas ('Grünen' = Verduloj). Ili alvenis per motorciklo kun kromĉaro. Zigzagante mi biciklis ankoraŭ pli rapide kaj alvenis ĉe la alia viadukto. Ni estis eskapintaj. Mi ne plu havis spiron kaj debicikliĝis. Hannie transprenis la biciklon. Mi fingromontris al la kafejo 'Sporzicht'. Ne estis tempo por rekonsciiĝi iomete. Pro sperto ni sciis ke tuj la tuta najbaraĵo estos barita.

Hannie estis demetinta sian kaptuketon kaj skue ordigis siajn harojn. Mi demetis la frenezan ĉapon kiun mi plej ofte portis dum 'agadoj' kaj ĉirkaŭnodis tuketon. Tiamaniere ni tamen aspektis diferencaj.

Apenaŭ ni estis en la kafejo kiam la 'Grünen' preteriris kaj ekbaris la stacidoman placon. Vere strange, ke ni estis tiel ekscititaj, tiel plenaj de streĉo ke ni ankoraŭ ne konsciis ke ni estas en kaptilo.

En la kafejo estis kvar viroj kiuj kartludis ĉe tableto, kaj la trinkejstro (konata kiel kaŝkomercisto kaj nefidinda por la kontraŭleĝeco) staris malantaŭ la bufedo. Mi iris al li kaj diris: "Donu al ni brande gargaritan glaseton da akvo. Mi pagos vin sufiĉe!"

"Kial?" li demandis.

"Vidu," kaj mi aperigis parte mian pistolon de sub mia mantelo. "Memoru, kiam post nelonge nazioj envenos kaj demandos kiom da tempo ni jam estas ĉi tie, vi respondu: minimume unu horon, komprenite? Ni estas en danĝero kaj se iu devos fariĝi viktimo, ankaŭ vi estos viktimo. Ĉu vi komprenas? Silentu!"

Li ne plu diris ion. Li fiksrigardis nin, tute konsternite. Per la kapo mi donis signon kaj li prenis la brandoglasetojn. Hannie kaj mi iris al la necesejo kun ŝiaj ŝminkaĵoj. Tie ni ŝminkis nin vulgare, iomete senorduline. Tiel maskite ni ree eniris la kafejosalonon.

Ni eksidis sur benkon kontraŭ la muro. Antaŭ ni staris granda lego-tablo. La trinkejstro metis la glasetojn antaŭ nin. La viro aspektis kadavropala. Ni bruligis cigaredojn kaj komencis senti nin iomete malpli ekscititaj.

Unu el la kartludantoj rimarkis nin kaj donis signon al sia kunulo, sed antaŭ ol li povis diri ion, mi aperigis mian pistolon kaj diris: "Gesinjoroj, ni estas en danĝero. Estas plej bone ke vi kontinuu kartludi kaj ŝajnigu kvazaŭ nenio okazus ĉi tie. Mi jam komprenigis tiun sinjoron (mi kapjesis en la direkto de la ekscitita, nervoza trinkejstro) ke ni estis

drinkantaj ĉi tie jam minimume unu horon. Se ni rimarkos ke unu el vi provas perfidi nin, tiam vi ĉiuj mortos! Se ni devos morti, vi kuniros!"

Pro niaj mienoj ili komprenis ege bone ke ĉi tio ne estas ludeto. Post ĉi tio tiuj kompatinduloj ludis nur laŭ la ŝajno kaj mi pensas ke ili ne plu povis distingi inter bubo kaj aso!

Subite la nazioj eniris. Kun kaskoj sur la kapoj kaj aŭtomataj pistoloj sur la brustoj. "Sub la benkon," mi flustris al Hannie kaj ni piedbatis niajn pistolojn sub ĝin. Tuj ni aktoritis kvazaŭ ni estas ebriegaj. Post la glaseto da akvo ni prenis glaseton da brando. "Faru nur, Han," mi diris, "trinku, tio estas bona por niaj nervoj. Kaj ankaŭ ni devas odoraĉi kiel ĝi."

"Saluton, Heinz," mi diris al unu el tiuj viregoj, kaj ridegante mi faligis min kontraŭ lin. Li forpuŝis min de si kun naŭza mieno. Kaj ni daŭre ebrie ridis kaj intertempe atentis la kartludantojn kaj la trinkejestrin. Ni ĉiuj devis montri niajn identigilojn. Post multe da serĉkaptado mi transdonis ĝin al la oficiro, ĉar la nazio kiu ne ŝatis mian karesemon kontrolis la identigilojn de la kartludantoj. Ekstere, sur la stacidoma placo, nun alvenis multe da veturilaro. Kamiono kun kaskaj nazioj kaj motorcikloj kun kromĉaroj bruegis tien kaj reen. La oficiro iris al la trinkejestro. La eksterdoma bruo superbruis ĉion, tiel ke mi nur per lia kapskuo povis kompreni ke la demando devis esti ĉu ni troviĝas ĉi tie nur mallongtempe.

Mi ree rampis sur la benkon, apogis mian kapon en mian manon kaj per la alia mano mi serĉkaptis mian pistolon.

Feliĉe la nazioj foriris. Ni svingsalutis ilin fuŝparolante.

Apenaŭ ili estis ekster la pordo kiam mi svenis. "Truus, Truus, ne faru," kriis Hannie. La trinkejestro tuj alvenis kun glaseto da akvo, eble li tamen kunsentis iomete kun ni.

Ili ankaŭ ĵetis akvon en mian vizaĝon.

Post kvaronhoro ni eliris por esplori. Iam ni devos ja foriri. Sed ĉio estis barita. Ĉie troviĝis kontrolejoj. Feliĉe por ni staris sur la angulo nia 'Heinz'. Ni kriis: "Hu hu, Hejnzi, ni iru al la Mutti!"

Ne reago sed tamen ni faris bone, ĉar 'Hejnzi' lasis nin preteriri. Li ja volis liberiĝi de ni.

Ni decidis ne iri al nia kaŝloĝejo. Oni neniam risku. Hannie diris ke ŝi havas la ĉambroŝlosilon de flegistino kiun ŝi konas. Tien ni povis iri. Mi estis lacega kaj opiniis tion bona ideo. Estis proksime.

"Mi ne kuniras," diris Hannie, "ĉar tiu ĉambroluigantino konas min kaj scias ke miaj gepatroj estis garantiuligitaj pro la atenco kiun mi faris kun Jan. Ŝi morte ektimos kiam ŝi vidos min. Kiam vi estos tie, vi enirigos min post kelka tempo. Sed faru tion silente! Ŝi devas ne vidi min!"

Mi iris tien kaj sonorigis ĉe tia malhelverda grandega pordo. Sonis babuŝoj, giĉeto en la pordo malfermiĝis kaj voĉo demandis kiu mi estas.

Mi diris tre dece: "Bonan tagon, sinjorino, mi estas amikino de flegistino H. kaj mi estas same flegistino. Ŝi donis al mi la ŝlosilon de sia ĉambro ĉar ŝi povis kompreni ke post biciklado el Groningen mi ne povos alveni ĝustatempe en Hagon. Tial mi povas uzi ŝian ĉambroilon dum unu nokto."

Sinjorino K. grumblis: "Mi ne scias pri tio, neniuj rakontas ion al mi. Nu, do envenu."

Kvar rigliloj estis forigitaj de la pordo, la ŝlosilo estis turnita kaj ĉeno tintis malsupren. Mi rigardis ĉion iomete maltrankvile. Tio fariĝos malfacila laboro, mi pensis.

Mi povis meti mian biciklon en la domon. Sinjorino K. rigardis min tre kritikeme kaj tio ne estis tre stranga, ĉar mi ne kunportis valizeton aŭ iun alian pakaĵon. Mi havis treege putinan ŝminkon, miaj vestoj ne estis tre dignaj kaj de unu el miaj ŝuoj la plandumo pendis nefiksita. "Mi opinias iomete stranga," ŝi diris, "nu, venu kun mi."

Ni trairis longan koridoron kaj supreniris grandan larĝan ŝtuparon. Mi nombris la ŝtupojn kaj atentis la krakadon, ĉar tiuj estis aferoj pri kiuj oni devas konsideri. Sinjorino K. malfermis la ĉambron per la ŝlosilo kiun mi donis al ŝi. Mi ĉirkaŭrigardis, flaris karakterizan maljunulinan odoron kaj sidante sur la litrando ekrulfaris cigaredon por iomete ordigi miajn pensojn.

Hannie staris kaŝite en la arbustoj de la publika ĝardeno sur la Park-aleo. Ŝi certe jam staris tie tre longe, ĉar daŭris iom da tempo antaŭ ol mi kuraĝis malfermi la pordon kaj ŝteliri malsupren. Ŝvitante mi staris fine malantaŭ la pordo. Feliĉe la ŝlosilo ankoraŭ troviĝis en la seruro.

Mallaŭte mi ŝovmalfermis ĉiujn riglilojn, nur tiu ĉeno..., kion ajn mi provis fari, tiun fiĉenon mi ne povis malligi. La pordo malfermiĝis nur malgrandfende. Mi svingsalutis per mia brako ekster la pordo kaj flustris mallaŭte: "Psst, Hannie, ho hu ho, Han!!" Finfine venis Hannie. Estis ridinda situacio.

"Kion ni faru, mi ja devas eniri," subridis Hannie. Denove mi fingrumis kun la ĉeno, kompreneble kaŭzante tro multe da bruoj, kaj jen tiu patrino envenis la koridoron.

"Unue ĉi tio, poste tio. Kion vi faras nun?" ŝi kriis kolere. "Nu," mi diris kiel eble plej timide, "ankaŭ mia amikino volas eniri." Tiam ŝi malligis la ĉenon de la pordo. Unue ni vidis radon, tiam aperis la tuta biciklo kaj poste ĝoja Hannie, tutsimple dirante: "Saluton, sinjorino K."

Neniam mi vidis iun senkoloriĝi tiamaniere. Estis kiel filmo. Vere rigidiĝinte ŝi rigardis al Hannie kun mieno kvazaŭ: "Ho, ho, ho, murdintino sub mia tegmento." Neniun ajn sonon ŝi povis eligi. Ŝi nur montris supren per etendita brako kaj kun grandaj timokuloj. Hannie mordis sur siaj lipoj. Alveninte supren ni ekridegis. Hannie estis nekvietigebla, mi neniam spertis ŝin tia. Ankaŭ la streĉiteco kaŭzis tion, kompreneble.

Ni ne dormis multe tiun nokton, sed ni fumis des pli. Ne estis lampo en la ĉambro, ni ne sciis kie troviĝas la necesejo kaj ni havis nur unu litkovrilon. Venis momento kiam ni devis maltrinki. Mi altrenis seĝon kaj metis ĝin antaŭ la lavujon. Por ne ŝoki sinjorinon K. mi malfermis la kranon. Bedaŭrinde iomete tro forte, pro kio la akvo supren gut-ŝprucis batadante kaj malvarmige...! Hannie ĝislarme ridegis. Poste ŝi maltrinkis el la tegmentfenestro. Ankaŭ freneze se vidi.

Matene, tre frue, ni provis foriri nerimarkite. Sed jes, tiuj ĉenoj, rigliloj, k.t.p. tamen faris tro multe da bruoj. Sinjorino K. envenis la koridoron en ia Dickens-noktoĉemizo. "Nu, mi opinias tion skandalo kaj mi diros al flegistino H. ke se mi sciis ĉi tion, ŝi neniam ekhavis permeson doni la ŝlosilon al iu. Vere estas skandalo, fi!!!"

"Trankviliĝu," diris Hannie, "sed mi avertas vin, sinjorino K., parolu kun neniuj pri ĉio ĉi. Tamen mi afable dankas vin."

Ni foriris kaj tra ĉiaj trairejoj kaj stratetoj, kiel eble plej multe evitante la pli grandajn stratojn, ni iris al la stabejo. Tie ni sciigis ke Ko Langedijk ankoraŭ vivas. Sed por la resto de la milito li estas eliminata kiel homĉasanto.

30. Eksplodaĵo en Haarlemmermeer

Hannie, Freddie kaj mi trankvile biciklis laŭlonge de Spaarne.

Ni estis survoje al la Haarlemmermeer-poldero, kie ni volis klopodi akiri iom da ekstra nutraĵo de la kampuloj. Duono el la Amsterdamanoj ekiris por satigi sin en la kamparo. Por la plej multaj ĉi tio estis nefarebla laboro: oni devis posedi multe da mono por 'nigre' aĉeti manĝaĵon, aŭ povi proponi oron, arĝenton, antikvaĵojn aŭ tolonojn. Ni havis nenion de tiaj aĵoj. Sed ni konis kelkajn kampulojn en 'Meer' (la poldero) pri kiuj ni estis certaj ke ili helpas la rezistadon.

Ni estis optimismaj kaj, kvankam pluvigis iomete, la vetero estis tamen agrable milda laŭ la sezono.

"Ho," kriis Freddie subite, "jen Frans."

Ni haltis kaj rakontis al li ke ni volas irpreni manĝaĵon en 'Meer'.

"Tute ne," diris Frans, "vi kunbiciklu kun mi, mi devas preparoli ion kun vi."

Konfuzite ni rigardis nin. Jen foriris nia satiga veturo!

Frans havis la ŝlosilon de iu domo en Park-aleo. Po du, kun intertempo de kvin minutoj, ni eniris. Frans atendis Hannie kaj min; Freddie kuŝis kiel kato en grandega leda seĝo, apud fajrejo. La domo estis riĉe kaj digne meblita kaj ni ĉirkaŭrigardis. Libroŝranko kovranta la tutan muron vekis la intereson de Hannie. Mian atenton altiris granda pentraĵo - mi provis malĉifri la subskribon.

"Sufiĉe rigardintaj, sinjorinoj?" demandis Frans. "Mi volis montri al vi ion alian," kaj li malfaldis ian labordesegnon.

Estis desegno de ponto, la ponto trans Spaarne liganta la urbocentron kun la fabrikterenoj aliflankaj.

Frans diris: "La nazioj ne nur forprenas nian manĝaĵon, sed ili eĉ malkonstruas tutajn fabrikojn kaj transportas tiujn al Nazilando. Tion ni malebligis ekde nun."

"Ĉu ni eksplodigu tiun ponton?" demandis Freddie ruze.

"Hm, jes," diris Frans, iomete blufite pro ŝia tuja reago.

"Kiamaniere?" mi demandis, sed Frans diris ke unue ni devas lerni kiel manipuli eksplodaĵon. Krome ni devis observi la situacion ĉe la ponto kaj fari notojn pri la momentoj kiam la trajnoj pasas, la kontrolistoj alternas kaj la patroloj preteriras. Estis farende en kelkaj tagoj.

"Kiel vi pensas," demandis Hannie singarde, "ke ni faru tion sen frapi la okulojn?"

"Nu," diris Frans, "tio estas via afero. Priparolu tion inter vi." Li prenis sian ĉapelon.

Ni komprenis ke irpreni manĝaĵon ne plu eblas.

"Mi ekrigardos iomete ĉe la ponto," diris Freddie kaj ŝi saltis sur sian biciklon kaj malaperis.

Iom malpli rapide ni sekvis ŝin.

Hannie estis notonta la horojn de la patroloj kaj mi ĉirkaŭrigardis iomete. La fervoja digo estis alta, sur ĝi kreskis dornaj arbustoj kaj oni instalas pikildraton. Tio ne estos facila tasketo, mi pensis. Mi metis mian biciklon ŝlosita kontraŭ arbo kaj provis kiel eble plej nerimarkate puŝmalfermi la pikildraton.

Mi ege dolorigis mian manon kiam la drato resaltis. Mi blasfemis enbuŝe, forlekis la sangon kaj provis tordi min tra la baraĵo.

"Ho, rigardu tiun knabinon!" subite kriis unu el la knabetoj ludantaj tie.

Mi tuj kapruĝiĝis kaj faris kvazaŭ mi volis levpreni ion de malantaŭ la pikildrato. Mi pretendis meti ĝin en mian poŝon, malŝlosis mian biciklon kaj forveturis trankvile. La knaboj postvokis min. Stulte! mi pensis kolere kaj seniluziigite.

Apud la ponto ne estis alie: ĉie estis pikildrato. Ni bezonus tenajlon. Kial Frans ne donis skizitan planon al ni? Mi ege malbonhumoriĝis. Nenie mi vidis Hannie kaj Freddie. Mi surprizkaptis min pri enviaj pensoj: certe ili iris al Cor kaj Annie! Tie estis ĉiam io manĝebla kaj tie estis agrable varme...

Mi ja ŝatis ankaŭ iri tien, sed la devo vokis. Mi kaŝis mian biciklon en arbusto apud la pilieroj de la ponto. Subite mi aŭdis super mia kapo la ritman piedfrapadon de botoj. Nazibotoj! Ili iris kvinope sur la fervoja ponto. Mi okulis mian brakhorloĝon. Kvin minutoj post la kvara. Mi memortenu!

Mi malkovris ke oni povas uzi iom pene la deklivajn pilierojn de la ponto kiel ŝtuparon. Post precize unu kvaronhoro la soldatoj revenis. Mi ne vidis eblon atingi la ponton dumtage.

Ie en la mezo de Haarlemmermeer-poldero troviĝis terpombarako; ĝi apartenis al la farmejo de iu Gerrit, sed estis tute aparta tiel ke ni povos rimarki de ĉiuj flankoj la proksimiĝantan danĝeron.

"Estingu la cigaredojn," ordonis Gerrit. El pako kiun li prenis de sub la tablo, aperis ĉiaj strangaj aferoj.

"Ĉi tio estas eksplodŝnuro kaj vi nomu tion 'mastiko', kaj tio," singarde li levis metalan skatoleton, "tio estas pikrata acido."

"Ho jes," mi pensis kaj sciis ankoraŭ nenion.

En malgrandaj vitraj tubetoj troviĝis kolora fluidaĵo.

"Kun ĉi tiu oni ĉiam devas agi tre precize, alie oni ekĉieliros frutempe," diris Gerrit simple. Ni lernis multon dum tiu mateno. Gerrit estis kvieta Nordholandano, kiu faris ĉion tre trankvile kaj eksplikis ĉion tre klare.

"Venos fivetero," li anoncis iun momenton.

Hannie demandis kiel oni povas scii tion. "Rigardu, knabino, estas mevoj sur la kamparo kaj ili kriegas nun tiel diboĉe laŭte, tiam ni ekhavos ventegon."

"Jes," diris Hannie medite. Ni rigardis la rapidegantajn nubojn kaj la kriegantajn mevojn. Ilia nostalgiveka krio malĝojigis kaj malvarmigis min.

Momenton Gerrit rigardis al mi.

"Nu venu, knabinoj, ni prenos tason da kafo," li diris tiam.

En la granda farmeja kuirejo estis agrable varme kaj en la surogatkafo troviĝis vera lakto. Mi fariĝis dormema pro tio.

Sed ni foriris kun la eksplodaĵo kaj gajhumore ni svingsalutis al Gerrit kaj lia edzino. Kliniĝinte super niaj stiriloj ni batalis kontraŭ la ventego. De tempo al tempo ni deiris momenton por respiri. La Haarlemmermeer havas malmultan ŝirmaĵon. Longaj, rektaj vojoj, rektaj arbovicoj laŭ larĝaj kanaloj kaj de tempo al tempo granda farmejo.

En Harlemo ni adiaŭis nin. Post kelkaj tagoj la ponto estis 'eksplodonta'. Tio estis okazonta alie ol ni esperis...

31. Sensukcesa!

La ventego estis malfortiĝinta kvankam ankoraŭ blovegis. Jam en la stabejo ni ricevis ĉiujn instrukciojn. Ankaŭ la knaboj havis ordonon: en la ĉirkaŭaĵo de Vogelenzang en direkto de Hago ili devis eksplodigi fervojlinion. Pro tio Jan kaj Cor estis irintaj al Santporto. La Velsena kontraŭleĝularo estis asigninta al ili eksplodaĵspertulon.

Ili trovis agrablan kaj amikecan etoson tie.

"Tiu virego, kiu devos instrui al ni tiun 'eksplozadon', ricevis sian instrukcion de angla oficiro," rakontis Jan. "Mi treege ridis kun tiu knabo."

La animstato estis ridema kaj nervoza. Ni pasigis la tempon per kantado kaj gitarludado. Jan, Freddie kaj mi antaŭe estis en la sama junularmovado. Ni konis multajn strangajn kaj ankaŭ bonajn kantetojn. Ankaŭ revolucikantojn - ne tro laŭte, ĉar oni ne povas scii - ni kantis. Ni estis ege mirigitaj ke ankaŭ Hannie konas 'La laboristoj de Vieno'.

Nur malfrue ni foriris. Frans estis ekhavinta karotojn kaj germanan soldatpanon de iu, do ni havis ion por manĝi.

Mallumiĝis frue ĉi tiun vesperon. Freddie estis la nura el ni kiu posedis varman mantelon. Ŝi estis tiel malgranda kaj gracila ke la vestoj de iu tro rapide kreskanta adoleskantino konformis. La nutropatrino de Freddie plezuris vesti ŝin per la vestoj de sia filineto. Ili estis bonhavaj homoj, la vestoj laŭrange... Hannie altentiris la ŝultrojn. Tion ŝi ĉiam faris kiam ŝi estis malvarma aŭ kiam ŝi opiniis ion malfacila.

Ni estis metintaj eksplodaĵojn en niajn poŝojn. Profundaj poŝoj en kiuj plej ofte troviĝis niaj pistoloj. Nur Freddie estis armita. Ŝi kunportis eĉ du pistolojn. Estis jam vere mallume kiam ni alvenis ĉe la ŝtala palisaro de la ponto. Laŭ la ordono de Frans la pikildrato ĉe la digo estis jam tratondita de unu el la knaboj. Precize je la oka ni devis kaŝi niajn biciklojn tiamaniere ke ni tuj povos forpedali ĉe danĝero. Ni metis ilin sur malluman lokon, tuj apud la fervojdigo. Mi metis mian ŝalon ĉirkaŭ la briletantaj postlumilojn. Je kvarono antaŭ la naŭa ni devis kuri al la ponto, meti la eksplodaĵon kaj forkuri kiel eble plej rapide. Hannie kaj mi devis fari la laboron, Freddie estis gardonta kaj ŝirmonta nian reiron.

"Pretaj, knabinoj?" mi demandis. "Estu forta, kaj ĝis revido," al Freddie. "Bone, bone, vi iru do," flustris Freddie responde. Ni palpserĉis nian vojon al la truo en la pikildrato. Daŭris tamen iomete tro longe, mi opiniis. Hannie rigardis sian brakhorloĝon kiu havis lumantajn radiumhavajn montrilojn. "Ankoraŭ ne," ŝi diris mallaŭte.

Ni premis nin kontraŭ la taluson de la digo. La tutan posttagmezon pluvadis, poste ekblovegis. La grundo estis malseka kaj odoris kiel tero. Mia koro bategis. Super niaj kapoj la gruzo inter la ŝpaloj knaris ritme kaj laŭte sub la botoj de la germana patrolo.

"Kioma horo estas?" mi demandis. "Precize kvin post la oka," diris Hannie. Ankoraŭ dek minutojn, mi pensis kaj la streĉiteco ekkaptis kiel malvarma mano mian gorĝon. Daŭris treege longe antaŭ ol la nazioj revenis. Antaŭ ili dancis la lumo de poŝlanterno. Kiam la paŝoj estis preteririntaj, ni surkuris la digon. Mi stumblis pro drato kaj frapfalas sur la genuojn kaj manojn. Miaj ŝtrumpoj estis difektitaj kaj miaj manoj bruletis pro doloro. Partetoj da gruzo estis sub mia haŭto. Mi kunmordis miajn dentojn. Hannie helpis min restari. Nun ni devis atendi fajfsignon de Frans, kiu estis atentonta la operacon aliflanke de la ponto. Post la fajfsigno lia komisiono estos finita kaj li forlasos sian kaŝejon. Daŭris kvazaŭ jarcentojn antaŭ ol la fajfeto akre sonis en la ventega

mallumo. Ni iris inter la reloj ĝis sur la ponto. Tie aperis la unua malfacilaĵo. Apud la reloj ne estis alia fundo ol la ŝtala konstruo de la ponto. Ni rigardis en la malhelan, ondomovan akvon de Spaarne. Mi kunpremis miajn okulojn. Altfobio tamen estas malsano, mi kredas.

Hannie pinĉis en mian brakon kaj mi komprenis ke mi devas komenci la knedadon de la mastiko ĉirkaŭ la relon. Mi preparis ĉion kiel Gerrit estis montrinta al ni. Mi laboris kiel eble plej trankvile kaj provis ne plu rigardi en la profundon, kie la ondoj, minacaj, nigraj kaj malhelaj, reprezentis la morton.

Subite estis, ne tro malproksime, ree la dancanta lumeto de poŝlanterno. Mi treege ektimis. "Han," mi flustris raŭke kaj fingromontris en la direkto de la lumo. Mi remetis ĉion en mian poŝon, sed mi ne plu povis kunpreni la kneditan paston en la flanĝo de la relo. Ni ne plu povis foriri! La lumo estis tro proksima.

Per kelkaj paŝoj mi estis ĉe la arktegmento de la ponto. Hannie sekvis min kaj faris kiel mi.

"Ekpendu per viaj manoj," mi siblis, "vidu, tiamaniere!"

Ankaŭ Hannie pendis. "Ne rigardu malsupren," mi ankoraŭ diris. La paŝoj proksimiĝis. Ankaŭ la lumo alvenis. Mi ne povis vidi ion, nur la nitojn de la ponto, briletantajn en la lanternlumoj. Miaj manoj brulis kaj batis. Senkompate la metalo tranĉis en miajn fingrojn. Hannie dolorĝemis: "Mi ne plu eltenas."

"Tenu vin, damne," mi flustris. La paŝoj estis nun je la fino de la fervojdigo. Mi suprentiris min per malespera kuraĝo. Per la kruroj, kiuj ŝajnis sensentaj, mi forpuŝis min de ŝpalo kiun mi pene povis atingi. Mi ree staris sur la ponto.

Larmoj pro doloro kaj timo eliris senpere el miaj okuloj. Mi provis suprentiri Hannie, sed Hannie estis tiel laca, ke fakte la ĉefa afero estis mia forto. "Partizano!" mi kriegis raŭke. Sonis laŭte, kaj nereale en tiu nigra timiga nokto, sed helpis. Hannie kunsuprentiris sin. Plorante ni falis en niajn brakojn sur la malvarma kruda ŝtalo de la ponto. Dum la unuaj minutoj ni ne povis levi nin. Sensentaj pro doloro ni estis. Rampante kaj duonfalante ni atingis la digon, de kiu ni faligis nin. Mi finvenis en la arbustojn. Lame Hannie sekvis min tra la truo en la pikildrato. Ni daŭre frotis niajn manojn. Subite ankaŭ Freddie estis ĉe ni. Ni ĉirkaŭbrakis unu la alian, sed sammomente ni rigidiĝis pro ektimo. Jen ree tiu lumo! Ĝi nun lumis ankaŭ malsupren, laŭ la digo.

"Kuŝu!" mi preskaŭ kriegis. Ni faligis nin. Mi prenis la manon de Freddie kaj atendis. La paŝoj preteriris. La nazioj suriris la ponton. Ni kaŝiris al niaj bicikloj. Pene mi antaŭvenis. Ankaŭ Hannie preskaŭ ne povis pluiri.

"Singardu, knabinoj!" diris Freddie. "Ni povas ankoraŭ renkonti naziojn."

"Haltu unu momenton," ploris Hannie.

"Ne," mi diris, "ni devas hejmeniri."

Kiel volonte mi estus haltinta por mildigi la doloron de miaj mizeraj manoj en flako de pluvakvo! Sed unue ni devis esti sendanĝeraj.

"Ni malsukcesis," plorsingultis Hannie, "ni ne povis finfari."

"Silentu, hejmen!" mi kriis.

Je la sinkaŝadreso de Freddie ni iomete trankviliĝis. Ni kaŝiris al ŝia ĉambreto. Feliĉe troviĝis lavabo tie. Ni fluigis la malvarman akvon sur niajn pojnajn kaj manojn. Freddie

konsolis nin. Trankviliĝinte iomete mi subite vidis mian etan fratinon. Pala vizaĝeto, grandaj okuloj, malhelaj pro malfeliĉo kaj senprecedenca timo.

"Venu do," mi diris kaj tiris ŝin al mi.

"Ho Truus, mi tiel timegis. Estis viro kun hundo kaj tiu hundo flarumis min." Ŝi ankoraŭ tremis pro timo. "Kaj tiam mi aŭdis tiujn naziojn kaj vi daŭre ne venis..."

Hannie ekkuŝis kun fermitaj okuloj sur la liton de Freddie. Ni estis tre malpuraj kaj havis kotkovritajn ŝuojn. Ni ne plu havis forton por demeti ilin. Ni nur volis dormi, dormi kaj forgesi.

32. Malsana

Ŝi estis ellitiĝinta frue, mia nova nutropatrino. Ŝi estis aminda virino, ankaŭ kuraĝa. Ŝia edzo estis ŝipestro, ŝipveturanta sur la mondomaroj. Eble li estis englutegita de la ondoj jam antaŭlonge. Kvankam la anoncoj estis malmultaj, ni distilis eĉ el la nazinovaĵoj la mizeron de la aliancaj maristoj. Minoj, torpedoj, aeratakoj al malrapide irantaj konvojoj, ankaŭ sur la maro oni suferis multe en ĉi tiu abomeninda milito. Sinjorino Schakel postrestis sola kun sia filineto, kiu estis lernantino en mezgrada lernejo. Ni vivis bone ĉe ŝi.

Ĝi estis mia kaŝadreso, sed ankaŭ Hannie kaj Freddie foje dormis tie. Sinjorino Schakel estis loĝinta dum jaroj en Indonezio (tiutempe Indonezio estis ankoraŭ (nederlanda) Orienta Hindujo). Ŝi kuiris bonguste. Eĉ la tulipbulboj kaj pulpo fariĝis tre manĝeblaj per ŝia kuirarto. Mi ricevis sufiĉon. Mi pensas, ke hodiaŭa ĉevalo rezignus pri ĉi tio, sed mi vere manĝis ĉevalporciojn.

Tiun matenon tamen mi ne povis pasigi ion tra mia gorĝo. Mi sentis min terure malbone kaj miaj kruroj estis pezaj. La kare oferitaj bongustaĵoj sur mia telero preskaŭ duonvomigis min. Malespere mi rigardis al sinjorino S. Ŝi ja vidis kaj forprenis mian teleron.

"Estu singarda, mia infano," ŝi diris kore. Mi kapjesis. Ĝuste hodiaŭ la tuta grupo, Jan, Ksander, Freddie, Hannie kaj mi, estis forigontaj fifaman S.D.-agenton kaj spionon. Mi enŝaltis mian biciklolanternon, sed mi ne povis vidi multon pro la nigrumŝildeto fiksita antaŭ la lampo. Mi biciklis for, laŭ la Aleo de Heemstede.

Subite mi veturis senpere inter la krurojn de germana soldato, kiu kune kun germana kamarado de la mararmeo post festeto reiris hejmen.

Muĝante lamis kaj hopis la Germano tien kaj reen, kun sia mano sur la pantalonforko. La matroso kriegis pro rido kaj mi kunridis dolĉacide. La ridanta matroso puŝis min al mia biciklo kaj gestis: foriru! Mi ne bezonis multe da insistado. La nazio prenis sian pistolon kaj postpafis min, dume mi saltis sur la biciklon.

"Nein, nein, Karl!" mi aŭdis krei la matrosan. Mi biciklis zigzage sur la vojo. Feliĉe ankoraŭ ne estis vera taglumo kaj mi povis foriri. Alveninte ĉe miaj amikoj mi rakontis pri tiu nevola germana biciklotenilo. Ili ĉiuj ridegis.

Nia grupo devis dividiĝi por ne tro kapti la atenton. Do mi staris kune kun Freddie ĉe angulo kontraŭ senfenestra muro. Ni estis kaŝintaj niajn biciklojn kaj ni faris ekpreĝeton ke ili restu tie, ĉar biciklo estis tre alloga objekto eĉ por honesta burĝo.

Mi staris kun la dorso kontraŭ la muro, sed subite mi glitis surteren. La lasta kion mi vidis, estis la timigita vizaĝo de mia fratino.

Freddie rakontis al mi poste, ke ŝi vokis viron kun puŝĉareto por helpi. Ili suprentiris min sur ĝin, apud mia biciklo, kaj tiel ni iris al 'de Baan', kie loĝis amika dentisto. Tiu mizera Freddie devis elteni mil timegojn, ĉar iu viro preterbiciklis ĉiam. Li veturis malrapide kaj fiksrigardis nin. Li povis esti 'malĝusta'. Freddie iris kun ambaŭ niaj pistoloj ĉe si. Mi estis tute senkonscia. Ĉe la dentisto mi estis portita en la domon de la tieaj homoj. Kiam mi rekonsciiĝis iomete, la dentisto enverŝis glason da vera portvino.

"Bonvolu, knabino," li diris kore, "estas fakte nia bone konservita botelo por festi la liberiĝon, sed ni jam nun trinku pro tio!"

Malantaŭe sur mia propra biciklo, la filo de la familio portis min kun Freddie kiel ĉirkaŭrigardanta gvidantino, al la familio Groustra. Ni ofte kaŝis nin tie, kiam nenie

aliloke estis kaŝejo por ni. Panjo Groustra enlitigis min. Mi sentis min bonege inter la malvarmetaj litotukoj, sed la febro fariĝis tiel grava, ke la bona paĉjo Groustra cedis sian liton al mi. Lia edzino volis esti kun mi tage kaj nokte. Ĉiutage la 'kontraŭleĝa' kuracisto Roorda venis por viziti min. Mi estis vere tre malsana kaj mi deliris. Malfeliĉa panjo, mi pensis, ŝi certe eksciis ion! En mia timo mi kriegis, en ne tre bela lingvaĵo, ke la nazioj estu ekstermataj kaj la perfiduloj estu pendigataj.

Kiam mi ree homiĝis iomete kaj Hannie kaj Freddie venis por viziti min, montriĝis, ke multo okazis ekster mi. La tagon post mia malsaniĝo la S.D.-ano estis mortigita de aliaj el la grupo.

Tuj kiam mi povis stari sur la piedoj, mi ree kuniris kun la grupo, postlasante kapneantan panjon Groustra. La kamaradoj estis bonkoraj kaj prizorgemaj por mi. Ili forprenis de mi la plej pezan laboron.

La batalo plidaŭris.

33. 'Oni mortpafas homojn tie'

"Ho, de kie vi ekhavis tiun karoton?" kriis Freddie, ĵus alpedalante sur Zijl-vojo (Zejl). "Aĥ, donu al mi la duonon!"

Senpripense mi duonigis la karoton kaj donis pecon al ŝi.

"Ĉu novaĵoj?" mi demandis kaj krake maĉis la maldolĉan vintrokaroton. Mi trovis ĝin, senpere sur la strato. Per mia bicikloŝlosileto mi forigis la plej gravajn malpuraĵojn kaj plue mi viŝis ĝin per mia maniko. Malsato ne atentis higienon.

"Kien ni iras?" demandis Freddie plenbuŝe.

"Harlemon nordan," mi respondis neklare.

"Ĉu vi aŭdis pri tiu malsatmanifestacio? Granda nombro da virinoj penetris eĉ ĝis Plekker (la malĝusta urbestro de Harlemon). Kuraĝe, ĉu, kaj ili kriis: 'Malsato' kaj 'Manĝaĵojn por niaj infanoj' senpere sur la granda foirplaco," diris Freddie entuziasme. "Kiaj virinoj, ĉu ne?" Tio estis celita kiel komplimento.

La nazioj estis reagintaj akre: "Hunger, diese Weiber?" (germane: malsataj ĉi tiuj virinoj?)

Vere, la subfleksigintaj, malsatedeme dikaj korpoj de la plej kuraĝaj kaj plej senesperaj patrinoj estis irintaj antaŭe. Mi rekonis multajn, inter aliaj la patrinon Lemel, kiu havis grandan familion kun grandigantaj infanoj. Bonanima kaj batalpreta virineto, kiu kun sia dikkarna korpo tamen estis gvidmarko de neŝanceblo meze de tiuj indignaj virinoj.

"Patrinoj fariĝas kiel leoninoj kiam oni minacas iliajn infanojn," mi diris kaj kun miro mi pripensis ke la nazioj ne pafis al ĉi tiu manifestacio.

Biciklante ni diskutis pri la kuraĝo kaj la batalpreteco de virinoj ĝenerale kaj ree ni ege samopiniis. Poste ni aŭdigos niajn voĉojn pli bone, ni opiniis. Niaj ideoj pri emancipado ne atingis pli ol nian deziron esti pli aprezataj.

"Ni devus legi pli multe," diris Fred. "Cetere ĉu vi scias kiu parolis ĉe Plekker?"

Mi ŝultrotiris.

"Bonege," mi diris tiam. Ĉar malgraŭ la granda superforto da soldatoj kaj la severa malpermeso pri amasiĝo (ĝi estis punebla per mortpuno) ili tamen faris. 'Li ne ŝatis tion, tiu Plekker-fripon', " rimis Fred kaj pro agitiĝo ŝi misglutis mordpecon da karoto. Larmoj pro sufokiĝo gutis sur ŝiaj vangoj. Fratine mi batis ŝin ĝis preskaŭ sangosputo, tiel ke Fred spiregante kaj nazfluante petis ĉesigi tion.

"Mi volas vivi pli longe ol hodiaŭ," ŝi eligis. Mi rigardis ofendite kaj ŝultrotiris sed tamen donis al ŝi mian poŝtukon.

Kun tusado jen profunda jen surfaca Freddie daŭrigis sian vojon. Mi biciklis iomete malantaŭ ŝi.

Preter la policejon de Overveen ni veturis direkte al Zee-vojo ('Zee' = maro). Oni povis veturi sur ĝi nur mallongan parton - la plejparto estis barita de la nazioj, sed estis tiel agrable trankvile kaj oni povis vidi parton de la dunoj.

Subite elrampis el la arbustaĵo malgranda knabo. Liaj vizaĝo, manoj kaj kruroj estis skrapitaj kaj sangokovritaj pro la ramnoj hipofajaj kaj li kriis ion al ni.

"Oni murdas ilin, oni mortpafas homojn, tie!" kaj li fingromontris malantaŭ si en la direkto de la dunoj.

Senparole ni rigardis lin. Plorante li pluiris, stumblante per siaj propraj piedoj, daŭre kriante:

"Oni mortpafas homojn, mi mem vidis."

"Haltu," mi postkriis lin, sed li plukuris sovaĝiĝinte.

"Se nur la nazioj ne tuŝos lin," kriegis Freddie konsternite.

Kelkaj preterirantoj haltis kaj rigardis timigite unu la alian.

"Mi postkuros lin," kriis Fred kaj estis jam for. Mi postbiciklis ŝin, sed ni ne plu povis trovi la knabon.

"Kiel li povis iri en la dunojn, tiuj ja estas malpermesita tereno?" mi diris.

"Nu," diris Fred, "ankaŭ Gijs Dijkhuizen (gejs dejkheŭjsen) kaj Kees Bruidschart (kejs breŭtsĥart), la ŝtelĉasantoj, povas eniri. Kion ili povas fari, ankaŭ tia knabeto kapablas. Sed ja estas danĝere."

Gijs kaj Kees donis al la rezistado multajn informojn pri minbaritaj terenoj, truptranslokadoj kaj pafmortigoj de malliberuloj.

"Kiel tiu mizerulo estis konsternita," ŝi daŭrigis, "mi pensas ke li vere vidis pafmortigon. Dio, kia abomeninda tempo estas nun."

Survoje al nia kaŝadreso mi daŭre aŭdis la altan kriegantan knabvoĉon en miaj oreloj:

"Oni mortpafas homojn tie!"

34. La virino kun la sledeto

"Estas fiulino, tiu sinjorino Cheval, ŝi perfidis jam multajn homojn," sciigis Kees. (La franca nomo 'Cheval' signifas ĉevalo) "De la regiona komandanto venis la ordono ke ŝi estu likvidita. Ŝajne ŝi loĝas ĉe numero 12 en Twijnders-aleo (Tvejnders). Estas bone vestita, bela virino kaj ŝi loĝas tie kun virino kiu faras la mastrumadon por ŝi, kaj kun sia infano, knabeto de proksimume 4 jaroj. Freddie estas la malplej okulfrapa, ŝi senokupe pasigu la tempon en la najbaraĵo. En la sportvendejo ĉe la fino de Twijnders-aleo estas fidinda virino. Mi jam parolis kun ŝi kaj estas bone ke Hannie kaj Truus tie supre de malantaŭ la fenestro atentu tiun inaĉon de Cheval."

Kees estis finparolinta, kapsalutis kaj malaperis tra la malantaŭa ĝardeno. Freddie rigardis al Hannie kaj akre tordis siajn lipojn.

"Tion ni ja simple faros, sinjoreto! Sed mi rifuzas se ili ne donas al ni pli ampleksajn informojn," ŝi diris decideme. Kolerege ŝi rigardis al sia pistoleto.

"Jen, per tia malnova pafilaĉo ni devas labori!"

Ni ĉiuj sciis ke la ĉefoj de la regiono posedas bonegajn armilojn. (Ili neniam uzis ilin...)

La sekvantan tagon Hannie petis interparoladon kun la regiona komandanto. La nura rezulto estis ke ni estis informitaj pli amplekse pri Cheval. Almenaŭ ni sciis nun, kial oni opinias ŝin danĝera kaj pri kio ŝi kulpas.

Plurtage observinte la tutan Twijnders-aleon el la nevarmigita supra etaĝo de la sportvendejo, ni tamen opiniis tro danĝera resti tie pli longe. La virino de la sportvendejo estintis tre afabla por ni kaj serioze ŝi donis al ni la manon kaj ruĝ-blank-bluan insignon.

"Feliĉon kaj revenu sekuraj el la milito," ŝi diris. Ni nur ridetis kaj foriris rapide, timaj pri tro multe da emocio kaŭzita de homoj bonvolaj al ni. Intertempe Freddie ne estis senokupa. De najbaroj kaj transaj najbaroj ŝi sciigis kelkajn informojn. Sinjorino Cheval iris regule al adreso sur Park-aleo kaj ofte iu uniformita policisto venis al ŝia domo por akompani ŝin.

"Ŝi estis unu el la amatinoj de Krist," Freddie rakontis. "He, ni povos observi ĉion rekte el la kontraŭa numero de 12. Tie loĝas 3 needziniĝintaj fratinoj kiuj estas tre rojalistaj. Treege fidindaj, mi aŭdis de aliaj. Ankaŭ sinjoro Elsinga konas ilin. La nura malfacilaĵo estas, ke unu el tiuj fratinoj mense ne estas tute sana."

"Nu, ni akceptu tion," diris Hannie, "ni sencele promenas ĉi tie jam tro longtempe laŭ mia opinio; kiam ni likvidos ŝin, tro multaj homoj konos niajn personpriskribojn."

"Vi pravas," mi diris, "ni prenu la riskon, tie ĉe la fratinoj."

Post kelkaj horoj ni sidis triope en ilia antaŭĉambro. Frostegis kaj dika tavolo da neĝo kovris la stratojn. La fenestroj ege frostiĝis. Freddie spirblovis rondan trueton en la glacian tra kiu ni unu post la alia observis la domon. Niaj gajaj paroladoj silentiĝis jam post nelonge. La malvarmo estis tiel grava kaj tranĉa ke ĉiu energio foriĝis el la korpo. Unu el la fratinoj portis por ĉiu el ni lanan litkovrilon. Apatie ni lasis ŝin volvi ĝin ĉirkaŭ nin. La malsato ekposedis nin. Feliĉe la virino venis por porti al ni tason da varmega surogatteo.

Post tuta horo da silento subite eksplodis bruego.

"Ŝi alvenas, ŝi alvenas," kriis ege ekscitita kaj agitita fratino (la ne tute normala fratino). Ŝi brumoviĝis malsupren de la ligna ŝtuparo kaj staris tuj ĉe la antaŭpordo. Mi kuris al ŝi kaj treege dankis ŝin.

"Dankon, dankon, ankaŭ nome de la Reĝino," mi diris, "sed nun ni ĉiuj devas esti trankvilaj kaj silentaj. Kiam la milito estos finita, vi rajtos rakonti tion al ĉiuj. Bone?"

Mi prenis ŝin kun mi al la ĉambro kaj silentigis la mizerulinon per glaso da akvo. Ŝiaj fratinoj nun ankaŭ estis ĉi tie kaj parolis admone al ŝi.

"Lasu nur," mi diris, "ni jam interkonsentis ke nur post la milito ni ree parolos pri tio, ĉu?"

Mi donis al ŝi kuraĝigan ŝultrofrapeton, dankis la fratinojn pro ilia dediĉo kaj kun bateganta koro ni forlasis la domon.

Nun ni certe povis fari nenion, ĉiu estas ja alarmita, ni pensis. Kaŝe ni rigardis transen kie la sinjorino, vestita en peltmantelo, kune kun sia servistino portis sledeton eksteren. Malgranda mizeraspekta etulo estis portata sur ĝin.

"Saluton, saluton," li kriis kaj mansvingis per sia gantkovrita maneto al la postrestanta servistino.

Hannie piedfrapis la neĝkovritan teron pro kolerego pri tiom da malbonŝanco.

"Ĉi tion ni denove povas forgesi, aŭ ĉu ni tamen faru?" ŝi diris al mi hezitante.

"Ne, ni ja sekvas ŝin, sed kun la infano ĉe ŝi ni ne pafu," mi ordonis.

Ŝtonigite pro la dumhora sidado en tiel terura malvarmo ni postsekvis malgaje la virinon kun la sledeto. Ŝi iris al diversaj adresoj kiujn ni notis kaj tiam ni reiris hejmen, nenion atinginte.

Sinjorino Elsinga kiu laŭ nia vizaĝo ja povis vidi ke ni sentas nin malbone kaj seniluziiginte preparis kelkajn varmkruĉojn kaj varmegan surogatteon. Tiel, ĉirkaŭ la provizora forneto en la ĉambro kun varmkruĉo sur la piedoj, litkovrilo surĵetita kaj taso da varmega teo en la manoj mia humoro ree pliboniĝis.

"Kaj nun ni kantu 'Ouwe taaie' ('Ouwe taaie' estas konata kanto; signifas: iu kun multe da eltenpovo) hago-lingve (hago-lingve = iomete afekta parolado)," mi kriis. "Nu knabinoj, kantu!"

Ni ĉiuj ekridis. Paultje, la 9-jara filo kaj Ruud de 13 jaroj ridegis. Malgraŭ nia malbonŝanco ni havis agrablan vesperon.

Freddie restis por dormi. Ŝi povis kuŝi sur la benko en la ĉambro. La maniero en kiu nia nutropatrino kovris ŝin, igis min foriri rapide. Tiu malgranda kuraĝa Fred en tia kruda mondo. Ankaŭ Hannie diris kiam ni estis supre: "Malfeliĉa Freddie, ŝi malhavas la patrinon, ĉu ne?"

Mi kapjesis. "Bonan nokton," mi diris kaj tiris la litkovrilojn super mian kapon.

La sekvantan tagon ni pli bonŝancis. Malgraŭ la tranĉa malvarmo brilis pala suneto.

Sur la vojo oni ne disĵetis salon, kvankam oni estis devigita purigi kaj teni senglacia la trotuaron kaj parton de la strato.

Malgraŭ tio la sinjorino suriris sur la biciklon. Subite ni finfaris niajn planojn. Freddie jam biciklis el la aleo, ŝi estis veturonta al ni renkonte kaj intervenonta se necese.

Kiel belega ekzemplero de novspeca urso la peltmantelulino biciklis antaŭ ni. Ĉe la angulo mi vidis Freddie, kiu gestis ion direkte al ni. Ĝuste en tiu momento mi donis la ordonon 'pafu'.

Hannie pafis unue. La sinjorino desaltis de sia biciklo. Ankaŭ mi ellasis pafon al ŝi. Laŭte kriegante ŝi staris kontraŭ arbo.

En fulmo mi vidis kial Freddie donis signon al mi. Je distanco de malpli ol 3 metroj venis el post la angulo grupo da infanoj.

"For," kriis Freddie, "nazioj!"

Ankoraŭfoje mi pafis al la malamata virino, sed tiam mi veturis treege rapide post la aliaj. Tra malgrandaj stratetoj kaj stratoj ni alvenis spiregante ĉe amikoj. Ni restis tie ĝis la vespero kaj tiam ĉiu iris al sia propra adreso. De Kees ni sciiĝis ke la sinjorino estis nur malgrave vundita. Ŝia peltmantelo kaptis la kuglojn.

"Tiu stulta, stulta ĉevalo!" saltis de la lango de Hannie.

Nia agado estis sensukcesa.

35. Tio eksplodu

Ni sciigis ke ni, kune kun la knaboj el Santporto kaj Velseno devos eksplodigi la fervojon inter IJmuiden (Ejmeijden) kaj Harlemono. Ni estis entuziasmaj, ĉar ni pensis ke la buŝumitaj burĝoj revigliĝos pro tio. Buŝumitaj pro la senkompata agado de la nazioj. Eble ili ree povos kredi ke iam la nazioj estos venkitaj.

Ni kunvenis ĉe To, fraŭlino ekspluatanta tabakvendejon en Santporto. Ŝi estis bonkora, kuraĝa virino, ĉiam preta helpi aliajn. Unu post la alia la knaboj eniris; la plejmultaj tra la malantaŭa pordo por kiel eble malplej tiri la atenton. Hannie kaj mi jam konis multajn el ili pro antaŭaj komunaj agadoj: Jantje kaj Hans, ambaŭ ĵus dek-sepjaraj, Peter, bela, malhela knabo, Auke kaj Bertus, ambaŭ marinfanterianoj kaj frotitaj kaj poluritaj rezistmovadanoj, kaj Frans B., la komandanto. Plue ankoraŭ Piet, Willem kaj Jaap, tri fratoj, kaj Frits, pastorfilo. Estis ankaŭ kelkaj knaboj el Nord-Harlemono.

Unu el la viroj el Santporto cirkuligis sian cigaredtabakon. De To ni ekhavis tason da supo. Komforte ni sorbis tiun.

Hannie kaŝe ĉirkaŭrigardis. Por ŝi ĉio iris tro malferme, tro facile.

Piet estis sterninta ĉiujn 'substancojn' sur la tablon. Prajmoj, knedpastro, batalŝnuro kaj meĉo. Subite li turnis sin kolerege al Frans B.: "Igu tiujn stultulojn estingi tiujn cigaredaĉojn. Estas vivdanĝere." Malvarmete Frans rerigardis: "Trankvilu do, tion mi ja decidas."

Li ŝovis la molan feltĉapelon malantaŭen.

"Ili devas estingi la cigaredojn, aŭ mi foriros," diris Piet, trankvile ŝovante sian seĝon malantaŭen.

"Bone, bone," kriis kelkaj kaj faris tuj kion oni petis.

La malgranda ĉambreto estis plena. Ni sidis sur la planko, atendante la esploranton kiu jam dum horoj estis kuŝanta en la seka fosaĵo apud la fervojo. Aliaj estis laborantaj en la 'bunkro'. Tion lastan Hannie kaj mi ne bone komprenis. La bunkro montriĝis memfarita rifuĝkelo, kiun oni fosis en la Netel arbaro, proksime de la loĝejo de To. La inĝeniaĵo de tiu estis la aerumado tra kava arbo; la enirluko estis kovrita per musko kaj branĉoj. Estis akvokondukilo kaj rezervujo servanta kiel necesejo, estis provizeto da nutraĵoj kaj armiloj. Koncize dirite, bonega kaŝejo. Post la agado ni ĉiuj restados tie. La longa atendado, la streĉiteco kaj la fakto ke verdire ni estis tie tro multope, kaŭzis de tempo al tempo malagrablajn kverelojn. Laŭ mia opinio ĉi tiu Frans ne estris tiel bone kiel dezirinde. Feliĉe la humuro de Willem, kiu estis komandanto de malgranda eminenta grupo de sabotantoj, estis la kaŭzo ke okazis nur malgrandaj bataletoj. Li rakontis kelkajn fiŝercojn kiujn ni ne ege aprezis sed pri kiuj la knaboj rideksplodis.

Finfine la granda Jan envenis. Li estis la esploranto. Per mallaŭtigita voĉo li raportis.

Ĉirkaŭligitaj per maŝinfusiloj ni eliris post momento, postlasante To maltrankvila. Ankaŭ Hannie kaj mi ne sentis nin tre trankvile ĉe ĉi tiu fanfaronado de Frans B. Ni nur bezonus renkonti patrolon kaj jen la problemoj. Niaj paŝoj sonis laŭte kaj ritme sur la strato.

"Ni similas preskaŭ naziojn," subridis Hannie apud mi. Super niaj kapoj estis belega stelĉielo. La luno estis unu granda lumglobo, kion ni ĝuste nun en ĉi tiu nokto abomenis. Estis tombsilenta nokto. La arboj staris senmovaj. Tempon por malfeliĉaj pensoj mi ne havis.

"Ŝirmiĝu!" sonis subite.

Ni malaperis en la krepuskon kaj senpere faligis nin. Kio okazis precize, ni ne sciis. Ĉe la signo: "Pluiru!" ni paŝis al nia celo. Mi ne kuraĝis montri ke mi ege dolorigis min pro tiu subita falo sur la teron. Mia genuo bruldoloris kaj ardis. Mi provis ne lami. Tio impresus tiel stulta.

Ĉe la fervojo Frans dividis sian trupon. Piet ekiris kun la granda Jan por serĉi la lokon kie ni fiksos la eksplodŝargon. Kune kun Willem, Peter kaj Hans kaj iu kies nomo montriĝis Wout, ni kuŝiĝis en la fosaĵeton. Iomete pli malproksime je la transa flanko de la fervojo, la aliaj estis 'enfosiĝintaj'. Ni devis atendi patrolon de proksimume kvin nazioj kiuj kontrolis la fervojon de tempo al tempo. La paŝoj sur la gruzo inter la reloj sonis pli kaj pli laŭte same kiel mia korbatado. Zumis en miaj oreloj kaj mia haŭto pikis. Mia maŝinfusilo gluiĝetis en miaj varmegaj manoj. Ni ĉiuj ne moviĝis. La akra lumo de poŝlanterno pli kaj pli proksimiĝis. La lumo glitis trans nin kaj en reflekso mi fermis miajn okulojn. Momenton mi timis, morte timis, sed la mano de Wout estis sur mia ŝultro. Mi tuj rekonsciiĝis! Agrabla, tiu kamaradeco, mi pensis. Kiam la paŝoj formortis ni povis respiri normale. Piet laboris febre pri la fervojo. Liaj trankvilaj manoj, lia rekta dorso donis al ni la trankvilon kiun ni ĉiuj bezonis. Finfine venis lia signo: 'Tasko plenumita!'

Frans ordonis iri al la bunkro en malgrandaj grupetoj kaj unu post la alia. Wout, konata pro sia nekredeble akra aŭdokapablo, ekhavis la ordonon posteniĝi supre apud la luko. Malsupre en la bunkro ni sidis sur pajlaj matracoj. Cirkulis varmbotelo kun teo. La atendado je la eksplodo nervozigis nin ĉiujn. Timo ke ĝi tamen malsukcesos, sufokis la grupon. Feliĉe ni rajtis fumi. Hans rakontis kelkajn bonegajn Hitlerŝercojn. La sinteno ree pliboniĝis.

Subite Wout donis la signon esti kvietaj. Ni silentis. Tre malproksime ni aŭdis la spiregadon kaj dolorĝemadon de vaporlokomotivo. Daŭris nekredeble longe, antaŭ ol la sono proksimiĝis. La nokto antaŭsendis la sonon multe pli rapide ol la tago. Ĉio estis tiel silenta, tiel senmova.

Blua lumo ekbrilis. La bruo de la eksplodo trairis la nokton tondre kaj kriege. Ŝtalo sur ŝtalon, tintado, vibrosonado de la tero montris, ke nia sabotado sukcesis. Ni gratulis nin kaj la streĉiteco falis de ni. Frans malŝtopis kelkajn botelojn da vino konservitajn speciale por ĉi tia momento. Kiam poste ni ekdormis, staris kontraŭ la muro maŝinfusiloj, fusiloj, karabenoj kaj eksmoda mitralpafilo. La sperto esti kune kun kamaradoj sen senti sin malfacile inter ili, estis io grandioza, io nekonata.

"Mi sentis min kiel partizano," diris Hannie dum la reiro.

"Ĉi tiuj Velsenaj knaboj tamen tre diferencas de la sinjoroj de Velseno, kiujn ni de tempo al tempo renkontas," mi diris iomete amare gaje.

Poste ni eksciis ke la renovigado de la fervojo estis daŭranta semajnojn. Sukcesa agado!

36. La infanoj de Sejs Inkvart

La adreso ĉe kiu Kees kaj Arend de la K.P. planis renkonti nin, estis en Aerdenhout. La biciklo de Hannie denove havis truitan pneŭon. Freddie, kiu havis la reputacion ke ŝi povas rapide ripari pneŭon, helpis ŝin. La ĉeesto de Hannie ne estis tre valora. Estante nelerta en tiaj aferoj, ŝi pli ĝenis ol helpis. Frostrigida en la vintromalvarmo ŝi rigardis senhelpe nian penegadon. Mia mano sangis, pro forglitinta deprenilo kaj mi ege malŝatis ke ĉio iras tiel malrapide. Sed Freddie sukcesis kaj ni ekiris triope.

La vilao situis rave apud aleo kun maljunaj arboj. Por ne altiri la atenton ni eniris unu post la alia kun intertempoj de kelkaj minutoj. La granda ĉefo ankoraŭ ne ĉeestis. Kees oferis al ni cigaredon. Tiuj knaboj estas tamen bone provizitaj je ĉiaj vivbezonoj, mi pensis. Mi treege indignis pro la diskutoj pri manĝaĵo, mono kaj estontecorevoj de la sinjoroj inter si. De la gastigantino ni ricevis tason da surogatkafo kun bongustaj lakto kaj sukero. Corrie estis ĉiam same bonkora. Ŝi estis vidvino kaj havis filineton, kun kiu ni ĉiuj plezuris. Ŝi estis komika infano, kiu laŭte ridegas kaj regajigas ĉion en tiu evidenta virmondo de tia tipa fuma stabejo. Nur viroj kunvenadis tien. Ni estis escepto, same kiel dum multaj kunvenoj de la kontraŭleĝularo. Nur ĉi tie, en Aerdenhout, regis pro Corrie klare pli agrabla etoso ol aliloke.

Hannie parolis kun Arend pri la pozicio de la virino post la milito. "Oni bezonos multe pli da virinoj en postenoj kiuj estas gravaj," ŝi diris.

"Jes," opiniis ankaŭ Corrie. "Ordinaraj bonaj virinoj, mem havantaj infanojn, devos labori ĉe la infanpolico."

Kees kaj Arend treege protestis.

"Vi ne duone scias kia friponaro kaŝas sin inter tiuj malgrandaj infanoj," asertis Arend. "Vi babilas tro multe, knabinoj!"

Mi koleregis.

"Nu, atendu nur. La tempoj ŝanĝiĝos," mi diris sufiĉe akratone. Freddie plifortigis tion: "Pu, kiam la milito estos for, mi iros en la politikon kaj eble mi fariĝos ministro de eksterlandaj aferoj," ŝi diris.

Ni ĉiuj ekridis. Freddie kun la harligetoj kaj la infanfigureto - tio ŝajnis tre malproksime!

En tiu momento eniris Maarten E.. La ĉefo portas multekostan kostumon, mi konstatis silente.

Ni prezentis Hannie al li, ĉar por ŝi estis la unua fojo ke ŝi renkontis la ĉefon de ĉi tiu policrezisto. Ĝentile li klinis la kapon kaj faris latinlingvan rimarkon, pri kiu ili kune subridis. Ĉi tio pligrandigis mian agresemon kaj mi demandis malice ĉu ni, kiam la ceremonioj estos finitaj, eble povos agi energie. Moke rigardis Maarten al mi.

"Ho, pardonu min, sinjorinoj, sinjoroj," kun kapjeso al Arend kaj Kees, "nova kaj speciale ĉarma vizaĝo ĉiam reportas min al miaj studentjaroj," li diris per ekstre troigita kaj afekta voĉo.

"Bone, bone, ni agu (kapjeso al mi) celtrafe." Li ĉirkaŭrigardis. Corrie estis foririnta kun la malgranda knabino.

Estis freneze ke venis en nin iu streĉiteco. Antaŭe jam oni sciigis al ni ke la ĉefo havas gravan komision por ni.

Hannie, la manon sub la mentono, observis lin nerimarkite.

"Unu guldenon por viaj pensoj," mi flustris al ŝi.

"Sinjorinoj," diris la ĉefo, "la Germanoj ree arestis dekojn da rezisthomoj kaj la surprizatako al la Weteringschans-malliberejo lernigis nin ke ni devas elpensi ion alian por liberigi ĉi tiujn homojn."

Parolante li desegnis ĉiajn kvadratojn kaj cirklojn kiujn li zorge paŭsis kaj paŭsis. Atendoplene ni trio pe levis la okulojn al li. Liberigi kaptitojn estis por ĉiu rezistkamarado la kompenso por ĉiuj filaboroj, ĉiu mizero kaj psikaj streĉoj. Ĉirkaŭbraki liberigitan kaptiton, kune iri for de certa morto, tio estis grandioza.

"Ni elpensis planon por fari premon sur la Germanojn," rakontis Maarten. "Aŭskultu, ni sciiĝis per amika konato, kiun lernejon vizitas la infanoj de Sejs Inkvart. Vi devos ekloĝi ĉe adreson en Hago kaj ekzakte sciiĝi je kioma horo ili ekiras de la domo, kiam de la lernejo k.t.p. Tiam vi ricevos la komision kapti tiujn infanojn. Ni devigos 'Ses-kaj-kvaronon': aŭ liberigi la kaptitojn, aŭ mortos liaj infanoj."

Maarten rigardis triumfe al ni post la ekspliko.

Hannie estis la unua kiu diris ion: "Kiamaniere ni kunirigu tiujn infanojn? Kiun aĝon ili havas? Ĉu ni uzu niajn armilojn? Kaj kion ni faru se oni ne liberigos la kaptitojn?" ŝi demandis akre.

Tuj Freddie reagis intense: "Jes ja, ni uzu infanojn en la batalo. Nu, vi sciu, sen mi!"

Ŝi estis leviĝinta kaj rigardis kolerege al ni.

"Kial vi fiksrigardas al mi? Mi ne faros tion. Se vi volas, bone. Mi ne faros. Infanojn, ne, ne! Kial vi mem ne faros tion?" ŝi ekkriis. "Ĉi tio estis ja via plano!"

"Sed la kaptitoj?" kriis Maarten, "ĉu ili ne estas gravaj?"

Ankaŭ li estis leviĝinta kaj rigardis indigne al Freddie. Ni ĉiuj estis silentaj pro ĉio. La kaptitojn, Dio, kiel volonte ni volis liberigi ilin, sed en tia maniero?

Mi metis la brakon ĉirkaŭ Freddie.

"Ŝi pravas, ankaŭ mi rifuzas esti devigita pafmortigi infanojn se la intenco de la plano malsukcesus. Vi devas vere elpensi ion alian, aŭ fari mem." Ni ĉiuj estis stariĝintaj. "Kaj vi, fraŭlino Hannie?" demandis la ĉefo.

"Nu," diris Hannie, "alia plano estus pli bonvena. Ankaŭ mi opinias tion malagrabra komision kaj mi unue volas preparoli ĝin kun Truus kaj Freddie."

Ni adiaŭis la sinjorojn kaj foriris. Tamen ni malŝategis la situacion. Laŭ nia opinio ni agis bone, sed la agaca sento restis, ke niaj knaboj estas enŝlositaj kaj ni estas liberaj. Ni sentis nin necertaj kaj malĝojaj. Komandantoj havas facilan postenon, ni diris. Ili elpensas la planojn kaj aliaj devas plenumi ilin.

Ili lasis nin foriri kun niaj kulpsentoj kaj nia emo al agadoj. Kun planoj por liberigi ĉiujn kaptitojn. Sed infanoj ne konvenas en tiuj planoj. "Ni ne estas hitleranoj, rezisthomoj ne mortigas infanojn," diris Hannie.

Ni kapjesis kaj ni silentis longtempe.

37. La aresto de Hannie

Iun vesperon Freddie kaj mi estis atendantaj Hannie. La sekvantan matenon tre frue ni estis biciklontaj al Aerdenhout kaj per mangrenado perturbi la faŝistfeston ĉe fifama bunkrokonstruisto.

Proksimume je la tria en la nokto ĝi devis okazi, sed Hannie ne alvenis.

Ni sidis ja varmaj ĉirkaŭ la forno ĉe la familio Andriessen sed nia maltrankvilo pligrandiĝis ĉiun horon. De tempo al tempo Mari rigardis min atente kaj mi ruĝiĝis, ĉar mi ne povis respondi lian demandan rigardon. Mi ne rajtis paroli pri la danĝera laboro kiu atendis nin. Mi ankaŭ ne povis montri mian timon. Freddie estis ekdorminta en la granda seĝo. Ŝia maneto kuŝis malfermita kaj senkulpa apud ŝia vizaĝo. Tio kortuŝis min. Tiel, en sia dormo, ŝi ŝajnis ankoraŭ pli infana kaj tamen jam tiom da plenkreskaj ventegoj ŝi spertis.

"Ni enlitiĝu," diris Mari emfaze.

"Jes, jes," mi diris sinĝene. Mi deziris al ĉiuj bonan nokton, vekis Freddie kaj ni iris al niaj mansardetoj en tiu bela malnova domo.

"Ĉu Hannie ne alvenis?" demandis Fred. Senparole mi malvestis min. "Ni ne iros," mi decidis. "Unue ni devas scii kie estas Han." Mi rampis sub la litkovrilojn. Malgraŭ la mallumo ni sciis unu pri la alia ke ni ne povas ekdormi. Ĉe ĉiu ventopuŝo la domo dolorĝemis mistere kaj ŝajnis kvazaŭ iu plorsingultus. Ni ambaŭ sciis ke la kaŭzo estas la malnova domo, sed la timo pri Hannie faris la bruon tiel timtremiga, ja preskaŭ ĝis vera plorado.

"Truus, ĉu ni ekserĉu Hannie?" mi aŭdis la timeman voĉon de Freddie el ŝia ĉambreto apud mi.

"Ne agu tiel stulte," mi kriis malafable. Mi sciis ke mi reagis maljuste, sed tiu damna atendado, tiu necerteco estis pereiga. Tamen post kelka tempo ni ekdormis maltrankvile. Je la kvina Freddie vekis min.

"Ni serĉu nun, Truus," ŝi diris, kiam mi apenaŭ malfermis la okulojn. "Jes, ni iros," mi respondis kaj tre rapide ni vestis nin, ŝteliris malsupren laŭ la ŝtuparoj kaj prenis niajn biciklojn.

Ekstere ĉio estis ankoraŭ malluma. La maljunaj arboj ŝajnis minacaj figuroj. Ni tremis pro malvarmo kaj streĉiteco.

"Ni iru unue al familio Elsinga," proponis Freddie.

"Ne, ne, estas nur la kvina," mi diris, "ili ektimos treege."

"Eble ŝi iris al Ksander kaj restis por dormi tie," pensis Fred.

"Jes, sed ni devas trairi la tutan urbon; iri ĉirkaŭe estas ankoraŭ pli danĝere," mi diris, "kaj baldaŭ ni eble ĉiuj estos kaptitoj!"

"Ho ne," kriis Freddie, "ĉu oni arestis ŝin?" Timigite ŝi elparolis tion pri kio ni ambaŭ ne kuraĝis pensi.

"Unue ni nun iru al kelkaj adresoj, Truus."

Mi biciklis rapide, sencele direkte al la urbo. Ni ankoraŭ ne rajtis esti ekstere. Nur je la sesa finiĝos la tempo de malpermeso. Malgraŭ la streĉiteco pro Hannie ni bone atentis la vojojn. Je la kvina kaj duono ni sonorigis ĉe Rie, kie Jan sin kaŝis. Ni havis specialan signon kaj fajfis ĝin kune por sciigi al Jan kaj Rie ke estas ni. Dormema,

timigita Rie rapide malfermis la pordon. Samtempe ni vidis ke Hannie ne estas tie. Ion tian oni rimarkas tuj. Kune ni dividis nian timon kaj priparolis ĉiujn eblojn kie ŝi eventuale povus esti. Ni restis tie en la Papo Leo-strato ĝis la sesa. Senspiraj ni alvenis ĉe la adreso de Ksander. Tie ĉiuj jam vekigis kaj oni tuj malfermis la pordon. Annie havis ruĝajn okulojn pro plorado kaj rakontis al ni ke ŝia kuzo vidis Hannie ĉe la 'Maŭermuro' sur la Jan Gijsenvaart. Oni estis arestinta ŝin; la kuzeto vidis ŝin vikle gestante parolanta kun kampĝendarmo. Batite kaj paralizite ni eksidis ĉe la tablon.

"Bonvolu knabinoj, trinku ion varman," diris Annie kaj ŝovis tason da surogatkafo al ni. Kiam ŝi metis sian brakon ĉirkaŭ miajn ŝultrojn, miaj fortoj rompiĝis. Fred kaj mi ekploris nekonsoleble kun la kapo sur la tablo.

"Ni devas iri al la stabejo en Bentveld," mi iom poste diris raŭke kaj treme. Proksimume je la deka ni alvenis kun plororuĝaj okuloj ĉe la B.S.-komandantoj Arend kaj Kees.

Kia diferenco kun la reago ĉe Annie!

Alkoholodoro venis al ni renkonte. Kun dika cigaro en la kapo Kees malfermis la pordon por ni.

"Jes, jes, ni jam scias!" li kriis, "oni arestis Hannie, sed jes, tio estas ja la risko de nia laboro."

Tiu 'nia laboro' trafis min kiel pugnobato. Sen atenti nian konsternon Kees daŭrigis: "Jes, Arend jam diris, ni ĉiuj devos foriri de ĉi tie, sed ni daŭrigos la batalon, ni laboros laŭ la intenco de Hannie."

Kolerege kaj balbutante kriis Fred: "Vi faros kion? Certe drinki kaj fumi, dum duona Nederlando pereas, tion vi celas. Vi ne malĝojas pri Hannie, vi damne jam amortizis ŝin!!" Ŝi ŝustampfis sur la tero.

"Vi kaŝu vin, ne mi, ne mi, ĉu vi aŭdas tion, mukbuloj, mi fidas Hannie! Ŝi silentos. Restu sidantaj sur via dika postaĵo. Ni mem provos fari ion por ŝi, kanajloj, kanajloj!"

Senvorte mi prenis ŝin kaj ni eliris.

Sur benketo en Aerdenhout ni elploris. Malespere kaj konsternite pro tiom da nekomprene kaj kruda pensmaniero.

Tamen la sekvan tagon Kees venis por priparoli kun ni kiamaniere liberigi Hannie. Ni sciiĝis intertempe ke ŝi troviĝas tiun nokton en 'Dreefzicht', restoracio ĉe Dreef en la suda Harlemo. 'Dreefzicht' estis farita oficejo de Wehrmacht (germane: kampĝendarmaro) de la nazioj.

Laŭ Kees, Hannie estis transportota proksimume je la deka matene al Euterpe-strato en Amsterdamo. Ĝojaj ke ni momenton povas esti aktivaj, Fred kaj mi ekiris por mobilizi niajn rezistamikojn. Kune kun Frans ni faris planon por surprizataki la malliberulan veturilon en kiu ŝi estos sidanta. Senprokraste gardistoj estis dislokitaj, kaj ĉe Dreefzicht kaj sur Park-aleo, kie la Harlema S.D. havis sidejon, kaj sur la Amsterdama stratvojo, kie la transporto estis preterpasonta.

Nenio okazis kaj nur longtempe poste ni sciiĝis ke Hannie estas forportita jam en la nokto.

Je la 26-a de marto 1945 Hannie kun la kontraŭleĝa 'Waarheid' en siaj biciklosakoj falis en kaptilon de la Germanoj ĉe la 'Maŭermuro'. Tie oni arestis plurajn. Ankaŭ Hannie estis unu el tiuj. La nazioj trovis ne nur la pakon da kontraŭleĝaj gazetoj - la plej granda kapto estis la pistolo kiun ŝi portis kun si. Post multaj esplordemandadoj kaj konfrontadoj kun naziemaj burĝoj kiuj iufoje vidis Hannie laboranta, ŝi finfine konfesis

pro tio ke ĉe la harradikoj de siaj nigrefarbitaj haroj ŝia propra ruĝa koloro estis videbla. Tiam la nazioj sciis ke ili kaptis la 'knabinon kun la ruĝaj haroj'. Laŭ eksmalliberuloj oni torturis Hannie. Oni aŭdis ŝin kriegi. Oni ankaŭ sciiĝis ke la S.D. minacis pafmortigi ŝin sur la korto de la malliberejo sur Amstelveen-vojo. Kun la pugnoj premitaj kontraŭ la korpo Hannie provis kolekti ĉiun kuraĝon kiun ŝi postulis de si mem. Oni faris foton de ŝi servanta nur por la arkivo. La timo sur ŝia vizaĝo komprenigis ke la torturistoj sukcesis sugesti ke ŝi vere estos ekzekutata ĉi tie.

La 17-an de aprilo 1945a, tri semajnojn antaŭ la liberiĝo, ŝi estis mortpafita en la dunoj de Bloemendaal.

En la aŭto kiu portis ŝin al la mortpafloko troviĝis ŝoforo, la S.D.-ulo Ruhl kaj germana soldato kun fosilo. Malantaŭ tiu sekvis alia aŭto kun pluraj S.D.-uloj.

Kiam la Germano Lages pafis, la pafo nur pretertuŝis ŝian tempion.

"Mi pafas pli bone," ŝi kriis (laŭ Lages kaj Ruhl dum postaj esplordemandadoj).

Salvo el la aŭtomata pistolo de la nederlanda S.D.-agento Maarten Kuiper definitive finis ŝian vivon.

Tute sola inter siaj torturistoj, Hannie Schaft, dudek tri jarojn aĝa, lastfoje vidis la fruan printempon, la svingiĝantan amofilon, la nubojn, la sunon.

38. La familio Elsinga

Du tagojn post la arestado de Hannie la S.D.-anoj Ruhl, Lages kaj Aus der Funten venis al ŝia kaŝadreso ĉe la familio Elsinga. Lien Elsinga estis hejme, sola kun sia dekjara filo Paul.

"Paul," diris Lien, "vi scias nenion kaj vi diros nenion. Ankaŭ kiam vi aŭdos vian patrino mensogi. Ĉu bone komprenite?"

Ŝia servistino Jopie estis forironta.

"Oni sonorigas, sinjorino, ĉu mi malfermu?"

"Lasu, atendu momenton, Jopie, ĉi tiuj sinjoroj havas superabundon da tempo," diris Lien morttrankvile. Ŝi mem malfermis la pordon.

"Vi nur iru, Joop, mi parolos kun la sinjoroj."

Kaj Jopie foriris, ektimema kaj pala.

"Nu, nu, kio havigas al mi la honoron, tiel multe da sinjoroj?" diris Lien iomete superule.

"Ni venas por fari domtraserĉon," diris la granda, nigra longkreskulaĉo, kiu agis kiel interpretisto.

"Ho, ĉu mi unue povas vidi viajn dokumentojn? Ĉiu ja povas diri ke li estas policisto kaj intertempe kunpreni la lastajn manĝaĵojn kaj aĵojn."

Ili rigardis ĉie. La Germanoj havis bajonetojn sur la fusiloj.

"Ĉu mi eble povas scii, kion serĉas la sinjoroj?" demandis Lien sufiĉe agresive.

"Vi havas knabinon en via domo, Johanna Schaft, ĉu ne?" demandis Lages.

"Ni havas knabinon en la domo, Eva de Wit, sed ŝi ne estas hejme, do vi revenu aliafoje." Ŝia trankvila, decidema agmaniero malgraŭ la embarasa situacio faris trankviligan impreson je Paul. Pala pro streĉiteco li estis sekvinta la iradon de la aferoj kaj pro la brilantaj bajonetoj li komprenis ke ĉi tio estas serioza afero por la nazioj. Li sciis ke Hannie havas pistolon, sed tion li rakontis nur post la milito. Fiere li suprenrigardis al sia kuraĝa, trankvila patrino.

"Via edzo kaj la patro de Johanna Schaft estas kolegoj, do vi ja scias kiu ŝi estas," diris Ruhl akre.

"Mi pensas ke ni parolas pri du malsamaj knabinoj," diris Lien Elsinga, "la patro de nia Eva estas tajloro. Sed ne tedu tiom, atendu ŝin aŭ alie mi sendos ŝin al vi, tiam ĉio estos klara." Ili ne volis atendi.

"Tiam mi lasos vin. Bonan tagon," diris Lien kaj tenis la pordon malfermita por ili.

"Jen, tio estis tio, Paul," ŝi eksidis. Neniu sciis, ankaŭ ne Paul, ke Lien preskaŭ ne povis subpremi sian malĝojon pro Hannie. Ŝi sciis pri la aresto de Hannie kaj la preskaŭ certa morto kiu atendis ŝin.

Senŝarĝigite la najbaroj de dekstre kaj maldekstre venis por rakonti pri siaj timo kaj necerteco. Ĉiu en la strato fuĝis en kaŝiĝejon dum ĉi tiu potencmontrado. Dokumentoj estis kaŝataj, radioj kamuflataj. Unu el la najbaroj kuris kiel leporo al la lernejo de Harmen Elsinga por sciigi lin pri la domtraserĉo.

"Kaŝu vin, viro," konsilis la najbaro.

Sed Harmen restis trankvila ĉe sia edzino.

"Ni havas nian rakonton, Lien, ni ne dekliniĝos de tiu."

Nur la grandan dekkvinjaran filon Ruud ili tamen 'malaperigis'.

Multaj instancoj, germanaj dum la milito, anglaj kaj kanadaj post la milito, vizitis Lien kaj Harmen Elsinga por sciigi kiel eble plej multe pri 'ilia' Hannie.

La dudekduan de majo la gepatroj de Hannie kaj la familio Elsinga sciigis ke je la 17-a de aprilo 1945 Hannie estis pafmortigita.

39. Klopodo liberigi Hannie

Kompreneble ni klopodis liberigi Hannie.

La kvinan aŭ la sesan de aprilo mi biciklis al Hago kun letero de miaj B.S.-komandantoj por kontakti ilian komunikulon L. Ĉi tiu L. laboris ĉe S.D., sed laŭ niaj komandantoj li transdonis multajn donitaĵojn al la kontraŭleĝularo.

"Kiom da jaroj li jam faras tion?" mi demandis kiel eble plej afable.

"Ho," diris Arend, "estas proksimume unu aŭ du jaroj."

Mi okulis miajn ungojn kaj diris preteratente, ke tiuj S.D.-anoj estas grupo da stultuloj ĉar L. jam longtempe liberigis homojn kaj neniam bezonis zorgi pri kompenco. La sinjoroj silentis.

"Hm, ĉu vi volas transdoni ĉi tiun leteron? Jes aŭ ne!" diris Arend. Kiam li koleriĝis, lia norda prononcmansiero tamen iomete reaperis. Mi kapjesis unumove kaj ekiris, necerta kaj duboplana, survoje al Hago. Mi sentis kiel Arend kaj la ĉefo, Maarten, postrigardas min. Kees ne ĉeestis. Lin mi renkontis biciklante. Li demandis kion mi faros.

Mi rakontis pri la letero kiun Maarten skribis al L. por klopodi liberigi Hannie. Kees staris kurba, la kapon al la tero.

"Forton," li diris subite, "kaj atentu bone tie!"

Li tuj forbiciklis. Tio faris min ankoraŭ pli alerta. Mi komprenis ke estas riska entrepreno.

Post longa laciga vojaĝo tra la bulbregiono kaj post pluraj haltigoj mi alvenis en Hagon. Mi volis fari ĉion por savi la vivon de Hannie, malgraŭ ke la timo kaj necerteco pligrandiĝis horon post horo. Kiam mi preterpasis la fabrikojn de Sikkens, miaj kruroj ne plu volis funkcii. La teruraj memoroj pri la dramo kun mia amiketo Loetje ĉi tie, sur ĉi tiu loko, estis iom tro multe por mi. Mi devis vomii, sed mia stomako enhavis nenion por tio. Larmoj pro sufokiĝo iris laŭ miaj vangoj. Timante ke ili fariĝos veraj larmoj mi reprenis kuraĝon kaj suriĝis ree sur mian biciklon.

Ĉe L. oni ne malfermis la pordon, do mi iris al la malantaŭa flanko kiel Arend estis dirinta. La germana edzino de L. rigardis surprizite kiam mi trairis la ĝardenon, frapis sur la malantaŭan pordon kaj rakontis kiu sendis min. Ŝi alrigardis min akre kaj iris en la domon kun mia letero. Ŝi tuj revenis: "Mein man telefoniert. U mus eben warten im achterkammer." (german-nederlandlingve: Mia edzo estas telefonanta. Vi atendu momenton en la malantaŭa ĉambro) Ŝi enirigis min en mucide kaj aĉguste meblitan malantaŭan ĉambron. Mi sidis tie kaj mi aŭdis mallaŭte sed klare: 'judoj' kaj 'Anjelier-strato'.

Ankaŭ la domnumero estis dirita. Senhezite mi elpensis elturniĝon pri aĉeto de cigaredtabako ĉe kaŝkomercisto kies adreso mi ja konis, kaj saltis sur mian biciklon.

"Kie estas la Anjelier-strato, he vi?" mi demandis senspire al knabeto desegnanta hopirejon.

"Nu, fraŭlino, vi ne estas tiel malproksime de tiu," li diris kun ĉarma haga prononcmansiero. Kelkajn stratojn pli fore mi alvenis spiregante al la koncerna adreso. Kiam oni ne malfermis la pordon post mia sonorigo mi kriis (ne tre kontraŭleĝe cetere):

"For, foriru... oni venos por kunpreni vin!"

Mia mistoniĝanta voĉo certe alarmis eventualajn preterpasantojn, ĉar subite ankaŭ la strato estis malplena. Mi ne atendis kaj resaltis sur mian biciklon. Reire al la loĝejo de la S.D.-viro.

"Mi havas," mi vokis al la germana edzino. "Ĉu via edzo jam finis la telefonadon?" Mia koro bategis el mia gorĝo.

Ho, mi pensis, eble oni tute ne intencas forigi ilin kaj nun tiuj mizeruloj ekiras sur la straton kun la samaj seriozaj sekvoj kiel tiuj pri kiuj mi avertis ilin...

Sed kiam mi post nelonge sidis en la antaŭĉambro ĉe L. kaj ni fumante parolis iomete unu kun la alia, preterpasis motoroj kaj polickamionetoj. Ĉiu koloro foriĝis de mia vizaĝo. Mi rigardis al la viro kontraŭ mi. Lin mi devus demandi fari ion por Hannie - de ĉi tiu terura homo mi devus atendi kunsenton??

Mi rulfaris cigaredon, nervoze kaj kun tremantaj manoj. Mi enspiregis profunde. De la virino mi ekhavis tason da bongustega supo. Laodoro de petroselo, la grascirkletoj, la avena kaĉo kiel aglutinilo, ĉi tio estis rava regalaĵo. Preskaŭ sincere mi kore dankis ŝin. En miaj pensoj mi vidis antaŭ mi la maldikegan hopantan knabeton en la strato. Fiularo, mi pensis, kaj mi esperis ke la homoj en la Anjelier-strato povis fuĝi.

L. donis al mi alian tajpitan leteron por transdoni al iu (la ĉefo?) de S.D. kaj rakontis al mi kie mi povos trovi tiun viron.

Nigraj S.S.-anoj gardostaris apud la pordoj. En miaj malriĉaj vestoj mi certe ne impresos tre fidine la S.D.- kaj S.S.-kanajlaron!

Kun tremantaj genuoj mi donis la leteron kun la nomo de la koncerna S.D.-oficiro al unu el tiuj virogoj. Senemocie li akceptis ĝin. Alia nigra fripono akompanis min al granda oficejo.

Mi ekstaris fronte al mallonga, dika nazio. Mi donis al li la leteron kiun mi estis ricevinta de la eksterdomaj S.S.-anoj. Leginte la leteron la nazio forsendis la ĉeestantajn S.S.-anojn. Li fingromontris al seĝo antaŭ sia skribtablo, forŝiris folieton de skriblibro kaj ekskribis rapide. Tiam li donis al mi la skribitan leteron en fermita koverto, rigardis al mi longtempe kaj akre, kaj diris germane ke mi agis tre impertinente, 'frech' aŭ io tia. Li ree telefonis al la nigrujoj kaj kriegis: "Heil Hitler!"

Akompanate de du S.S.-anoj mi estis kondukata eksteren. Mi prenis mian biciklon kaj provis turni la pedalojn. La ŝvito ŝprucgutis en mian nukon. Returne al L., kiu feliĉe oferis al mi kafon, surogatan tamen, sed agrable varman.

Li legis la leteron, ridis iomete kaj eksidis malantaŭ sian skribtablon por fari leteron al Arend kaj la aliaj B.S.-komandantoj.

"Kio estas skribita en ĝi, sinjoro L.?" mi demandis. "Mi celas en la letero de S.D.?"

"Aĥ, ĉu vi ne scias? Ĉu li ne rakontis tion al vi?" demandis L. "Nu, ni oferis al li paspermeson interŝanĝe de Hannie. Li skribas ke Hannie ne plu troviĝas en Nederlando laŭ lia scio. Sed unue li informiĝos en Amsterdamo." Li ekbruligis dikan cigaron; unue li detondis la pinton kaj tiam li ekbruligis ĝin senhaste.

"En ĉi tiu letero mi skribis ĉiujn viajn spertojn al viaj komandantoj. Formetu ĝin bone, ĉar ni devas esti singardaj," li ridis.

"Ĉu mi estu same singarda pri ĝi kiel pri tiuj paketoj?" mi demandis. "Jes, vi sciu, je la aliro juveloj estis en ili kaj returnvoje ĝino kaj tabako." Mi diris tion formale kaj mi treege ruĝiĝis.

"Jes, infano, tiujn mi uzas por subaĉeti la S.D.," li diris iomete indigne. "Nu, ĝis revido." Kaj li ellasis min.

"Dankon," mi povis eligi, sed kiam la pordo batfermiĝis, mi diris tutkore: "Krevu!"

Mi iris preter la malantaŭan flankon por preni mian biciklon. Per afabla (mi esperis) mansvingo mi salutis la edzinon de L. kaj biciklis returne. Tre malfrue mi alvenis ĉe Maarten, Arend kaj Kees.

Maarten legis la leteron, kunfaldis ĝin kaj forlasis senvorte la varman ĉambron. Demande mi rigardis al Arend kaj Kees, la brovojn suprentiritaj. Maarten revenis kun botelo da vino. Li plenigis la glasojn kaj levis la sian je la proksimiĝanta liberiĝo. "Ĉar," li diris, "tion mi legas ĉiaokaze en ĉi tiu letero."

"Sed Hannie...," mi balbutis, "Hannie, ĉu ŝi liberiĝos? Ĉu ŝi restos viva?"

Li metis sian glason, prenis min je la ŝultroj kaj diris: "Ni scias nun, ke ŝi troviĝas en la Weteringschans-malliberejo. Tio estas la nura kiun ni scias."

Tio, kion L. rakontis al mi, do ne estis vera.

En ĉi tiu grupo da homoj kiujn mi tamen ne tute fidis, kie mi neniam spertus la komprenon kaj la amikecon kiun mi trovis ĉe Cor kaj la aliaj de la unua horo, mi ne povis montri miajn sentojn tiumomente. Mi fuĝis al la ĉambreto kiun ordigis nia gastigantino por mi.

Pli detala informo montris ke vere estis surprizatako en Anjelier-strato. La homoj estis eskapintaj.

40. Vizito al Weteringschans

Mi daŭre cerbumis kiamaniere ni povus liberigi Hannie.

Ĉie la nazioj estis venkataj. Ĉu ni kun la grupoj el Hoofddorp kaj Harlemo ne povus kurataki la malliberejon? La alproksimiĝanta liberiĝo de Nederlando ja devus ebligi tion!

Mi sentis min maljuna kaj kelkfoje ankaŭ tre amara pri mia perdita junaĝo. Ĉiuj miaj rezistkamaradoj havis iun por kunesti: Jan havis sian Rie por dividi la timon kaj necerton, Frans havis sian sekretariinon, kiu imagis iri al malproksimaj landoj, brako-en-brake kun tiu ĉarma, heroeca viro. Li revis la revon de heroo. Mi ne povis ne pensi pri liaj edzino kaj geinfanoj.

Cor havis Annie kaj la infanojn. Li imagis sin post la milito kiel konstruiston de grandaj konstruaĵoj.

"Ni refaros el Nederlando belaĵon, knabinoj," li ofte kriis. "Ni instruos tiujn kapitalistojn kiel oni tamen povas vivi sen ekspluati aliajn! La laboristoj certe lernis finfine ke tiuj grandaj sinjoroj ĵetegis nin en ĉi tiun mizeron. Iam ni laborigos tiun grupon."

Jes, tiu Cor, tiel bonega viro. Li diris kion li pensis, li vivis kiel li opiniis ke homo devas vivi.

Kiam mi priparolis kun miaj amikoj kiel savi Hannie, neniu fakte sciis respondon. La B.S.-komandantojn mi ne volis konsulti. Mi sciis instinkte ke ĉi tiuj Velsenaj policistoj neniam prenas nin seriozaj. Pli grave, ili misuzis nin kaj ankaŭ multe da rezisthomoj el Velseno.

Kiam je tiu pluvema mateno de la dudeka de aprilo mi biciklis laŭ la Lejdena kanalo, mi subite ekvidis la grupon el Velseno kaj Santporto. La bonvenigo estis tre kora. Ĉi tiuj estis la knaboj kun kiuj Hannie kaj mi eksplodigis la fervojon apud Santporto. Ili venis por preni armilojn en Hoofddorp - danĝera entrepreno.

Iu havis tabakon kaj mi rulfaris cigaredon.

Estis tri junaj knaboj en ĉi tiu grupo: Jantje, Japie kaj Hans. Knaboj de dek ses aŭ dek sep jaroj, farantaj bonan laboron kaj subtenantaj la gajecon. Plue estis Willem, granda, bela IJmuidenano (Ejmeŭjdenano).

Wout (Vaŭt), maldikega, kun okulvitroj plenaj de veldaj difektetoj miope fiksrigardis en mia direkto. Poste mi sciiĝis ke li estis nomata la indiano, kapabla kaj memfida viro. Malantaŭ li staris Piet. Ne tre parolema, laŭ la aliaj, sed kiam li malfermis la buŝon, oni ne povis fermi ĝin eĉ per martelo. Piet estis la senpasia, relativiganta forto en la grupo. Kiam la planoj fariĝis iomete tro spektaklaj, tiam estis ĉiam Piet kiu vetois.

Mi rakontis ke mi klopodas kunigi grupon por savi Hannie.

"Pri ni vi povas esti certa," ili ĉiuj diris. Per manpremo mi adiaŭis. Momenton mi fariĝis sinĝena pro la akraj okuloj de Piet. Se li ne estus portinta ringon sur sia fingro, mi penadus ĝui lian favoron, mi pensis. (La ringo tamen ne estis geedziĝa aŭ fianĉa ringo, mi rimarkis poste!)

Mi biciklis al Amsterdamo, ne bone sciante kion fari.

Mi portis flegistinan uniformon. Ĉe Kees van Stam en Hoofddorp mi bonŝance estis ekhavinta ĉapon kaj bluzon de la germana Ruĝa Kruco. Mi estis alte butonuminta mian mantelon kaj mi havis la ĉapon en mia poŝo.

La pluvo ĉesis. Kiel mortaj okuloj la montrofenestroj fiksrigardis min. Maldikaj homoj ĉie. El tramtrako kiun mi preterpasis ĉiuj lignaj ŝpaloj estis malaperintaj. Forbruligitaj por hejtado. Troviĝis odoraĉantaj rubejoj, en la parkoj kaj tie kie oni forrompis la domojn. En la rubo serĉumis homoj kaj solhundo (kelkfoje oni manĝis ankaŭ hundojn...) kaj la malgajeco estis sentebla.

Sur Weteringschans mi anstataŭiĝis mian nederlandan ĉapon per la germana kaj malfermis iomete mian mantelon por ke la germana ŝildeto, la kostumo kaj la orientfronta insigno estu klare videblaj.

Decideme mi iris al la granda bruna pordo. Mi sonorigis, malagrabra laŭta sono. Ĉiuj miaj muskoloj streĉiĝis. Kiam la ĝiĉeto malfermiĝis, mi diris per stranga voĉo kiu ne estis mia: "Heil Hitler." En mia plej bone germana (sed verŝajne de Hannie dekoble plibonigita), mi demandis pri la deĵoranta gardokomandanto.

La pordo malfermiĝis kaj oni enirigis min. Ĉenoj tintis.

Kiam la gardokomandanto alvenis mi denove kunklakiĝis, tre germane, miajn kalkanumojn kaj mia 'Heil Hitler' jam sonis multe pli konvinke.

Laŭ lia garnaĵo mi vidis ke li estas nederlanda S.S.-ano. Nederlandlingve mi rapide rakontis al li ke mia patro estas ŝtata germano, sed bedaŭrinde eksedziĝinta. "Neniam mia prononcado de la germana lingvo estos perfekta," mi aldonis laŭ vero.

"Envenu, flegistino, envenu," li diris afable kaj bonmaniere.

En la pordego niaj paŝoj sonis laŭte kaj militiste. Fanatika, mi estu fanatika, mi pensis.

Mi vidis la karcerofenestrojn kiel ege grandan mielĉelaron. Preteririnte tiun inferon kaj enirinte fuman atendejon mi sentis ke mia koro ree batas normale. Mi ekhavis veran kafon, kiu falis kiel ardanta briko en mian stomakon, mi fumis cigaredon kaj parolis gaje kun la ĉeestantaj nederlandaj S.S.-anoj. Ne unu momenton mia sinteno de Germana Ruĝa-Kruc-flegistino malfervoriĝis.

Dum mi faris mian rakonton la viroj silentis. Pro emocio? Mi rakontis pri marbatalo antaŭ la nederlanda marbordo. Kiel kuraĝe kondukis 'niaj' viroj. Ke malgraŭ tio tamen ekestis multaj viktimoj kiujn oni portis al ni en la mararmean hospitalon. Mi parolis pri germana matroso, severe vundita kaj dekoraciita per la Fera Kruco, havanta fianĉinon kiu, je la ektimo de mia komandanto, estas teroristino, kiu estas en ĉi tiu malliberejo.

Mia komandanto igis min demandi ĉu oni pretas kunirigi ĉi tiun knabinon, akompanatan de du soldatoj, por plifaciligi la mortohoron de ĉi tiu juna germana heroo (mi purigis laŭte mian nazon).

Larmo gutis laŭ mia nazo. Ke tiu estis pro timo kaj streĉo neniu sciis, sed ĝi ja faris mian rakonton pli kredebla.

En tiu momento mi eĉ ne konsciis ke mi ne posedas ian oficialan dokumenton. Se la gardokomandanto estus preninta la aparaton por telefoni al la markomandanto, mi estus surprizkaptita.

Sed li diris: "En ĉi tiu malliberejo ne troviĝas virinoj, tiam vi devos iri al Amstelveen-vojo." Momenton mi sentis malaperi ĉiun kuraĝon, ĉiun esperon el mi. Poste mi regis min denove. La ruĝ-blanke striita vestaĵo memorigis min ĝustatempe pri mia rolo. "Ni ja transportos vin al Amstelveen-vojo," diris la afabra S.S.-ano.

"Bonege," mi diris kaj kun ektimo mi pensis pri mia biciklo, kiun mi estis metinta kontraŭflanke de la strato. Ja ŝlosita, sed tio donis malmulte da garantio.

Mi trinkis ankoraŭfoje tason da kafo, ekhavis bongustegan panpecon kun fromaĝo! kaj rakontis al la viroj ke ankaŭ mia fratino kaj mia amikino laboras en la mararmea hospitalo, ke sekvontan sabaton ni aranĝos feston kaj ke ni ŝatus ke ankaŭ nederlandaj knaboj ĉeestu por la dancado. Tio faris furoron. Mi skribis kelkajn fikciajn nomojn sur pecon da papero kaj adiaŭis rideme.

Ekstere mi sentis la emocijon pro la mizero de la homoj interne kiel strangolan ŝnuron ĉirkaŭ mia kolo, sed per multe da sinregado mi povis bremsi min kaj ridis kaj ŝercis kun la S.S.-anoj.

Kiam mi elaŭtiĝis sur Amstelveen-vojo kaj mane adiaŭis la aŭton mi sentis la rigardojn de la Amsterdanoj malamplene direktitaj al mi.

En portiko mi ree ĉifis la holandan ĉapeton sur miajn harojn. En spegulvitro mi fiksrigardis al stranga, pala vizaĝo kiu estis la mia. Mi havis paketon da subvestoj en mia sako kiun mi ekhavis de tolaĵobutiko en Harlemono. Se nenio alia sukcesus, mi almenaŭ volus transdoni tion. En la orloj troviĝis cigaredpajeroj sur kiuj Freddie kaj mi estis skribintaj kuraĝigajn vortojn.

Diversaj viroj kaj virinoj sidis atendantaj kun saketoj da lavotaĵo. Mi anoncis min ĉe la pordisto, kiu diris: "Tiel vi ne povas transdoni ĝin, flegistino, ĝi devas esti en lavsako kun ŝia numero sur ĝi."

"Sed mi ne konas ĉi tiun knabinon," mi diris. "Mia direktorino sendis min."

Li montriĝis afabla, trankvila viro.

"Eksidu momenton tie, eble la 'Aufseherin' (germane: estrino) volos paroli kun vi."

Mi sidiĝis apud maljunan viron. Apud sin li estis metinta saketon da lavotaĵo kun infane grandaj numeroj sur ĝi. Liaj blue vejnaj manoj kuŝis trankvile kaj senkuraĝe sur liaj genuoj. Li fiksrigardis antaŭen. Pro kiu estas tiu viro ĉi tie, mi pensis. Filino? Edzino?

Miaj nukharoj ekstaris kiam mi aŭdis miajn kunatendantojn demandi al la pordisto kia estas la humoro de la 'Aufseherin' hodiaŭ.

Nu, ne tro malbone, laŭ la pordisto. Fivirino, mi pensis.

Vigraj paŝetoj anoncis ŝian alvenon. Ĉiuj leviĝis. Ankaŭ mi. 'Heil Hitler,' ŝi diris akre al ni. Kelkaj el ni respondis ŝian saluton per murmurata: "Bonan tagon, sinjorino." Kun ĉikana rideto ŝi rigardis nin. Unu post la alia ni devis veni al ŝi kun la lavotaĵo. Kiel la lasta - mi lasis ĉiujn iri antaŭ mi - mi iris. Mi rakontis ke mi venas pro Jannetje Johanna Schaft, ke mi ne konas la numeron kaj ankaŭ ne la personon mem. Ŝi malfermis grandan libron.

"Ist nicht mehr da, (germane: ne plu estas ĉi tie)" ŝi diris kaj mi ankaŭ vidis strekon tra la nomo de Hannie.

"Also... (germane: do)" Ŝi malaperis tra la barilo kiun la pordisto tenis malfermita por ŝi.

Mi aŭdis ĝin batfermiĝi.

Mi retrovis min antaŭ la malliberejo, apogiĝanta kontraŭ la muro. Estis kelkaj homoj ĉirkaŭ mi.

"For, knabino, foriraĉu diablen!" diris voĉo.

Mia pistolo duonpendis el mia poŝo. La pordisto eble metis ĝin en mian poŝon aŭ ĉiukaze li vidis ĝin kiam mi svenis.

Dum longa tempo mi vagis tra Amsterdamo, sen kompreno pri tempo aŭ malvarmo.

Ôio estis farita vane.

41. Liberiĝo

Estis frue en la mateno kaj la mallonga dormo kiun mi ĝuis estis tamen sufiĉa por senti min satripozinta. Post ĉiuj serĉadoj kaj klopodoj por trovi kaj liberigi Hannie, min estis okupinta obtuza sento de forlasiteco kaj rezignacio.

Je tiu frua horo mi klare aŭdis kantata de multaj: 'Oranje boven.' (Oranĝa supre: 'Oranje' estas la nomo de la reĝa familio) ĉu mi bone kaptis? Estis ankoraŭ preskaŭ mallume. Mi malfermis la tegmentfenestron kaj jes, mi aŭdis ĝuste.

Neniam antaŭe mi vestis min tiel rapide kiel nun.

"Ellitiĝu!" mi kriis al Freddie.

"Ili venos, la angloj. Aŭskultu, ekstere!" Mi krivekis la tutan familion. Ni trinkis iom da akvo kaj iris en la straton. En la duonmallumo oni povis vidi eĉ en ĉi tiu silenta kvartalo de sud-Harlemo grupetojn da homoj. Ekscitite kaj gajege la homoj parolis unu kun la alia. Senpere diri kion oni pensas, estis jam tre liberiĝa sento por ĉiuj burĝoj. Ĉe sinjorino Limpers la antaŭpordo estis malferma.

"Ĉu estas vere?" mi kriis supren.

Granda kaj solena ŝi staris tie.

"Jes," ŝi diris trankvile, "ni estas liberigataj, sed tio ne estas destinita por mia filo. Mi ĵus aŭskultis la radion, estas vere ĝuste."

Unuafoje mi vidis ŝin plori kaj mi konfuziĝis pro tio, mi sentis min necerta.

"Freddie kaj mi iros al la granda ĉefo por demandi kion ni faru!" mi kriis.

Ni fermis la pordon malantaŭ ni kaj ni alvenis en ekscititan grupon da homoj. El ĉiuj flankoj oni aŭdis la informojn, kie oni rimarkis Anglojn (poste montriĝis ke ili estas Kanadanoj.) Iu sciis ankoraŭ pli bone ol alia. Ankaŭ ni fariĝis ekscititaj kaj nervozaj pro tio.

En la granda stabejo la ĉefo, la regiona komandanto, ne ĉeestis. Kees kaj Arend ja estis tie. Ili konsilis al ni akompani ilin por manĝi kaj trinki ion. Ni ne ŝatis tion. Ni volis fari ion, fari ion utilan, uzi nian energion por tiu neatendita liberiĝo. Ni plubiciklis ĝis Freddie vidis amikon de la kontraŭleĝa 'Waarheid'.

"Mi eklaboros iomete," ŝi kriis al mi.

Mi daŭrigis mian rajdadon kaj jam longtempe preterpasis la Amsterdaman Pordegon, kiam mi konsciiĝis ke mi estas survoje al Amsterdamo. Ĉiam pli da ruĝ-blank-blua ekaperis sur flagstangojn, antaŭ la fenestrojn kaj supre sur preĝejojn. Malgranda knabo estis senpere svinganta grandan flagon, faritan el littuko. Estis literoj sur ĝi kaj kiam mi atente rigardis, mi legis:

'We are free.' (angle: Ni estas liberaj')

ĉie estis malfermaj fenestroj kaj pordoj, kvazaŭ oni volus malaperigi la malfreŝan etoson esti enfermita kaj sklavigita.

Mi pedalis kaj pedalis. La ŝvito spruĉgutis de mi. En Halfweg mi ricevis tason da teo ĉe tute nekonataj homoj. Entuziasme ni ŝultrofrapis unu la alian. "Ni estas liberaj!" ni kriis, sed mia entuziasmo estis ludita. Profunde en mi estis nedifinebla doloro, enfermita tristo kiun oni ne povas montri ĉar estas neeble vortigi ĝin. Estis kvazaŭ iu alia turnus miajn pedalojn, kvazaŭ iu alia afable ridantis al la ekscititaj homoj ĉirkaŭ mi.

Ĉe Filine, kiu kaŝloĝis ĉe Marie Korts, mi iomete kvietiĝis. Senvorte ni ĉirkaŭbrakis nin. Marie estis ŝovmalferminta la kurtenojn. Mi konsciis ke tio nun eblas. Filine povis ree esti montrata al la popolo. Ŝi povis ree esti homo.

Ĉu tio vere ankoraŭ eblas? mi pensis konfuzite. Esti ordinara homo? Ridi, danci, forgesi?

Ĉu Filine kaj la koncentrej-homoj, Freddie, Jan kaj mi simple povos turni la butonon? Iel kiel: hop, for estas la milito, la subigo, la insultado de la domo?

Medito mi observis la bruantajn homojn sub mi en la strato. Ekaperis ĉiam pli da flagoj. Ankaŭ la homoj mem ornamis sin. Mi turnis min for de la fenestro kaj, sendemande ĉu tio eblas, mi akceptis taseton da supo, kiun Marie estis irpreninta ĉe la popola manĝejo. Kviete mi trinkis mian supon dum Marie per sia grave germana prononcmalmaniero rakontis pri la strato, la popola manĝejo, la homoj.

Ĉi tiu bonega virino, germanaskita, estis helpinta Filine dum la tuta milito. Kiel arda kontraŭ-nazio ŝi konis la grandan aflikton esti ekskluzivita de la 'bonaj Nederlandanoj'. Esence ŝi faris pli da efektiva rezisto ol multaj.

Filine kaj mi decidis iri al la Amstelveen-vojo malliberejo por tamen eltrovi ĉu eble Hannie estas 'postrestigita'. Oni aŭdas tiel strangajn rakontojn.

Mi tute forgesis ke por Filine eble estas strange kaj nekutime en la strato. Strange, libere iri en la strato, sen esti arestata.

Estis longa vojo. Ni preterpasis la mortpafejojn kie oni estis metinta florojn kaj rapide pendiginta grandan ruĝ-blank-bluan flagon sur senfenestran muron. Momenton ni haltis kaj silente ni daŭrigis nian liberiĝveturon sen ĝojo. Kiam ni diris ion reciproke, estis pri negravaj aferoj. Ni ambaŭ timis niajn emociojn.

Ĉe la malliberejo staris dekoj da homoj. Preskaŭ ĉiuj havis florojn. Filine, por kiu la longa veturo certe estis turmento pro nekutimo kaj multjara deviga restado en la domo, restis ĉe la malliberejo. Mi revenis kun granda bukedo da ruĝaj tulipoj.

Surdiga 'hura'-vokado eksonis kiam la grandaj pordoj malfermiĝis. En la pordaperturo aperis unu post la alia virinoj fremde fiksokulantaj en la sunlumon. En la homamaso ili serĉis parencojn kaj amikojn. B.S.-ano voĉlegis la nomojn de la eksmalliberuloj, laŭte kaj kuraĝe en la libera aero. Ĉiu nomo estis sekvata de tondra aplaŭdo kaj hura-vokado. Malgrandaj virinetoj, dikaj, grandaj, ankoraŭ knabinoj, ili ĉiuj preterpasis nin, ĉirkaŭate de kisantaj, ĉirkaŭbrakantaj parencoj. Neniu hontis pri siaj larmoj.

Kiam la lasta aperis el la bastiono de timo kaj humiligo kaj evidentiĝis ke ne estas parencoj por ŝi, Filine donis niajn florojn al ŝi. Ni demandis ĉu vere ĉiu forlasis la malliberejon. "Ĉu estas ĉi tie eble malsanuloj aŭ mortintoj?" mi demandis.

Post negativa respondo ni turnis nin. Ni promenis al Weteringschans kaj eniris la malliberejon.

Kanada oficiro akceptis nin. Filine parolis. Mi subite devis iri al la necesejo. Kiam mi vidis malgrandan pistolon malantaŭ la necesujo mi ekmiris. 7 mm. Certe de S.S.-kanajlo, mi pensis, kompreneble li volis liberigi sin de tiu objekto.

Pro la vizaĝo de Filine mi jam komprenis ke ankaŭ ĉi tie Hannie ne troviĝas. Raŭke pro emocio kaj seniluziigo mi rakontis fanfarone pri la pistolo. "Nu," mi ekkriis, "ni tamen havas ion!"

Ege malfeliĉa mi estis pro la grandaj seriozaj kapreolokuloj de Filine. Ni reiris tra la brua, ekscitita, festa urbo. Returne al Marie. Mi ne restis por dormi. Mi pedalis la

longan vojon returne al Harlemo, en unu tede ripetigema ritmo: Neniam plu., neniam plu., neniam plu...

42. Rememoro

Estas novembro 1951. La malvarma milito furiozas. Estas milito sen kanontondrado, sen generaloj kaj soldatoj. Plumarmitaj ĵurnalistoj kaj politikistoj ĉerpas sian venenon el malamo, kalumnio kaj suspektigoj.

En tiu tempo de senbriligo kaj nereala pensado, en la mezo de tiu malvarma militetoso, la junularo de la komunista partio volis organizi Hannie Schaft-rememoron.

En 'Waarheid' kaj en la magazino 'Jeugd' estis enpresigitaj alvokoj amase partopreni en ĉi tiu rememoro. ('Jeugd' = Junularo)

Laŭ la ekzemplo de francaj manifestacioj kontraŭ reviviĝanta faŝismo, oni estis pligrandiginta portretojn de Hannie kaj metinta ilin sur ŝildojn. Ŝajnis al mi tre ne-nederlande kaj mi ne estis tre entuziasma pri tio, sed mi ne protestis. Mi sentis min maljuna inter ĉiuj ĉi junuloj, kiuj kiel infanoj ja spertis la militon, sed tute malsame ol mi.

La malvarma milito estis alpreminta la komunistojn kontraŭ la muron kaj, kalumniitajn kiel ili estis, kuniginta ilin pli firme. Pli arde kaj ankaŭ pli emocie ili defendis siajn principojn. Ili daŭrigis sian reziston kontraŭ ĉiuj imputoj.

La 27-an de novembro 1951 kuniĝis proksimume 5000 eksrezisthomoj, junuloj kaj komunistoj ĉe la komenca ekstremo de Zee-vojo en Bloemendaal.

La antaŭan vesperon la rememoro al Hannie Schaft estis, buŝe de urbestro Den Teks de Bloemendaal, malpermesita.

Fariĝis ambaŭflanke politika afero. La gepatroj de Hannie estis eĉ persone kontaktitaj de la tiama ĉefministro.

Mi sentis min abomene. La militon mi estis postvivinta. Kune ni estis batalintaj kontraŭ la malamiko, homoj el diversaj medioj, el diversaj religioj kaj konvinkoj.

Nun mi fariĝis malamiko kaj kun mi miaj gekamaradoj.

Mia patrino ja volis gardi nian infanon kaj mi iris trenpiede al la interkonsentita loko. Kune kun 'Witte Ko' mi estis antaŭironta kun la florkrono.

Krom la miloj da, plejparte junaj homoj, ĉeestis ankaŭ amaso da policanoj. Ĉiuj parolis ekscitite unu al la alia.

"Malhonestaj faŝistoj," siblis Gerben inter siaj dentoj vidante la policarmeon. Vere konsternitaj ni fariĝis nur kiam la procesio kun kronoj kaj floroj ekmoviĝis kaj ni proksimiĝis al Zee-vojo. Atendis nin cisternkamionoj, tankoj kaj alia granda materialo minacaj kaj grandegaj.

Kiam ni, plifortigitaj de 'Pluiru, kamaradoj, ili scias ke ni estas nearmitaj!' malrapide alvenis en la najbaraĵo de la unua tanko, ĉi tiu moviĝis kiel moloĥo en nia direkto. La armilo de la kirasturo turniĝis al ni. Senmezura kolerego ekkaptis min subite. Mi maltenis la kronon kaj iris al la tanko. La larmoj fluis sur mia vizaĝo.

"Ĉu vi vere pafos al ni, knabo?" mi kriegis. "Mi batalis kvin jarojn por via liberiĝo, ĉu vi vere estas pafonta al mi, al ni...?"

Sub la kasko min fiksokulis knabovizaĝo. Li aspektis palega kaj turnis sian kapon.

Policoficiro ektiris sovaĝe mian brakon. "He, vi, reiru!!" li kriegis.

Mi rigardis lin plorsingulte kaj li maltenis min. "Damne, damne," mi blasfemis antaŭ mi. Ĉiuj disvastiĝis.

Kune kun la aliaj mi iris al la urbdomo de Bloemendaal. Ni vere povis paroli kun Den Teks. Ĉiun mian indignon kaj konsterniĝon mi riproĉis al li.

La tutan tagon grupoj da junuloj estis surpiede ĉie en Harlemo. Ili diskutis kun la loĝantoj kaj la indigno estis granda, ankaŭ ĉe multaj malsamopiniantoj. Kelkaj junaj homoj venis laŭ granda kromvojo tamen al la tombo de Hannie kaj povis meti siajn florojn tie. Poste ili estis arestitaj kaj ricevis juĝan asignon.

Hejme mi rakontis nenion pri ĉi tiu emocia tago. Mi dankis la patrinon kaj prenis mian malgrandan Hannie kaj metis ŝin antaŭ min sur biciklon. Mi veturis al la strando kaj longe rigardis la maron.

"Hannie," mi diris laŭtvoĉe.

Du bluaj sinceraj okuletoj suprenrigardis al mi.

"Tio estas mi, ĉu panjo?" ŝi diris gaje.

Jes, mi pensis reirvoje, ĉiam kaj ĉiam denove estos novaj, aliaj Hanjoj.

Venhuizen, la 22-an de majo 1982.